



EL POPOLA ĈINIO

人民中國彙通

8

1970

Vortoj de Prezidanto Maŭ

Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

La vivo spegulita en literaturaj kaj artaj verkoj, kompare kun la ordinara reala vivo, povas kaj devas esti pli alta, pli intensa, pli koncentrita, pli tipa, pli ideala kaj sekve kun pli da universaleco. Revoluciaj literaturo kaj arto devas krei diversajn karakterojn laŭ la reala vivo kaj helpi la popolon antaŭenpuŝi la historion.

Fotoj pri la Revolucia Moderna Pekina Opero "Ruĝa Signal-lanterno"

Kun ruĝa signal-lanterno en mano, Li Juhe, membro de la Komunista Partio de Ĉinio kaj komutisto de fervojo, venas en proksimejon de Longtan-stacio por renkonti la kurieron alsenditan de la supera organo en la kontraŭ-japana Songling-bazloko.





Post la arestiĝo de Li Juhe, Avinjo Li kun kordoloro rakontis al Tiemej la revolucionan historion de ilia familio. Ŝi diris al Tiemej, ke ŝi starigu al si bravan volon kaj altan celon por igi la malamikon pagi la sangan ŝuldon.





Preferante morton ol submetiĝon, kun fortega justecamo, ĝisĉiela heroismo kaj absoluta sentimeco al morto, la tri generacioj de la familio de Li Juhe iras al la ekzekutejo en la impona muziko de *La Internacio*.

Post torturado, Li Juhe rekte staras sin apogante sur seĝo kaj heroe riproĉas Hatojaman kun indigno, tiel ke la malamikoj falis en panikon.

Pensante pri la martiriĝo de la patro kaj avino, Tiemej pleniĝis de malĝojo kaj indigno kaj decidis turni la malĝojon en batalforton kaj daŭrigi la postlasitan aferon de la martiroj kaj ĵuras esti heredanto de la ruĝa signal-lanterno.



La tranĉil-akrigisto, plonestro de la gerila taĉmento, kun gerilanoj sub sia gvido, energie batalas kontraŭ la obstinaj malamikoj, tute ekstermis la japanajn agresantojn, mortigis la perfidulon kaj fine hakmortigis la japanan faŝiston Hatojama.

Helpate de la najbaro, Tiemej sukcese fuĝis el la faŭko de tigo, rapidis al la kontraŭ-japana bazloko de Cipresomonto, transdonis la sekretan ĉifro-libron al la estro de la gerila taĉmento kaj tiel venke plenumis sian taskon.



Prezidanto Maŭ

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta
Kunsido en Jan-an”

Denova Prezento de la Revoluciaj Modelaj Teatraĵoj en Pekino kaj Ŝanhajo

POR celebri la 28-an datrevenon de la publiki-
go de la verko de Prezidanto Maŭ *Paroladoj
ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an* — la
epokfara dokumento en la marksism-leninisma ideo-
logia kaj kultura movado, la Ŝanhaja Pekinopera
Trupo, la Ĉina Pekinopera Trupo, la Pekina Pekin-
opera Trupo, la Ĉina Baleda Trupo kaj la Centra
Muzika Ensemblo denove prezentis ekde la 2-a
de majo por la vastaj amasoj de laboristoj, kam-
paranoj kaj soldatoj de la ĉefurbo revoluciajn
modelajn teatraĵojn disradianajn la brilon de
Maŭzedongpenso.

Inter revoluciaj modelaj teatraĵoj prezentitaj
estas: revoluciaj modernaj pekinoperoj *Sagaca
Kapto de la Tigra Monto*, *Ŝagiabang* kaj *Ruĝa
Signal-lanterno*, revolucia moderna baledo *Ruĝa
Virina Taĉmento*, revolucia simfonia muziko *Ŝagia-
bang* kaj fortepiana muziko “*Ruĝa Signal-lanterno*”
kun Kantado de Pekina Opero. Sub la intima zorgo
de la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto
Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la
vicestro kaj la varma subteno de la vastaj amasoj
de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tiuj revolu-
ciaj modelaj teatraĵoj, kiuj ĝuas bonvenigon de
la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, atingis sian

perfektecon post fojrefojaj polurado, forĝado kaj
plibonigado.

Samtempe estis prezentata alia nova speco de
la revoluciaj literaturo kaj arto — fortepiana kon-
ĉerto *La Flava Rivero*.

De la 2-a de majo, ankaŭ la batalantoj de la
revoluciaj literaturo kaj arto de Ŝanhajo denove
prezentis la pekinoperon *La Haveno* kaj revolucion
modernan baledon *Blankhara Knabino*.

Krome, ili prezentis ankaŭ revoluciajn mode-
lajn pekinoperojn *Ruĝa Signal-lanterno* kaj *Ŝagia-
bang*, revolucion modernan baledon *Ruĝa Virina
Taĉmento*, fortepianan muzikon “*Ruĝa Signal-
lanterno*” *kun Kantado de Pekina Opero*, kiujn ili
lernis de Pekino, kaj dek revoluciajn historiajn
kantojn.

La revoluciaj literaturaj kaj artaj batalantoj,
kiuj partoprenis la prezentadon, esprimis ke ili
nepre prenos la prezentadon kiel procezon de viva
studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kaj
kun vigla revolucia fervoro modlos bone la heroajn
figurojn de la proletaro, por ke la proletara revolu-
cia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ
disradian pli pompan brilon.

VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ

Miloj post miloj da martiroj antaŭ ni heroe oferis sian vivon por la interesoj de la popolo. Ni alte tenu ilian standardon kaj marŝu antaŭen sekvante iliajn sangspurojn!

Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekinopera Trupo
(Traduko laŭ la scenaro prezentita en majo de 1970)

PERSONOJ

Li Juhe (Juhe), fervoja komutisto kaj membro de la Komunista Partio de Ĉinio

Tiemej, lia filino

Avino Li (Avino), lia patrino

Kuriero de Songling-bazloko de la Okavoja Armeo
(Kuriero)

Tranĉil-akrigisto, subplotonestro de Geriltaĉmento de la Okavoja Armeo sur la Cipres-monto

Hujlian, najbarino de Li Juhe

Onklino Tian, bopatrino de Hujlian

Estro de la Cipresmonta Geriltaĉmento de la Okavoja Armeo

Nombro da gerilanoj

Kaĉo-vendistino

Knabino vendanta cigaredojn

Laborantaj popolanoj A, B, C, Ĉ, klientoj ĉe la kaĉvendista budo

Hatojama, ĉefo de la ĝendarma taĉmento de japanaj agresantoj

Vang Lian-gju, inspektoro de la pupa polico, kiu antaŭe estis subtera kompartiano kaj poste perfidulo

Hoŭ, kandidata membro de la ĝendarma taĉmento de japanaj agresantoj

Kaporalo de la ĝendarma taĉmento de japanaj agresantoj

Falsa kuriero, spiono de la ĝendarma taĉmento de japanaj agresantoj

Ŝuisto, spiono de la ĝendarma taĉmento de japanaj agresantoj

Nombro da ĝendarmoj kaj spionoj de japanaj agresantoj

SCENO I

RENKONTI LA KURIERON

Nokto de frua vintro en la tempo de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

Proksime de Longtan-fervojestacio en norda Ĉinio. Videblas fervoja taluso. Montoj en la malproksimo.

Kiam la kurteno leviĝas, siblas frosta norda vento. Kvar japanaj ĝendarmoj patrolas tra la scenejo. Kun signal-lanterno en la mano, Li Juhe vivecplene kaj trankvile envenas per firmaj paŝoj.

Juhe (kantas laŭ *hipi sanban**):

Mi ĉirkaŭrigardas kun ruĝa lanterno en mano. . . .

*Longtanon alvenos sendit' de l' supera organo,
Tridek post la sepa fiksiĝis la temp' por renkonto,*

Ja certe alportos lin baldaŭ la trajn' al Longtano.

Aŭdiĝas ventbruo. Tiemej envenas kun korbo kontraŭ la vento.

Tiemej: Paĉjo.

Juhe: Nu, Tiemej! (Pensante ke lia filino suferas de frosto, li demetas sian koltukon kaj metas ĝin ĉirkaŭ ŝian kolon.) Kiel iris via negoco hodiaŭ?

Tiemej: Hm! La ĝendarmoj kaj iliaj lakeoj intence ĉikanis per korpo-traserĉo, tial ĉiuj maltrankviliĝis. Kiu do ankoraŭ pensis pri aĉeto.

Juhe: Tiuj banditoj!

Tiemej: Paĉjo, ankaŭ vi estu pli singardema!

Juhe: Jes. Tiemej, iru hejmen por diri al avinjo, ke baldaŭ venos iu onklo.

Tiemej: Onklo?

Juhe: Jes.

Tiemej: Kiel aspektas la onklo hodiaŭ venonta, paĉjo?

Juhe: Ne demandu pri tio, infano.

Tiemej: Mi iros demandi avinjon.

Juhe: Tiu infano!

Tiemej eliras.

Juhe (rigardante la dorson de Tiemej, ĝoje): Bona filino! (kantas laŭ *hipi juanban*)

Ŝi karbon el rubej' kolektas kaj kun korb' kolportas,

Disfendas ankaŭ ŝi brullignojn, akvon vektoportas.

Laborojn en- kaj ekster-hejmajn lerte ŝi plenumas,



Li Juhe, fervoja komutisto kaj membro de la Komunista Partio de Ĉinio

*Infanoj de ni malriĉuloj frue dommastrumas.
Kiajn arbidojn oni plantas, tiajn fruktojn ili donos,
Kaj kiajn semojn oni semas, tiaj floroj ekburĝonos.*

Envenas Vang Lian-gju

Vang: Maljuna Li, mi jam longe vin serĉadis. . .

Singardeme Li Juhe geste ĉesigas lian parolon kaj esplore rigardas ĉirkaŭen.

Vang: La japanaj diabloj dense gardostaras hodiaŭ, maljuna Li. Ŝajne ili havas ion por fari!

Juhe: Mi scias. De nun ni intervidu kiel eble malofte, maljuna Vang. Se estos necese, mi sciigos vin.

Vang: Bone.

Vang Lian-gju eliras.

Aŭdiĝas lokomotivaj fajfoj en malproksimo. Li Juhe eliras. Malheliĝas la scenejo.

Rapide trapasas trajno kun bruego. Aŭdiĝas pafoj.

Heliĝas la scenejo. La kuriero descendas la taluson farante "transkapan ruliĝon" kaj svenas.

Haste envenas Li Juhe.

Juhe (vidante lin murmuris al si mem): Ganto sur la maldekstra mano...

Aŭdiĝas pafoj. Vang Lian-gju revenas.

Vang: Kiu estas li?

Juhe: Nia homo. Mi forportu lin, vi ŝirmu nin!

Vang: Bone.

Li Juhe forportas la kurieron surdorse.

Aŭdiĝas krioj de persekutantaj japanaj ĝendarmoj kaj pafoj. Vang Lian-gju faras du pafojn en la direkto kontraŭa al tiu en kiu Li Juhe foriris. Aŭdeble alproksimiĝas japanaj ĝendarmoj. Por savi sin, Vang Lian-gju tremante pafas al sia brako kaj falas teren.

Envenas la kaporalo kun japanaj ĝendarmoj en persekuto.

Kaporalo (al Vang Lian-gju): Haj! Saltinto el la trajno ĉu estas?

Vang: Kio?

Kaporalo: Saltinto el la trajno ĉu estas?

Vang: O! (Li montras en la direkto kontraŭa al tiu en kiu Li Juhe eliris.) Tie.

Kaporalo (konsternite): Kuŝiĝu!

La japanaj ĝendarmoj tuj kuŝiĝas timplene.

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

S C E N O II

AKCEPTO DE LA TASKO

Tuj post la lasta sceno.

La domo de Li Juhe. Ekster ĝia pordo estas strateto. Meze de la ĉambro staras tablo kaj seĝoj. Sur la fenestro vidiĝas ruĝa papera papilio. Dekstre en la malantaŭo estas interna ĉambro, ĉe kies pordo pendas kurteno.

Kiam la kurteno leviĝas, hurlas norda vento kaj estas malhele en la ĉambro. Avino Li levas la meĉon de la petrola lampo kaj la ĉambro heliĝas.

Avino (kantas laŭ *hipi sanban*):

*Fiŝistoj povas venki ondojn kaj tempestojn,
Ĉasistoj (laŭ *juanban*) ja ne timas la sovaĝajn
bestojn.*

*Ĉu povas longe regi densa la mallumo?
La revolucio brilos certe kiel suno.*

Tiemej envenas kun korbo sur sia brako.

Tiemej: Avinjo!

Avino: Tiemej!

Tiemej: Avinjo, paĉjo diris, ke tuj venos iu onklo.
Ŝi demetas la korbon.

Avino (al si mem, kun sopiro): Tuj venos iu onklo!

Tiemej: Kial mi havas tiel multe da onkloj, avinjo?

Avino: Multe da fratinoj via avo havis, do vi havas tiom da onkloj.

Avino Li ekflikas veston.

Tiemej: Avinjo, kiu onklo venos hodiaŭ?

Avino: Ne demandu. Vi vidus ĉe lia alveno.

Tiemej: Hm. Eĉ se vi ne diras al mi, avinjo, mi tamen scias.

Avino: Scias? Kion vi scias?

Tiemej: Aŭskultu, avinjo!

(Ŝi kantas laŭ *hipi liuŝuj*)

*Al mia parenkar' sennombraj onkloj apartenas,
Sed sen afero grava ili tamen ne alvenas.*

*Parencoj ili estas, tamen nekonatoj en la vera
senco,*

Sed ili estas karaj pli ol vera sangparenco.

Kaj paĉjo kaj avinjo ilin nomas same per "karulo",

Mi eldivenis ankaŭ iom la sekreton tra l' nebulo:

Al paĉjo ili ja similas,

Ilij koroj ĉiuj ruĝe brilas.

Haste envenas Li Juhe portante la kurieron sur sia dorso, puŝmalfermas la pordon, eniras, signas al Tiemej, ke ŝi fermu la pordon kaj gvatu. Li zorgeme helpas la kurieron sidiĝi kaj donas al li akvon.

Kuriero (rekonsciiĝas): Bonvolu diri al mi, ĉu tie ĉi sin trovas iu komutisto majstro Li?

Juhe: Tiu estas mi.

Li Juhe kaj la kuriero kontrolas reciproke signalvortojn.

Kuriero: Mi estas vendisto de kombiloj.

Juhe: Ĉu vi havas persiklignajn?

Kuriero: Jes. Oni devas pagi per kontanta mono.

Juhe: Bone, atendu momenton.

Li Juhe signas al Avino Li, ke ŝi sondu per la lampo.



Li Juhe alten levas la signal-lanternon kaj sukcese interligiĝas kun la kuriero post interŝanĝo de la signalvortoj. (El la dua sceno)

Avino (levas la petrolan lampon rigardante la kurieron): Samlokano...

Kuriero (vidante ke oni ne donas ĝustan signon): Dankojn, ke vi savis min. Mi devas iri.

Juhe (alte levas la signal-lanternon): Kamarado!

Kuriero (emocie): Jen fine mi trovis vin!

Tiemej transprenas la signal-lanternon kaj ekkomprenas vidante ĝian rolon.

La avino signas al Tiemej, ke ŝi iru eksteren kun la korbo por gvato.

Kuriero: Maljuna Li, mi estas kuriero de Songling-bazloko. (Li elprenas ĉifrolibron el sia ŝuo.) Jen estas ĉifrolibro.

Li Juhe zorge ĝin transprenas.

Kuriero: Ĝin transsendu al la geriltaĉmento sur la Cipres-monto. Morgaŭ posttagmeze iu tranĉil-akrigisto renkontos vin por kontakto en la kaĉvendista budo de la bazaro de eluzitaj objektoj. La signalvortoj estas la samaj kiel antaŭe.

Juhe: La samaj kiel antaŭe.

Kuriero: Maljuna Li, tre malfacila estas la tasko!

Juhe: Trankviliĝu, mi certe ĝin plenumos!

Kuriero: Bone. Urĝas la tempo, maljuna Li, mi devas tuj reiri.

Juhe: Kamarado, ĉu vi fartas?...

Kuriero: Mi ĵus svenis pro falego, nun jam povas piediri.

Juhe: Bone. Momenton, mi ŝanĝu vian veston.

Li Juhe alprenas jaketon kaj la kuriero surmetas ĝin.

Juhe (serioze atentigas): La malamikoj nun ĉie traserĉas, la situacio estas tre streĉa, estu singardema survoje!

Kuriero: Trankviliĝu, maljuna Li!

Juhe: Kamarado...

(Li kantas laŭ *erhuang kuajsanjan*.)

*Vin gardu bone sur la voj' tra altaj montoj
kaj riveroj danĝerplenaj,
La vojo tra l' stratet' kaj l' pont' mallonga
estas voj' kvieta kaj senĝena.
Fidelajn korojn niajn kune ni dediĉu al revo-
lucio—*

Li akompanas la kurieron eliri. Tiemej venas en la domon. (Li kantas daŭre.)

*Kun peza tasko sur la ŝultroj iros mi al provo
en la incendio.*

*Ne restos vana la espero de l' Parti', senfinas
mia energio,*

*Nenio en la mondo fleksos membron de la
Kompartio!*

Aŭdiĝas hurlo de polica aŭto. Li Juhe sagace kaj senhezite signas al la avino blovestingi la lampon.

Li Juhe faras *lianghiang-on** tenante la ĉifrolibron.

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

S C E N O III

ELDANĜERIĜO ĈE LA KAĈVENDISTA BUDO

La sekvantan posttagmezon,

Kaĉvendista budo en la bazaro de eluzitaj objektoj.

Kiam la kurteno leviĝas, popolano C manĝas kaĉon sidante.

Popolanoj A kaj B envenas kaj sidiĝas por preni kaĉon. Proksime de la budo sidas knabino vendanta cigaredojn.

Kun la signal-lanterno en unu mano kaj manĝskatolo en la alia Li Juhe envenas aplombe kaj singardeme.

Juhe (kantas laŭ *hipi jaŭban*):

*Kun la ĉifrolibro en la manĝskatolo,
Por la fraton trovi venas mi al la bazaro.
Mi ĝin nepre sendos al la Cipres-monto,
Malgraŭ ĉia malfacilo, malgraŭ ĉia baro.*

C (stariĝas): Majstro Li!

Juhe: O. (Zorgeme) Ĉu via vundo resaniĝis, maljuna Ĝang?

C: Multe.

Juhe: O. De nun vi devas bone gardi vin!

C: Jes. (Al si mem) En tiu ĉi tempaĉo, japanaj diabloj ne nur veturas senpage per via rikŝo sed eĉ vin batas! Kia tempo!

Popolano C eliras.

Li Juhe iras en la budon kaj pendigas la signal-lanternon sur foston.

A kaj B: Bonan tagon, majstro Li. Sidiĝu ĉi tie.

Juhe (intime): Ne ĝenu vin.

Kaĉvendistino: Bovlon da kaĉo, majstro Li?

Juhe: Bone. Kiel iras via negoco lastatempe, bofranjo?

Kaĉvendistino: Ve! Pli malpli bone. (Ŝi ĉerpas kaĉon kaj donas al Li Juhe.)

Envenas popolano Ĉ.

Ĉ: Mastrino, bovlon da kaĉo. (Li transprenas la bovlon kaj ekmanĝos.) Mastrino, kiel ĝi odoras? Ŝime!

A: He! El distribuita miksitaj farunaĉo!

Kaĉvendistino: Kion fari!

B: Ho ve! (Li elsputas sableron, kiu dolorigis liajn dentojn.) Miaj dentoj!

A: Sablozas la kaĉo!

B: Hm! Oni ja ne traktas nin kiel homojn!

A: Mallaŭte, ke vi ne trafu malfeliĉon!

B: Kiel ĝin manĝi? Kiel vivi!

Juhe (kun profunda simpatio kantas laŭ *hipi liuŝuj*):

*Kiom da kunfratoj grumbblas pro mizero,
Sub ferhufoj baraktadas en furikolero,
Kaj atendas la ekbruon de printempa tondro,
Al buĉisto la heroaj ĉinoj ja ne kiel ŝaf' sin
montros!*

Frue venu nur la fratoj de la Cipres-monto—

Envenas la tranĉil-akrigisto.

Tranĉil-akrigisto (daŭrigas la kanton laŭ *hipi jaŭban*):

Por la fraton trovi serĉas mi en rondo.

Jen lanterno ruĝa alte sendas brilon.

Mi ekkriu: "Kiu volas min akrigi la tranĉilon!"

Juhe (daŭrigas la kanton laŭ *hipi jaŭban*):

La akrigisto la lanternon ja observas,

Kaj l' maldekstran manon signe al mi levas.

Babilŝajnigante mi la signalvortojn diras—

Kiam li estas provonta kontakti kun la tranĉil-akrigisto, subite aŭdiĝas hurlo de polica aŭto, sturme enkuras japanaj ĝendarmoj. Por ŝirmi Li Juhe, la tranĉil-akrigisto intence faligas sian stablon kaj tiel altiras la atenton de la malamikoj al si.

Juhe (kantas daŭre):

Por min savi li la lupojn al si loge tiras.

Sagace kaj aplombe li verŝas la restantan kaĉon en la manĝskatolon dum kantado.

Juhe: Alian bovlon, bofranjo.

Li Juhe lasas la kaĉvendistinon verŝi kaĉon en la manĝskatolon.

Traserĉinte la tranĉil-akrigiston, japanaj ĝendarmoj riproĉas kaj ordonas lin, ke li foriru. Poste ili sin turnas al Li Juhe por lin traserĉi.

Li Juhe sagace etendas mem iniciate la manĝskatolon al japana ĝendarmo por ke li ekzamenu, kaj tiu ĉi forpuŝas ĝin flarinte la ŝiman odoron, kaj post traserĉo mansignas al Li Juhe, ke li foriru.

Li Juhe aplombe prenas la manĝskatolon kaj signal-lanternon, ekridetas, kaj tiel trompinte la malamikojn li malhaste iras al la centro de la scenejo. Poste li sin turnas kaj venke ekmarŝas kun levita kapo.

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

SCENO IV

PERFIDO DE VANG LIAN-GJU

Posttagmeze.

Oficĉambro de Hatojama.

Kiam la kurteno leviĝas, Hatojama telefonas.

Hatojama: Eh, eh!... Ĉu? Rompita?... Eh, ne maltrankviliĝu, la ĉifrolibron mi certe akiros. ... La kazo estu solvita en limigita tempo! Jes Jes! (Li metas la aŭskultilon kaj parolas al si mem.) Terure ruzaj estas la komunistoj! La komandejo apenaŭ trovis ilian malklaran spuron, sed ili tuj rompis ĝin! Ruzegaj estas la komunistoj!

Envenas la kaporalo kaj ĝendarmo-kandidato Hoŭ.

Kaporalo: Raporton: ĉie ni faris traserĉojn, sed ne trovis la elsaltinton. Ni arestis kelkajn suspektindulojn.

Hatojama: Hm! Por kio utilas la suspektinduloj? La saltinto el la trajno estas kuriero de la

Kompartio. Li portas kun si ekstreme gravan ĉifrolibron. Se la ĉifrolibro atingos la gerilan taĉmenton sur la Cipres-monto, ĝi ege malutilos al nia imperio!

Kaporalo: Jes!

Hatojama: Kie estas inspektoro Vang?

Hoŭ: Li venis.

Hatojama: Envenigu lin.

Hoŭ: Jes. (Vizaĝe al la kulisoj) inspektoro Vang?

Envenas Vang Lian-gju kun vundita brako en skarpo. Ĝendarmo-kandidato Hoŭ eliras.

Vang: Via taĉmentestra moŝto! (Li salutas.)

Hatojama: Ho! Brava junulo, vi amaron spertis! En la nomo de la komandejo mi donas al vi triaklasan medalon. (Li fiksas la medalon por Vang Lian-gju.)

Vang: Dankojn al sinjoro taĉmentestro.

Hatojama (kantas laŭ *hipi sanban*):

Se vi fidele penas servi al la imperi,

Vin rekompencos salta promoci.

Proverbo diras: Maro de mizero vaste sin etendas,

Li Juhe kore salutas laborulon. (Ella tria sceno)



Postdorse bordo vin atendas.

Nun vidu, kian vojon (rikanante) prenos vi!

Vang: Viajn vortojn mi ne komprenas, via taĉmentestra moŝto.

Hatojama: Hm! Vi devas kompreni! Diru al mi, ĉu la saltinto el la trajno povis pafi al vi je tri centimetroj for de vi?

Vang: Via taĉmentestra moŝto...

Hatojama: Tuj konfesu, junulo. Kiu estas via komplico?

Vang (pretervole): Komplico!

Hatojama: Jes! Estas tre evidente. Ĉu la saltinto el la trajno estus forfluginta per flugiloj, se li ne havus komplicon por lin helpi kaj ŝirmi?

Vang: Tiutempe mi falis teren trafite de kuglo, via taĉmentestra moŝto, kiel do mi povus scii kiel li forfuĝis?

Hatojama: Vi certe scias. Se vi ne scius, kiel vi faris pafon al vi mem?

Vang Lian-gju surpriziĝis.

Hatojama (kun ĉiam pli granda premo): Tuj diru la veron, junulo, kiu estas subtera komunismo? Kiu estas la komplico? Kie kaŝiĝas la kuriero? En kies mano estas la ĉifrolibro? Konfesu ĉion, kaj mi havas ĉe mi multegon da medaloj kaj premio por vi!

Vang: Via taĉmentestra moŝto, viaj vortoj estas pli kaj pli nekompreneblaj por mi.

Hatojama: Hm...! Do vi bezonas helpon por havigi klarecon al via kapo! Kaporalo!

Kaporalo: Jes.

Hatojama: Lin elportu por doni klarecon al lia kapo!

Kaporalo: Jes. Gardistoj!

Envenas du japanaj ĝendarmoj.

Kaporalo: Elportu lin!

Vang (timas morton kaj petegas absolvon): Via taĉmentestra moŝto...

Kaporalo (diabla): Ba! (Li faligas Vang Lian-gju per piedbato.)

Du japanaj ĝendarmoj preme tenas Vang Lian-gju.

Vang: Mi... estas senkulpa!

Hatojama: Batu!

Kaporalo: Elportu lin! Elportu lin!

Kriante "Mi estas senkulpa", Vang Lian-gju estas eltrenata de du japanaj ĝendarmoj. La kaporalo sekvas ilin.

Hatojama: Hm! Mi malfermos lian buŝon per peza torturo kaj nepre devigos lin eldiri kiu

estas lia komplico!

Envenas la kaporalo.

Kaporalo: Raporton, sinjoro taĉmentestro, li konfesis!

Hatojama: Kiu estas la komplico?

Kaporalo: Komutisto Li Juhe.

Hatojama (montras konatecon): Li Juhe!?!...
Malhelĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

SCENO V

RAKONTO PRI LA REVOLUCIA HISTORIO DE LA FAMILIO

Vespero.

La domo de Li Juhe.

Kiam la kurteno leviĝas, Avino Li sopire atendas Li Juhe en sia domo.

Avino (kantas laŭ *hipi jaŭban*):

Vesper' jam venas, sed ankoraŭ ne la kara filo.

Tiemej envenas el la interna ĉambro. Aŭdiĝas hurlo de polica aŭto.

Tiemej (kantas daŭrige):

La stratoj ĥaos-plenas, kaj pro paĉjo min turmentas maltrankvilo.

Envenas Li Juhe kun la manĝskatolo kaj la signal-lanterno en la manoj kaj ekfrapas je la pordo.

Juhe: Tiemej.

Tiemej: Paĉjo revenas!

Avino: Tuj malfermu la pordon!

Tiemej (malfermas la pordon): Paĉjo!

Avino: Juhe.

Juhe: Panjo!

Avino: Fine vi revenis! Ĉu vi sukcesis interligiĝi? (Ŝi transprenas la signal-lanternon kaj la manĝskatolon.)

Juhe: Ne. (Li demetas sian surtuton.)

Avino: Ĉu io neatendita okazis al vi?

Juhe: Panjo!

(Li kantas laŭ *hipi liuŝuj*)

Dum ĉe l' kaĉbudo mi kontakti l' akriĝiston provis,

El hurla aŭt' japanoj saltis, por traserĉi nin sin movis.

Por ŝirmi min, la akriĝisto ilin al si logis, kaj skatolfunde l' ĉifrolibron kaŝe mi enlokis.

Ĝin trovi ja ne eblis, ĉar per kaĉo mi ĝin kovris.

Tiemej: Kiel bona estas la onklo tranĉil-akriĝisto!

Avino: Juhe, kie estas la ĉifrolibro?

Juhe: Panjo! (Li daŭre kantas intime kaj mal-laŭte.)

Por sekureco, mi kaŝejon novan por ĝi trovis.

Tiemej: Vere lerta vi estas, paĉjo!

Juhe: Sciiĝinte pri la afero, Tiemej, vi devas konscii, ke ĝi estas pli grava ol la vivo, ke ni preferas perdi la kapon ol ĝin malkaŝi! Ĉu vi komprenas?

Tiemej: Mi komprenas!

Juhe: Ha, komprenas! Kiel saĝa estas mia filino!

Tiemej: Paĉjo...

Juhe: Ho...

Pli kaj pli mallumiĝas. Avino Li alportas la petrolan lampon.

Avino: Ho... jen vi patro kaj filino...

Juhe: Panjo, mi devas eliri ankoraŭfoje por ion fari.

Avino: Estu singardema. Revenu frue!

Juhe: Jes. Ne maltrankviliĝu.

Tiemej: Prenu la koltukon, paĉjo. (Ŝi metas ĝin ĉirkaŭ la kolon de Li Juhe.) Revenu frue!

Juhe (ameme): Ne maltrankviliĝu. (Li iras el sia domo.)

Li Juhe eliras.

Tiemej fermas la pordon.

Avino Li zorge purigas la signal-lanternon. Tiemej atente observas.

Avino: Venu, Tiemej, mi rakontu al vi historion pri la ruĝa signal-lanterno.

Tiemej: Jes. (Ŝi ĝoje iras al la tablo kaj sidiĝas.)

Avino (serioze): De multaj jaroj, tiu ĉi ruĝa lanterno lumigas la vojon por ni malriĉuloj, ĝi lumigas la vojon por ni laboristoj! En la pasinteco, via avo ĝin tenis, nun estas via patro kiu ĝin tenas. Infano, de la okazaĵo en la lasta nokto vi sciiĝis, ke ĝi estas nepre necesa je ĉiuj gravaj okazoj. Memoru, ke la ruĝa lanterno estas la trezora heredaĵo de nia familio!

Tiemej: O. La ruĝa lanterno estas la trezora heredaĵo de nia familio?

Konfide rigardante Tiemej, Avino Li iras en la internan ĉambron.

Tiemej prenas la signal-lanternon, ĝin pri-rigardas kaj meditas.

Tiemej (kantas laŭ hipi sanban):

*La ĵusaj vortoj de l' avin' pri ruĝa la lanterno
Ne multas, sed profundan sencon havas en la kerno.*

*Pro kio paĉjon kaj la onklon (laŭ juanban)
ne timigas vivdanĝero?*

Por venki la japanajn invadantojn

*Kaj savi la patrion kaj povrulojn el sufero.
Mi pensas, ke farinda estas tia bon-afero,
Lernindaj por mi vere estas tiaj batalantoj.
Se la deksepan jaron vian, Tiemej, vi jam vidas,
Do kial tamen vi kun paĉjo zorgojn ne dividas?
Se paĉjo vektoportas ŝarĝon de mil-ĝina pezo,
Vi, Tiemej, devas okcent ĝinojn porti, sen eks-
ceso.*

Envenas Avino Li de la interna ĉambro.

Avino: Tiemej, Tiemej!

Tiemej: Avinjo!

Avino: Pri kio vi pensas, Tiemej?

Tiemej: Nenio.

Infano ekploras en la najbara domo.

Avino: Ĉu ne Longĉjo ploras?

Tiemej: Jes ja!

Avino: Ve, denove mankas al ili manĝaĵo! Ni ankoraŭ havas iom da maizfaruno. Tuj portu al ili.

Tiemej: Jes! (Ŝi prenas farunon.)

Envenas Hujlian kaj frapas je la pordo.

Hujlian: Avino Li!

Tiemej: Venas fratino Hujlian.

Avino: Tuj malfermu la pordon por ŝi!

Tiemej: Jes! (Ŝi malfermas la pordon. Hujlian eniras la domon.) Fratino Hujlian.

Avino (zorgeme): Hujlian! Kiel fartas la infano?

Hujlian: Ve! Ĉu ni ankoraŭ havas la eblecon por ĝin kuracigi! En tia jaro, pli kaj pli malmultiĝas homoj, kiuj sin turnas al mi por flikigi kaj lavigi vestojn, kaj ofte mankas al ni greno por du manĝoj kaj nun ni denove havas nenion por kuiri en la kaldrono.

Tiemej: Prenu ĉi tion, fratino Hujlian. (Ŝi donas al ŝi la farunon.)

Hujlian (tre emociiĝas):...

Avino: Prenu jam. Mi ĵus diris al Tiemej, ke ŝi portu ĝin al vi.

Hujlian (prenas la farunon): Tiel helpemaj vi estas al ni!

Avino: Tion ne diru. Kun la muro inter ni, ni estas du familioj. Se ni forigus la muron, ni fariĝus unu familio.

Tiemej: Ni estas unu familio eĉ kun la muro.

Avino: Prave diris Tiemej!

Denove laŭtiĝas la ploro de la infano.

Onklino Tian (vokas post la kulisoj): Hujlian! Hujlian!

Onklino Tian envenas kaj eniras la domon.

Tiemej: Onklino.

Avino: Sidiĝu ĉi tie, ŝia onklino.

Onklino Tian: Ho ne. La infano denove ploras, Hujlian, reiru hejmen por ĝin zorgi. (Vidante la farunon en la manoj de Hujlian, ŝi kortuŝiĝas.) ...

Avino: Unue preparu manĝaĵon por ĝi.

Onklino Tian: Ja ankaŭ vi ne riĉas!

Avino: Hej! (Kun varma koro) Ja ni estas kvazaŭ membroj de unu familio, do ne diru tion!

Onklino Tian: Ni reiru.

Avino: Ne turmentiĝu de zorgoj. Iru malrapide.
Onklino Tian kaj Hujlian eliras.

Tiemej (fermas la pordon): Avinjo, en kia mizero vivas la familio de fratino Hujlian!

Avino: Ho jes. Antaŭe ŝia bopatro laboris kiel portisto de fervojo kaj estis premmortigita de trajno! La japanaj diabloj ne nur ne pagis kompenson al ili, sed eĉ forkaptis ŝian edzon kiel kulion. Tiemej, niaj du familioj estas familioj de laboristoj kun komunaj malamiko kaj sufero kaj ni devas ilin prizorgi laŭ nia plejbleco.

Envenas falsa kuriero kaj frapas je la pordo.

Tiemej: Kiu?

Falsa Kuriero: Ĉu majstro Li loĝas ĉi tie?

Tiemej: Oni serĉas paĉjon.

Avino: Malfermu la pordon.

Tiemej: Jes! (Ŝi malfermas la pordon.)

La falsa kuriero iras en la domon kaj haste fermas la pordon.

Avino: Vi estas ...

Falsa Kuriero: Mi estas vendisto de kombiloj.

Avino: Ĉu vi havas kombilojn el persika ligno?

Falsa Kuriero: Jes. Sed oni devas pagi per konstanta mono.

Tiemej: Bone, atendu momenton!

La falsa kuriero sin turnas por demeti la dusakon.

Tiemej iras por preni la signal-lanternon, sed la avino haste ŝin haltigas kaj levas la petrolan lampon por provi la viron. Tiemej ekkomprenas.

Falsa Kuriero (ekvidas la lampon je sinreturno):
Ho, finfine mi trovis vin! Mil dankojn al la ĉielo, vere malfacile!

Tiemej surpriziĝas kaj poste indigniĝas fortege.

Avino (rimarkas lian ruzon, aplombe): Mastro, tuj montru al ni viajn kombilojn, ke ni elektu!

Falsa Kuriero: Aj! Avino, mi venas por preni la ĉifrolibron!

Avino: Knabino, kion li diris?

Falsa Kuriero: Aj! Ne ŝercu! Avino, la ĉifro-

libro estas tre grava dokumento de la Komunista Partio kaj koncernas la sorton de la revolucio. Tuj ĝin donu al mi!

Tiemej (indigne lin pelas): Hola, kian sensencaĵon vi babilas! Foriru tuj!

Falsa Kuriero: Aj, ne ne ne...

Tiemej: Foriru!

Tiemej puŝas la falsan kurieron el la domo, forte jetas la dusakon en lian sinon kaj brue fermas la pordon.

Tiemej: Avinjo!

La avino haste haltigas ŝian parolon.

La falsa kuriero alvokas per mansigno du spionojn en civilaj vestoj kaj ordonas al ili, ke ili gardu la familion Li. Poste ili eliras en malsamaj direktoj.

Tiemej: Mi preskaŭ estis trompita de li, avinjo!

Avino: Infano, certe iu perfidis nin kaj malkaŝis la sekreton al la malamikoj!

Tiemej: Kion fari, avinjo?

Avino (sekrete): Tuj deprenu la signalon!

Tiemej: Kiun signalon?

Avino: La ruĝa papilio sur la fenestra vitro.

Tiemej (ekkomprenas kun miro): Jes! (Ŝi iras por ĝin depreni.)

Avino: Tiemej! Malfermu la pordon, ke la pordofolio ŝirmu vin de la lumo. Vi deprenu la signalon kaj mi vin ŝirmu per balaado. Rapidu, rapidu!

Tiemej malfermas la pordon kaj Li Juhe paŝegas en la ĉambron. Li fermas la pordon. Tiemej konsterniĝas kaj la balailo falas el la mano de la avino.

Juhe (rimarkante ke okazis io neatendita): Panjo, ĉu incidento okazis al vi?

Avino: Ekstere estas hundaĉoj!

Li Juhe restas tute sentima kaj juĝas la situacion pri la malamikoj.

Avino: Infano! Infano...

Juhe: Panjo, eble mi estos arestita! (Serioze li atentigas.) La ĉifrolibro estas kaŝita sub la memorŝtono apud la maljuna soforo sur la okcidenta riverbordo. Klopodu ĉiamaniere por ĝin transdoni al la tranĉil-akrigisto! La signalvortoj estas la samaj.

Avino: La samaj!

Juhe: Jes. Kaj bone gardu vin!

Avino: Infano, estu trankvila pri tio!

Tiemej: Paĉjo...

Envenas ĝendarmo-kandidato Hoŭ kaj frapas je la pordo.

Hoŭ: Ĉu majstro Li estas hejme?

Juhe: Panjo, ili venas.

Tiemej: Paĉjo! Vi...

Juhe: Iru malfermi la pordon, Tiemej!

Tiemej: Jes!

Hoŭ: Malfermu la pordon!

Tiemej malfermas la pordon, kaj profitante la ŝancon ŝi deprenas la ruĝan papilion.

Hoŭ (eniras la ĉambron): O, do vi estas majstro Li?

Juhe: Jes.

Hoŭ: Sinjoro taĉmentestro Hatojama invitas vin al festeno. (Li transdonas la invitilon.)

Juhe: Ho! Sinjoro taĉmentestro Hatojama invitas min al festeno?

Hoŭ: Jes.

Juhe: Ho, kia honoro! (Malestime li ĵetas la invitilon sur la tablon.)

Hoŭ: Nur por interamikiĝo. Bonvolu iri do, majstro Li!

Juhe: Iru! (firme kaj solene al Avino Li) Panjo, bone gardu vian sanon. Mi foriras!

Avino: Momenton! Tiemej, alprenu vinon!

Tiemej: Jes! (Ŝi prenas vinon.)

Hoŭ: Aj! Vino ja abundas ĉe la festeno kaj sufiĉas por li, maljuna sinjorino.

Avino: Ba!... La malriĉuloj kutimiĝis al la vino sia, kaj ĉiu guto varmon donas al la koro nia. (Ŝi prenas la pokalon el la mano de Tiemej, sin turnas al Li Juhe por lin adiaŭi serioze kaj kun profunda sento.) La pokalon da vino, vi — vi eltrinku, infano!

Juhe (solene transprenas la pokalon): Panjo, kun via vino kiel la bazo, mi povos elteni ĉian ajn alkoholaĵon. (Li eltrinkis per unu tiro.) Dankon, panjo!

(Heroe li kantas laŭ *hipi erliu*)

*Mi trinkas, panjo, vian vinon ĉe l' disiĝa horo,
Je sentimeco de leono plenas mia koro.*

*"Amike" Hatojama min invitas al festeno,
Eĉ mil kaj mil pokalojn povos trinki mi sen peno.
Kapricas la vetero nun, subitas vent' kaj neĝo,
Observu la veteron, panjo, kun atentostreĉo.*

Tiemej: Paĉjo! (Ŝi sin ĵetas al Li Juhe kaj ekploras.)

Juhe (intime kaj signifoplene kantas daŭre):
Atentu, Tiemej, dum kolport', pri ĉia meteoro,



Ĝoje vidante, ke la filino plenkreskiĝis, Li Juhe laŭdas ŝian saĝecon kaj prudentecon. (El la kvina sceno)

*Precize notu ĉiujn "kontojn" en via memoro,
La pordon zorge gardu kontraŭ hundoj post
laciĝo,
De pig' atendu, dum malĝoj', aŭguron pri feliĉo.
Por la dommastrumado vi ne ŝparu vian penon,
Dividu kun avinjo ĉiujn zorgojn kaj ĉagrenon.*

Tiemej: Paĉjo! (Ŝi sin ĵetas en la sinon de Li Juhe kaj ploras.)

Hoŭ: Iru do, majstro Li!

Juhe: Ne ploru, infano, de nun pli bone aŭskultu la vortojn de avinjo.

Tiemej: Jes!

Avino: Malfermu la pordon, Tiemej, ke via patro iru al la "festeno"!

Juhe: Panjo, mi foriras.

Li Juhe kaj Avino Li firme manpremas kaj kuraĝigas unu la alian por persisti en batalo.

Tiemej malfermas la pordon. Forta blovo de vento. Kun levita kapo Li Juhe marŝas grandpaŝe kontraŭ la vento.

Ĝendarmo-kandidato Hoŭ eliras lin sekvante.

Tiemej kuras post ili el la pordo kun la koltuko, kriante "paĉjo!"

Alkuras spionoj A, B, C, kaj baras al Tiemej la vojon.

Spiono A: Haltu! Reiru!

Li perforte devigas ŝin reiri en la domon. La spionoj eniras la domon.

Tiemej: Avinjo!...

Spiono A: Traserĉu! Ne moviĝu!

La spionoj komencas traserĉi malordigante la objektojn. Iu spiono trovas almanakon en la interna ĉambro, ĝin foliumas kaj forĵetas.

Spiono A: Iru!

La spionoj eliras.

Tiemej (fermas la pordon, mallevas la rul-kurtenon de la fenestro kaj ĉirkaŭrigardas la ĉambron): Avinjo! (Ŝi sin ĵetas en la sinon de la avino kaj esploras maldolĉe. Momenton poste.) Avinjo, ĉu mia patro... ankoraŭ povos reveni?

Avino: Via patro...

Tiemej: Paĉjo...

Avino: Tiemej, larmoj ne povas savi vian patron! Ne ploru. Nun mi jam devas rakonti al vi pri nia familio!

Tiemej: Kio, avinjo?

Avino: Sidiĝu kaj mi diros al vi!

La avino fiksrigardas la koltukon kaj revoluciaj pasintaĵoj aperas antaŭ ŝiaj okuloj; malamo al la malamiko pro la malnovaj kaj novaj maljustaĵoj suferitaj bolas en ŝia koro.

Tiemej metas benketon apud la avino kaj sidiĝas.

Avino: Diru, infano, ĉu via patro estas bona?

Tiemej: Bona!

Avino: Sed li ne estas via propra patro!

Tiemej (surpriziĝas): Kio! Kion vi diris? Avinjo!

Avino: Kaj ankaŭ mi ne estas via propra avino!

Tiemej: Ha! Avinjo! Avinjo, kredeble vi malprudentiĝis pro indigno?

Avino: Ne, infano, ni avino, patro kaj nepino ja ne apartenas al la sama familio! (Ŝi starriĝas.) Via familia nomo estis Ĉen, la mia — Li, kaj tiu de via patro — Ĝang! (Ŝi kantas laŭ *erhuang sanban*.)

Dum la pasintaj 17 jaroj ŝtorm' kaj pluv' sova-
ĝis,

*Paroli pri la travivaĵoj mi eĉ ne kuraĝis,
Timante vian molan volon, mi nenion diris,
Al vi rakonti kvankam jam plurfoje mi deziris.*

Tiemej: Diru, avinjo. Mi ne ploros.

Avino (kantas laŭ *erhuang mansanjan*):

*Verŝajne ne revenos al ni de nun via paĉjo,
Kredeble ankaŭ mi jam iros baldaŭ en karceron.
Sendube falos tuj sur viajn ŝultrojn peza ŝarĝo
De la revolucio. Aŭdu nun la nudan veron,
Ne ploru, Tiemej, nek malĝoju, firme staru
en batalo,*

*Lernu de paĉjo, havu ruĝan koron kaj solidan
volon kiel ŝtalo.*

Tiemej: Avinjo, sidiĝu kaj rakontu al mi ĉion!

Tiemej helpas la avinon sidiĝi.

Avino: Ej! Tio estas longa historio! Antaŭe via avo laboris kiel riparisto en la Ĝiang-an-a Inĝeniera Sekcio. Li havis kun si du metilernantojn, el kiuj unu estis via propra patro nomata Ĉen Ĝihing.

Tiemej: Mia propra patro Ĉen Ĝihing?

Avino: La alia estas via nuna patro nomata Ĝang Juhe.

Tiemej: Ho! Ĝang Juhe?

Avino: Tiam la lando estis en ĥaoso pro la bataloj inter militaristoj! Kaj poste, Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio ekgvidis la ĉinan popolon fari revolucion! En februaro de 1923, la laboristoj de la Pekin-Hankoŭ-a Fervojo starigis sian ĝeneralan sindikaton en Ĝengĝoŭ, sed militaristo Vu Pejfu, lakeo de fremdlandaj agresantoj, barbare tion malpermesis. La ĝenerala sindikato donis ordonon kaj ĉiuj laboristoj sur la linio ekstrikis. Pli ol dek mil laboristoj en Ĝiang-an manifestaciis sur stratoj. Ĝuste en tiu nokto, tiel malvarma kaj malluma kiel nun, mi havis



“Mi trinkas, panjo, vian vinon ĉe l’ disiĝa horo, je sentimeco de leono plenas mia koro.”

grandan zorgon pri via avo, ke mi povis nek sidi trankvile nek endormiĝi, kaj flikis veston sub la lampo. Subite mi aŭdis ke iu frapas sur la pordon kaj vokas: “Onklino, tuj malfermu la pordon.” Mi tuj malfermis la pordon. Ho, haste envenis iu homo!

Tiemej: Kiu?

Avino: Ĝuste via patro!

Tiemej: Mia patro?

Avino: Jes, via nuna patro. Lia tuta korpo plenas de vundoj! Lia maldekstra mano tenis tiun ĉi signal-lanternon!

Tiemej: La signal-lanternon?

Avino: Lia dekstra brako ĉirkaŭtenis infanon!

Tiemej: Infanon...

Avino: Infanon malpli ol unu-jaran...

Tiemej: La infano...

Avino: Ĝi estis neniu alia!

Tiemej: Kiu do?

Avino: Ĝuste vi!

Tiemej: Mi?

Avino: Firme premante vin al la sino, kun larmoj en la okuloj, via patro staris antaŭ mi. Li kriis: “Onklino! Onklino!” Li gape min rigardadis kaj longe ne povis diri ion. Kun brula maltrankvilo mi urĝigis lin paroli. Li... li diris: “Mia majstro kaj kunlernanta frato Ĉen... ĉiuj martiriĝis! Tiu ĉi bebo estas ido de frato Ĉen kaj posteulo de la revolucio. Mi vartos ŝin por daŭrigi la revolucion!” Li kriis ripete: “Onklino! ho onklino! De nun mi estas via propra filo kaj la bebo estas via propra nepino.” Kaj poste mi... mi tuj transprenis kaj premis vin firme al mia sino.

Tiemej: Avinjo! (Ŝi sin ĵetas en la sinon de la avino.)

Avino: Tenu vin rekta! Aŭskultu min!

(Ŝi kantas laŭ *erhuang juanban*.)

Pro l’ striko la gepatrojn viajn buĉis kanibaloj,

Li Juhe iris ĉien pro l’ revolucia idealo.

Li ĵuris plue relumiĝi la lanternon ruĝan de signalo.

La sangmakulojn li forviŝis, la mortintojn en-



Li Juhe sagace kaj kuraĝe donis fortajn batojn al la insidema kaj ruza malamiko Hatojama, tiel ke la lasta tute fiaskis. (El la sesa sceno)

*terigis kaj reiris al batalo.
 Bruligas, rabas kaj hombuĉas nune la japana
 banditaro,
 Vi vidis mem, ke vian patron ĵus arestis la
 vandaloj.
 La sangan ŝuldon notu en la kontolibron de
 la koro,
 Pro vi starigu altan celon kun solida volo,
 Igu la malamikon pagi sangan kontraŭ sango
 en egalo!*

Tiemej (kantas laŭ erhuang juanban):

*Rakontis la avino pri l' heroaj, oferemaj revolu-
 cianoj,
 Mi ja naskiĝis kaj kreskadis en sovaĝaj uraganoj.
 La amo en la deksep-jara guvernado, ho avino,
 ja profundas kiel oceano.
 De hodiaŭo, kun okuloj akraj mi strebados
 al la alta celo.
 Mi sangan nepre repostulos pro la sangofero.*

*La posteuloj plu daŭrigos la aferon de l' mar-
 tiroj!
 Mi alte tenas la lanternon ruĝan kun potencaj
 briloj — Paĉjo! (laŭ erhuang kuajban)
 Kiel pinarbo paĉjo estas homo kun plej firma
 volo,
 Li estas brava kompartia membro kun heroa
 koro.
 Sekvante lin kaj senhezite mi antaŭen iras.
 Tenata alte la lanterno ruĝa flagre brilas,
 Por ke la patro en la lumo hommanĝantajn
 bestojn ĉasu.
 Kaj ilin ni, generacio post generaci' frakasu,
 Ĝis finekstermo de l' bestaĉoj ni la batalejon
 ne forlasu!*

*Alte tenante la signal-lanternon, Tiemej kaj
 la avino faras lianghiang-on. Ruĝa brilo disradias.
 Malheliĝas la scenejo.*

— **La kurteno falas.**

LUKTO KONTRAŬ HATOJAMA
ĈE LA FESTENO

Tuj post la lasta sceno.

Gastoĉambro de Hatojama. Sur la tablo estas aranĝita festeno.

Kiam la kurteno leviĝas, envenas ĝendarmokandidato Hoŭ.

Hoŭ: Bonvolu enveni, majstro Li.

Li Juhe envenas nehaste kaj aplombe per firmaj paŝoj. Ĝendarmokandidato Hoŭ eliras.

Juhe (kantas laŭ *erhuang juanban*):

Kaŝiĝas en la invitilo venenita sago,

La subitaĵon certe kaŭzis perfidula ago.

Ridinde — aranĝita inter la glavoj la festeno,

Mi kun revolucia koro staras roke antaŭ mal-amiko sen sinĝeno.

Kun kor' revolucia traktos mi aplombe l' mal-amikojn firme kiel monto.

Envenas Hatojama.

Hatojama: Ho, malnova amiko, kiel vi fartas?

Juhe: Ho, kiel vi fartas, sinjoro Hatojama?

Hatojama volas manpremi kun Li Juhe, sed la lasta kvazaŭ ne vidas lin. Hatojama embarase retiras sian manon.

Hatojama: Ho! Finfine ni renkontiĝas denove!

Antaŭe mi kuracis vin en la Fervoja Hospitalo, ĉu vi ankoraŭ memoras?

Juhe: O, tiam vi estis riĉa japana doktoro, dum mi ĉina malriĉa laboristo. Ni estis irantaj, kiel "trajnoj sur du trakoj", ne la saman vojon!

Hatojama: Ej! Malgraŭ ĉio, tamen ni ne interamikiĝas nove!

Juhe (ŝajne komplimenteme): Se tiel estas, do favoru min per via prizorgo!

Hatojama: Tial mi invitis vin ĉi tien por sate interbabili. Nu, sidiĝu, sidiĝu. Malnova amiko, hodiaŭ estas privata festeno, kaj ni parolos nur pri amikeco kaj ne tuŝos aliajn aferojn, ĉu bone?

Juhe (respondas aplombe por sondi la malamikon): Mi estas malriĉa laboristo kaj ŝatas rektan parolon. Diru kion vi volas!

Hatojama: Bone! Bone! Venu, malnova amiko, unue eltrinku pokalon.

Juhe: Vi ja estas tro ĝentila, sinjoro Hatojama.

Mi tre bebaŭras, ke mi ne povas trinki vinon! (Li puŝas flanken la pokalon, elprenas sian pipon kaj komencas fumi.)

Hatojama: Ne povas? Ej! Estas malnova ĉina diro, ke la homa vivo estas kvazaŭ sonĝo, ĝi forpasas en palpebrumo. Ĝuste kiel oni diras: "Ni devas kanti antaŭ vino, ja kiom longas nia vivo?"

Juhe (malestime blovestingas la alumeton): Ho jes, ĝui muzikon kaj preni bonan vinon ja estas vivo de feoj. Mi deziras al vi tian ĝuon en ĉiu tago kaj "longan vivon", sinjoro Hatojama. (Ironie li ĵetas la alumeton sur la plankon.)

Hatojama: Ej... (ekridas embarase) Malnova amiko, mi kredas budhismon. La sutro diras: "Maro de mizero vaste sin etendas, kaj postdorse bordo vin atendas!"

Juhe (rebate): Mi ne kredas budhismon. Mi tamen aŭdis alian diron: "Se dio altas unu futon, dek futojn kreskas diablo!"**

Hatojama: Bone! Bone dirite! Malnova amiko, tio, kion ni diris, ja temas nur pri ia kredo. Sed efektive la plej altan kredon oni povas resumi per du vortoj.

Juhe: Du vortoj?

Hatojama: Jes.

Juhe: Kiuj nome?

Hatojama: "Por mi".

Juhe: O, por vi!

Hatojama: Ne, por si mem.

Juhe (ŝajnigas nekomprenon): "Por si mem"?

Hatojama: Jes. Malnova amiko, "La ĉielo rui-nigas tiun, kiu agas ne por si mem!"

Juhe: Kio? La ĉielo ruinigas eĉ tiun kiu agas ne por si mem?

Hatojama: Jes, tio estas la ŝlosilo de la socia vivo.

Juhe: O! Oni eĉ devas havi ŝlosilon por vivi en la socio?

Hatojama: Ja ĉiu afero havas sian ŝlosilon.

Juhe: Ha, sinjoro Hatojama, via ŝlosilo estas tamen tro malfacile komprenebla por homo kia mi!

Hatojama surpriziĝas.

Hatojama: Malnova amiko, ne ŝercu! Bonvolu min helpi!

Juhe: Mi estas malriĉa laboristo, pri kio mi povus vin helpi?

Hatojama: Lasu, ne plu ĉirkaŭparolu, tuj donu al mi la objekton!

Juhe: Kion?

Hatojama: La ĉifrolibron!

Juhe: Ha... kio estas tio? Mi scipovas nur manipuli komutilon, sed neniam ludis kun tio!

Hatojama (minace): Malnova amiko, se vi volas trinki ne vinon honoran sed punan, do ne riproĉu min pri manko de amikeco!

Juhe (aplombe): Do laŭ via plaĉo!

Hatojama donas signon kaj Vang Lian-gju envenas.

Hatojama: Malnova amiko, vidu, kiu li estas!

Sub la fulme brila rigardo de Li Juhe, Vang Lian-gju kuntiriĝas kaj timtremas.

Hatojama signas al Vang Lian-gju, ke li admonu Li Juhe, ke li kapitulacu.

Vang: Maljuna Li, ne estu...

Juhe: Fermu vian buŝaĉon!

Vang: Maljuna Li, ne estu tro rigida...

Juhe (frapas la tablon, saltleviĝas kaj indigne riproĉas lin montre en la vizaĝon): Senhonta perfidulo! (Li kantas laŭ *hipi kuajban*.)

Ho, vi senhonta besto, perfidulo, renegato, Timante morton vi preferas eĉ kapitulacon. Pri malamika koruptado, logo kaj minaco, Mi ĉiam atentigis vin zorgeme en ripetado! Al la revolucio vi ja ĵuris pri fidelo,

Kial vi nun kunkrimas en la malamika celo? Vi al la malamiko kiel hundon vin forvendas, Kaj tiun hontindaĵon vi rigardas kiel gloron! Sed je la fino, certe vin kondamnos la popolo, Pro la perfido jam severa puno vin atendas!

La revolucia heroa spirito de Li Juhe timtremigas la perfidulon tiel, ke li sin kaŝas post la dorso de Hatojama.

Hatojama (memkontente): Ej! malnova amiko, ne koleru. Ho... (Li mansignas al Vang Lian-gju, ke li eliru.) Malnova amiko, mi ja ne volis elmeti tiun ĉi atuton, sed vi puŝis min al senelirejo, mi do povis fari nenion alian ol tion!

Juhe (rebatas senkompate): Hm! Mi antaŭvidis, ke vi tion faros! Via atuto, tamen, estas nur hundaĉo kun rompita spino! Mi ne povos kontentigi vin, sinjoro Hatojama!

Hatojama (montras sian diablajn vizaĝojn post fiasko de sia ruzo): Li Juhe, mian okupon vi certe konas? Mi estas homo, kiu speciale okupiĝas pri dono de pasporto al irantoj al la infero!

Juhe (pinto-kontraŭ-pinte): Hm! Ĉu mian okupon vi ankoraŭ ne konas? Mi speciale okupiĝas pri malkonstruo de via infero!

Hatojama: Sciu, ke miaj torturiloj neniam abs-

tinias je homa karno!

Juhe (malestime): Hm! Tion mi jam spertis antaŭlonge!

Hatojama (kun vana espero timigi): Li Juhe, prenu mian konsilon kaj frue returniĝu, por ke viaj ostoj ne disrompiĝu!

Juhe (subigante la malamikon): Mi preferas disrompiĝon de la ostoj ol returniĝon!

Hatojama: Senkompataj estas la torturiloj de la ĝendarma taĉmento. Sindeteno de ili signifas vivon kaj aliro al ili signifas morton.

Juhe (decideme kaj forte emfazante ĉiun vorton): La komunistoj havas ŝtalan volon, kaj rigardas morton kiel hejmeniron! Hatojama! (Li forte kondamnas la japanan banditon, kantante laŭ *hipi juanban*.)

*Denaskaj lupoj, vi militarismaj fijapanoj
Naturon bestan kovras per rid-fizionomio.
Invadas vi patrion nian, buĉas popolanojn,
(laŭ *kuajban*)*

*Kaj tamen pribabilas "kunprosperon de la
Orient-Azio"!
Popolon en leviĝo gvidas Prezidanto Maŭ kaj
Kompartio,
Centmilionoj brave ekbatalas pro l' nacio.
Vi revas venki per la perfidula koluzio,
Sed kiel elakvigo de la luno, tio restos fantazio.*

Hatojama: Gardistoj!

Envenas la kaporalo kaj du japanaj ĝendarmoj.

Hatojama (kantas laŭ *hipi sanban*):

Per miaj torturiloj mi regalos vin ĝissate!

Kun alta batalvolo Li Juhe faras *lianghiang-on*.

Juhe (rikanas): Hm...

Kaporalo: Iru!

Juhe (kantas laŭ *hipi sanban*):

Vi povas nur masaĝi mian korpon rezultate!

Kaporalo: Forportu lin!

La du japanaj ĝendarmoj eltiras Li Juhe.

Juhe: Mi ne bezonas vian servon!

Li Juhe iom svingas sian brakon kaj la du ĝendarmoj retropaŝas strumble.

Li Juhe trankvile butonumas, prenas sian ĉapon kaj per frapetoj forigas polvon de sur ĝi; li metas post la dorson siajn manojn tenantajn la ĉapon, sinturnas kaj eliras grandpaŝe kun heroa spirito subiganta ĉiujn malamikojn.

La kaporalo kaj la du japanaj ĝendarmoj lin sekvas.

Hatojama (tute venkita en spirito kaj malespere): Terure!

(recitativo laŭ *puĉeng-e*)

*Kial la komunistoj malmolegas pli ol ŝtalo?
Fiaskis ambaŭ miaj logo kaj minaco en realo.*

*Mi nur esperas, ke konfesos li post peza
torturado —*

Envenas la kaporalo.

Kaporalo: Raporton, Li Juhe preferas morton ol konfeson!

Hatojama: Preferas morton ol konfeson?

Kaporalo: Sinjoro taĉmentestro, mi iru kun kelkaj homoj al lia domo por traserĉi ankoraŭfoje!

Hatojama: Senutile. Tre singardemaj estas la komunistoj, kredeble ili jam ŝanĝis la kaŝejon!

Kaporalo: Jes!

Katojama: Enportu lin!

Kaporalo: Portu Li Juhe ĉi tien!

Du japanaj ĝendarmoj envenas trenante Li Juhe. Li Juhe havas sur si vundojn kaj sangmakulojn; kun impona heroa spirito, li alproksimiĝas al Hatojama, turnas sian korpon kaj rekte staras sin apogante per mano sur seĝo.

Juhe (kantas laŭ *hipi daŭban*):

Bandito Hatojama, hom' kun lupa koro!

Hatojama: Donu la ĉifrolibron!

Juhe: Hatojama!

(Li daŭre kantas laŭ *hipi kuajban*.)

Per ĉiuj torturiloj vi turmentis min kruele;

Sed fajran flamon ja ne timas vera oro,

Neeblas absolute min subigi tiucele!

Ha...

Lia impona heroa spirito konsternas la malamikojn.

Li Juhe faras *lianghiang-on*.

Malheliĝas la scenejo.

— **La kurteno falas.**

SCENO VII

HELPO DE AMASO

Post kelkaj tagoj. Antaŭtagmeze.

Interne kaj ekstere de la domo de Li Juhe.

Kiam la kurteno leviĝas, spiono alivestita kiel botisto sidas ne malproksime de la pordo por observi la familion de Li Juhe.

Aŭdiĝas krio de la tranĉil-akrigisto en malproksimo: "Tranĉilojn kaj tondilojn mi akrigas!" kaj poste li envenas.

Li krias ankoraŭfoje, singardeme ĉirkaŭrigardas kaj rimarkas, ke la signalo estas forprenita kaj estas spiono, li decidas kontakti je estonta ŝanco.

Samtempe, aŭdinte la krimon la avino kaj Tiemej venas el la interna ĉambro kaj atente rigardas ekster la fenestron.

La tranĉil-akrigisto eliras kriante laŭkutime.

La spiono ŝtele observas sed rimarkas nenion suspektindan.

Avino: Tiemej, la tranĉil-akrigisto eble venas por kontakto!

Tiemej: Avinjo, mi iru kun la ruĝa lanterno por serĉi lin, kaj esplori ĉu li estas nia homo.

Avino: Tion vi ne povas fari. Estas hundaĉo ekstere, vi ne povas eliri!

Tiemej: Ho! Jes ja, kiel do mi povas eliri? (Ŝi pripensas.) Avinjo, mi ekhavas ideon! Mi eliros tra la domo de fratino Hujlian!

Avino: Kiamaniere? mia infano.

Tiemej: Antaŭ kelka tempo, ŝtono en la bazo de la muro sub la lito malfirmiĝis, kaj dum mi helpis paĉjon ĝin masoni, mi formovis la ŝtonon kaj eĉ rampis lude tra la truo en la najbaran domon!

Avino: Kio? Vi eĉ rampis tra ĝi!

Tiemej: En la alia flanko de la muro estas la ĉambro de fratino Hujlian!

Avino: Bone! Do petu ilian helpon kaj iru tra ilia domo! Tiemej, ĉu vi bone memoras la signalvortojn, kiujn via patro diris?

Tiemej: Mi bone memoras.

Avino: Bone. Post kiam vi atingos la tranĉil-akrigiston kaj sukcesos kontakti kun li post kontrolo de la signalvortoj, vi tuj iru al la memorŝtono apud la maljuna soforo sur la okcidenta riverbordo por preni la ĉifrolibron!

Tiemej: Sub la memorŝtono apud la maljuna soforo?

Avino: Mia infano! Ĉu vi ne aŭdis de via patro pri tio? Permesu al vi neniom da neglektemo!

Tiemej: Trankviliĝu, avinjo!

Avino: Gardu vin!

Tiemej: Jes.

Tiemej prenas la signal-lanternon, eniras la internan ĉambron kaj eliras el la scenejo.

La botisto volas fumi, sed trovas sian alume-tujon malplena. Li forjetas ĝin kaj iras al la pordo kaj ekfrapas sur ĝi.

Botisto: Malfermu la pordon!

Avino: Kiu?

Botisto: Mi, la botisto.

Avino: Momenton! (Ŝi malfermas la pordon.)

Botisto (eniras la domon): Maljuna sinjorino.

Avino: Kion vi volas?

Botisto: Alumeton.

Avino: Prenu de sur la ŝranko.

Botisto: He, kie estas la knabino, maljuna sinjorino? (Li bruligas sian cigaredon.)

Avino: Ŝi malsaniĝis.

Botisto: Malsaniĝis? Kie ŝi estas?
Avino: Ŝi kuŝas en la interna ĉambro.
Botisto: O! Bone, dankon. (Li iras el la domo.)
Avino: Hundaĉo!

La botisto venigas du spionojn per mansigno kaj flustras al ili. Kiam la avino estas fermanta la pordon, la du spinoj puŝe malfermas la pordon kaj eniras la domon.

Avino: Kion vi volas?
Spiono B: Kontrolu la loĝantojn!
Spiono A: Kie estas via nepino?
Avino: Ŝi malsaniĝis.
Spiono B: Malsaniĝis? Kie ŝi estas?
Avino: Ŝi kuŝas en la interna ĉambro.
Spiono B: Diru, ke ŝi ellitiĝu.
Avino: La infano malsaniĝis, do lasu, ke ŝi iom ripozu.
Spiono B: Flanken! (Li tiras la avinon flanken kaj volas levi la pordokurtenon.)

Aŭdiĝas voĉo post la kurteno: "Avino, kiuj estas tie?"

Avino: Kontrolistoj pri loĝantaro!
La du spinoj rigardas senhelpe unu al la alia, iras al la pordo kaj eliras. La avino fermas la pordon, sin returnas kaj rigardas kun miro.

Hujlian venas el la interna ĉambro.

Avino: Ah! Kiel vi venas, Hujlian?
Hujlian: Avino Li!
(Ŝi kantas laŭ *hipi liuŝuj*.)
*Sekure Tiemej jam foriris tra la domo nia,
Por vin informi mia bopatrino min alsendis.
Ĉar vin pridemandis la spinoj je alveno mia,
Por trompi ilin mi tuj sur la lito min etendis.
Tra mia domo Tiemej retropasos je reveno,
Kaj ŝin mi ŝirmos. Do ne turmentigu de ĉagreno.*

Avino (dankeme): Grandegan helpon vi donis al ni!

Tiemej venas el la interna ĉambro.

Tiemej: Avino! Fratino Hujlian!
Hujlian: Fine vi revenas, Tiemej!
Avino: Se ne estus la helpo de Hujlian, nin trafus katastrofo.
Hujlian: Estas bone ke vi revenis. Nun mi jam devas reiri.

Tiemej: Dankojn al vi!
Hujlian iras en la internan ĉambron kaj eliras.

Avino: Tiemej, tuj reordigu la lokon!
Tiemej iras en la internan ĉambron. La avino pendigas la signal-lanternon. Tiemej venas denove el la interna ĉambro.

Avino: Mia infano, ĉu vi trovis la tranĉil-akri-giston?

Tiemej: Ej! Mi traserĉis plurajn stratojn sed ne trovis lin. Timante, ke la spinoj rimarkos mian foreston, mi do haste revenis!
Avino: O!

Envenas ĝendarmo-kandidato Hoŭ. Li ordonas ke la botisto foriru, kaj frapas sur la pordon.

Tiemej: Kiu?
Hoŭ: Sinjoro taĉmentestro Hatojama venas vidi vin.
Tiemej: Avinjo!
Avino: Se mi estos arestita, Tiemej nepre klopodu ĉiamaniere por elpreni la ĉifrolibron kaj ĝin sendu al la Cipres-monto!
Tiemej: Liberiĝu de zorgo pri tio!
Hoŭ: Malfermu la pordon!
Avino: Iru malfermi la pordon!
Tiemej: Jes! (Ŝi malfermas la pordon.)

Envenas Hatojama kaj eniras la domon. Ĝendarmo-kandidato Hoŭ lin sekvas kaj staras flanke servprete.

Hatojama: O, kiel vi fartas, maljuna sinjorino?
Avino: Ĉu vi estas sinjoro Hatojama?
Hatojama: Ne tiom ĝentile, mi estas Hatojama.
Avino: Atendu momenton kaj mi iros kun vi post ordigo!
Hatojama: Ho, ne por tio mi venas. Maljuna sinjorino, Li Juhe diris, ke li donis ion al vi. Ĉu ne?

Avino: Kion?
Hatojama: Ĉifrolibron!
Avino: Knabino, kion li diris?
Hatojama: Iun libron.
Avino: Libron?
Hatojama: Jes.

Avino: Sinjoro Hatojama.
(Ŝi kantas laŭ *hipi juanban*.)
*En frosto kaj malsato vivas nia familio,
Analfabetaj estas ni de tri generacioj,
Kial konservas ni la libron, kiu ja utilas por nenio?*

Hatojama (kantas daŭrige):
Li Juhe klare tion diris, ĉu li trompis min ĉikane?
Tiemej (kantas daŭrige):
Do lasu lin mem preni ĝin, por kio vi klopodu vane!

Hatojama: Nu, sufiĉe jam! Se vi donos al mi la libron, Li Juhe povas tuj reveni hejmen kaj li estos nomita vicsekciestro. Mi garantios al vi kaj riĉon kaj gloron.
Avino: Hm!
(Ŝi kantas daŭrige.)
Riĉo kaj gloro kiel polvo por mi senvaloras,

*Al malriĉuloj, simpla manĝo jam tre bon-
odoras.*

*Ĉar vi alvenas laŭ kaprompe elpensita plano —
(al Tiemej) Provu serĉi por li.*

Tiemej iras en la internan ĉambron, revenas
kun almanako kaj ĝin donas al la avino.

Avino (kantas daŭre vizaĝe al Hatojama):

Ĝin prenu, por ke vian penon ne sigelu vano.

Ŝi donas la "libron" al Hatojama.

Hatojama: Jes! Ĝuste ĝi! Ĝuste ĝi! Alma-
nako? (Li foliumas.) Mi ĝin kunportos por
esplori. Ĉu vi iru vidi vian filon, maljuna
sinjorino?

Avino: Bone! Tiemej, bone zorgu pri la domo!

Hatojama: Ne! Ankaŭ la knabino iru kune!

Tiemej: Avinjo, ni iru!

(kantas laŭ *hipi sanban*.)

Kuraĝa kiel paĉjo, nenion mi timos en batalo —

La avino kaj Tiemej iras el la domo.

Hatojama ilin sekvas. Ĝendarmo-kandidato
kaj spiono sigelas la pordon per paperslipoj.

Avino (kantas daŭrige):

*Por revoluciuloj netiminda estas ja tertremo kiel
ĉielfalo!*

La avino kaj nepino brave marŝas antaŭen.
Ili faras *lianghiang-on*.

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

SCENO VIII

LUKTO SUR LA EKZEKUTEJO

Nokto.

Angulo de la malliberejo de la ĝendarma
taĉmento de japanaj agresantoj.

Kiam la kurteno levigas, la kaporalo kaj
ĝendarmo-kandidato Hoŭ staras servopretaj. En-
venas Hatojama.

Hatojama: Evidente la ĉifrolibron ni ne povos
akiri per publika esplordemando. Kiel estas
la subaŭskultilo?

Hoŭ: Jam instalita.

Hatojama: Bone, ni aŭskultu kion la maljunulino
kaj ŝia filo diros, kiam ili renkontiĝos. Eble ni
trovos ian spuron. Alportu la maljunulinon!

Hoŭ: Jes! (Vizaĝe al la kulisoj) Venu!

Envenas la avino.

Hatojama: Maljuna sinjorino, ĉu vi konas tiun ĉi
lokon?

Avino: La sidejo de la ĝendarma taĉmento!

Hatojama: Via filo levigis de ĉi tie al la paradizo!
Se iu faris krimon, avino, kaj lia patrino rifuzas



*Tiemej firme decidis daŭrigi la aferon de sia patro kaj
batali kontraŭ la malamikoj ĝis la fino. (El la oka sceno)*

savi lian vivon, dum ŝi tion povas, ĉu tiu patrino
ne estas tro kruela!

Avino (kondamnas la kruelan krimulon juste
kaj severe): Kian absurdaĵon vi diris! Vi
arestis mian filon senkaŭze kaj vi eĉ volas
lin mortigi. Estas vi, kiuj krimas! Estas
vi, kiuj estas kruelaj! Vi buĉas ĉinojn, ĉu
vi volas ankoraŭ ke ili respondecu pri tio?
Kaj ankaŭ mi maljunulino?

Hatojama: Bone! Iru vidi vian filon!

La avino eliras senhezite. Hatojama signas
al ĝendarmo-kandidato Hoŭ, ke li sekvu ŝin.

Hatojama: Portu Li Juhe al la loko!

Kaporalo: Alportu Li — Ju — he!

Mallumiĝas kaj ŝanĝiĝas la sceno.

Parto de ekzekutejo: ĉirkaŭmuro, alta deklivo,
gigantaj pinarboj. En malproksimo altas montoj
nubskrapantaj.

Juhe: (kantas post la kulisoj laŭ *erhuang daŭban*)

Je hurla voko de l' gardisto mi elpaŝas (Li envenas kaj faras lianghiang-on.) el la ĉelo.

Du japanaj ĝendarmoj paŝas al Li Juhe kaj lin puŝas. Li Juhe, kun netuŝebla justeco, staras kiel firma roko. Li sin movas al unu flanko sur ambaŭ piedoj per alterna movetado de la piedpintoj kaj kalkanoj kaj poste moviĝas dorsflanken sur unu piedo sammaniere kaj haltas. Poste li sinturnas sur unu piedo kaj faras *lianghiang-on* eksvingante alten unu gambon. Li paŝas antaŭen sentime kaj la du japanaj ĝendarmoj retropaŝas sub lia premo.

Li Juhe palpas la vundojn sur sia brusto, metas unu piedon sur ŝtonon kaj masaĝas sian genuon; malestime li rigardas la feran ĉenon kaj montras sian ĝisĉiele altan heroan spiriton.

Juhe: (kantas laŭ *hujlong*)

*Kvankam mi estas en katen' kaj ĉen' el fero
Kaj miaj manoj kaj piedoj restas sen libero,
Sed neligeblas mia brava volo alta ĝis ĉielo!*

Li sentas doloregon en la vunditaj gamboj, moviĝas dorsflanken sur unu piedo, masaĝas sian gambon kaj faras *lianghiang-on* svingante alten unu gambon.

Juhe (kantas laŭ *juanban*):

*Bandito Hatojama, por akiro de la ĉifrolibro,
Turmentis min per ĉia torturilo,
Sed post la ostrompo, karnoŝiro
Ankoraŭ pli firmiĝis mi en volo kiel viro.
Irante al l' ekzekutej' kun brust' elstarigita,
Mi ekrigardas foren kaj ekvidas:
Revoluciaj ruĝaj flagoj alte flirtas,
Kaj la kontraŭjapana militfajro ĉie disvastiĝas.
Japanaj agresantoj! Kiom da tagoj ankoraŭ
povos daŭri via tiranado!
Cent floroj pompos (laŭ mansanjan) post for-
paso de la fulmotondro,
Ĉinio nova kvazaŭ la matena suno brilos tra
la tuta mondo.
Kaj tiam, ruĝaj flagoj flirtos ĉie tra la lando.
Ĉe penso pri ĉi tio, kreskas mia fido, plifirmiĝas
mia batalvolo!*

(laŭ *juanban*)

*Mi kontribuis tro malmulte al Partio mia en
laboro,
Plej min ĉagrenas tio, ke la ĉifrolibro ne atingis
Cipres-monton.*

*Vang Lian-gju kontaktadis nur kun mi en solo,
Do, li perfidi aliulojn ja ne povas.*

*Miaj patrino kaj filino, same kiel mi mem,
estas plenaj de fidelo,*

*Bandito Hatojama, serĉu vi tra l' tero kaj
ĉielo,*

*La ĉifrolibron tamen vi neniam trovos.
La revoluciuloj brave marŝos rekte al la celo!*

Envenas Avino Li.

Avino: Juhe!

Juhe (rigardas returne): Panjo!

Avino (sin ĵetas al Li Juhe por lin subteni. Ŝi kantas laŭ *erluang sanban*):

*En palpebrumo pasis deksep jaroj, antaŭ mi
jen reaperas*

*Malnovaj scenoj de suferoj klasaj kaj naciaj.
La, la . . . japan-banditoj tiel insidemaj kaj
kruelaj*

*Vin batis ĝis vundiĝo tra la la tuta korpo . . .
ho ve, filo mia!*

Juhe: Ne ĉagreniĝu, panjo!

Avino (kantas daŭre):

*Havante tian bonan filon, ne malĝojas panjo
via!*

Juhe: Mia bona patrino!

(Li kantas laŭ *erhuang erliu*.)

*Instruas la Partio, ke mi estu nefleksebla ŝtala
homo,*

*Mi luktos malcedeme kontraŭ la japan-demonoj.
Nenion mi ja timas, nek ostrompon nek ŝirvun-
don,*

*Mi pretas en karcero sidtruigi ĝian fundon.
Doloras mia koro, ĉar nun sangas la patrio.
Suferas la popolo, kaj indigno flamas en mi
kiel incendio.*

*Kiel ajn danĝerplenas vojo la revolucia,
Antaŭen sturmas ni mortspite unuj post aliaj!
Eĉ se mi mortos, mi bedaŭron sentas en nenio,
Escepte de la "ŝuldo" nepagita, (Li mangeste
aludas la ĉifrolibron.) kiu estas zorgo mia.
Kiel mi volas aĝle flugi en l' aero,
Kaj tuj alveni en favora vento al la monto,
Por savi la popolon en centmilionoj el sufero!
Por la revolucio kun volonto iros mi al vivofero!*

Ĝendarmo-kandidato Hoŭ envenas kun du japanaj ĝendarmoj.

Hoŭ: Maljunulino, sinjoro taĉmentestro Hatojama invitas vin al li por interparolo!

Avino (al Li Juhe): Mia infano, mi ja scias, kion li diros!

Hoŭ: Iru!

Avino Li eliras sentime. Ŝin sekvas la du japanaj ĝendarmoj.

Hoŭ: Alportu Li Tiemej!

Urĝe envenas Tiemej.

Tiemej: Paĉjo . . .

Ĝendarmo-kandidato Hoŭ eliras.

Tiemej (kantas laŭ *erhuang sanban*):

*Sopiris mi tagnokte vidi vin, ho paĉjo,
Kaj vi . . . sangmakulita kun vizaĝo vund-
plena . . . paĉjo!*

Juhe: Ne ploru, mia infano! (Li karese palpas la harojn de Tiemej kaj diras decideme.) Rektigu vin, mia infano! (Li helpas Tiemej stariĝi kaj diras kun profunda sento.) Infano mia! (Li kantas daŭre.)

*Jam dek sep jarojn mi sekreton kaŝi de vi penis,
Eldiri ĝin mi foje kaj refoje min retenis.*

Mi . . .

Tiemej (haste lin interrompas): Ne diru plu, vi ja estas mia propra patro! (Ŝi surgenuiĝas.)

(Ŝi kantas laŭ *erhuang gunban*.)

*Mi ne bezonas, paĉjo, vian prirakonton,
De l' dek sep jaroj mi jam konas la amaran
fonton.*

Li Juhe helpas Tiemej stariĝi kaj liaj sentoj ondegas.

Juhe (kantas daŭre laŭ *erhuang juanban*):

*Laŭ onidiro, plej valoras amo inter sanga paren-
caro,*

*Mi trovas tamen: Nur klasamo de proletoj
restas sen komparo.*

*Batalis mi proleto dum la tuta vivo mia
Kaj ĉien migris dum jardekoj en mizero ĉia.*

*Mi havis nur lanternon ruĝan, kiun mi kun-
portas ĉiam,*

Vi ĝin akceptu kaj forlasu ĝin neniam.

Tiemej (kantas laŭ *erhuang kuajsanjan*):

*Al mi vi donas, paĉjo, netakseblan la trezoron,
Kiu lumigos ĉiam brile antaŭ mi la vojon,*

*Ĉar noblajn virtojn paĉjo al mi heredigis,
Mi ĉiam staros firme kiel roko plej solida;*

*Ĉar altan saĝon paĉjo al mi heredigis,
Neniam mi trompiĝos akravida;*

*Ĉar sentimecon paĉjo al mi heredigis,
Kuraĝas mi batali kontraŭ tigroj kaj ŝakaloj.*

*Kaj la lanterno ruĝa ĉiam brilos en la familio,
Por la riĉaĵon porti ne sufiĉas eĉ mil ĉaroj,*

*Kaj ne sufiĉas, mia paĉjo, eĉ mil vagonaroj!
Mi bone konservados ĝin ĉe mi.*

Juhe (kantas laŭ *erhuang sanban*):

*Jangzi-rivero senĉese ondas kaj torentas,
Jen heredanto de l' lanterno nia sin prezentas.*

(al Tiemej)

Se vi bonŝance al la hejm' reiros,

*Vin turnu al parencoj por vivteni kaj la "ŝuldon
pagi" (Li aludas mansigne la ĉifrolibron.)*

— tiam mi trankvilos.

Japanaj ĝendarmoj envenas alpuŝante avinon

Li. Envenas la kaporalo.

Kaporalo: Sinjoro taĉmentestro Hatojama donas al vi la lastajn kvin minutojn por pripensi. Se vi ne donos la ĉifrolibron, vi ĉiuj estos pafmortigitaj! (Li altiras Tiemej.) Nur las-

taj kvin minutoj restas, knabino! Se vi donos la ĉifrolibron, via tuta familio povos resti viva! Ĉu vi komprenas? Diru!

Tiemej decideme reiras inter la patron kaj avinon.

Kaporalo: La ĉifrolibron!

Tiemej: Mi . . . ne . . . scias!

Kaporalo: Ĉiujn mortpafu!

Japanaj agresantoj: Jes!

Juhe: Ne tiel arogantu! Tiemej, ni subtenu la avinon kaj iru kune!

Eksonas la muziko de *La Internacio*. Brako-en-brake ili triope brave kaj senŝanceliĝe marŝas antaŭen kun levita kapo sur la altan deklivon.

Envenas Hatojama.

Hatojama: Momenton! Mi donas al vi ankoraŭ unu lastan minuton, por ke vi pripensu refoje!

Juhe (kun heroa spirito): Hatojama! Ne estas tute ekstermeblaj la ĉina popolo kaj la ĉinaj komunistoj. Mi konsilas al vi bone pensi pri via fino!

Hatojama: Tro terure! (Al la kaporalo) Faru laŭplane!

Li foriras.

Kaporalo: Mortpafu!

En la batala muziko de *La Internacio*, la tri generacioj foriras tute sentime kun elstarigita brusto.

Ilin sekvas la japanaj ĝendarmoj.

Silento. Post la kulisoj Li Juhe laŭte krias: "For la japana imperiismo!" "Vivu la Komunista Partio de Ĉinio!" La tri generacioj laŭte krias kun levitaj brakoj: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

Salvo. Du japanaj ĝendarmoj envenas tre-nante Tiemej, kaj ŝin faligas sur teron.

Tiemej (stariĝas, sinturnas kaj vokas): Paĉjo! Avinjo!

Envenas Hatojama, ĝendarmo-kandidato Hoŭ kaj la kaporalo.

Hatojama: Li Tiemej, donu la ĉifrolibron!

Hoŭ kaj Kaporalo: Diru!

Tiemej indigne rigardas Hatojaman.

Hatojama: Lasu ŝin foriri!

Hoŭ: Jes, elportu!

La kaporalo puŝas Tiemej for. La japanaj ĝendarmoj ilin sekvas.

Hoŭ: Kial vi liberigis ŝin, sinjoro taĉmentestro?

Hatojama: Tio ĉi estas la t. n. taktiko uzi longan fadenon por kapti grandan fiŝon!

Hoŭ: Jes!

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.



Gerilanoj saltas de sur rokego por ekstermi la malamikojn. (El la sepa sceno)

S C E N O IX
DAŬRIGI LA AFERON DE
LA MARTIROJ

Tuj post la lasta sceno. Mateno.
 La domo de Li Juhe.

Kiam la kurteno leviĝas, Tiemej eniras la domon kaj sin apogas sur la pordon; ŝi ĉirkaŭrigardas kaj pleniĝas je malĝojo kaj indigno, pensante pri la martiriĝo de siaj patro kaj avino.

Tiemej: Paĉjo! Avinjo! (Ŝi sin ĵetas al la tablo kaj ekploras kun la kapo en la brakoj sur ĝi. Post momento, ŝi malrapide levas sian kapon, ekvidas la signal-lanternon, rapidas al ĝi kaj ĝin levas.) Avinjo! Paĉjo! Mi jam scias pro kio vi mortis. Mi daŭrigos vian aferon kaj estos inda heredanto de la ruĝa lanterno! La ĉifrolibron mi nepre sendos al la Cipres-monto kaj la kordoloran sangverŝon mi nepre venĝos! Ho, Hatojama! Kvankam vi povas min aresti aŭ min liberigi sendepende de mi, tamen la ĉifrolibron vi ne povos akiri laŭ via volo!
 (Ŝi kantas laŭ *hipi daŭban*)

Je penso pri la malamiko, miaj pulmoj krevas!
(laŭ kuajsanĵan)

Dentgrincigante, la indignon mi subpremi devas.
Por kapti l' ĉifrolibron, la bandito Hatojama
reintrigis,

Kaj mian patron kaj avinon pafmortigis!
(laŭ erliu)

Mi maĉis kaj englutis la malamon, spite mian
volon,

Kaj ĝi burĝonos eniĝinte en la koron!
Mi ne mallevos mian kapon, nek retroe paŝos,
(laŭ kuajban)

Larmgutojn flui sur la vangoj mi neniam lasos,
Enkoren ili fluu kaj ekbrulu en fajreroj.
Kaj levu dekmilfutajn flamojn de kolero,
Por bruldetrui tiun ĉi malluman teron!
Atendu vi, bandito Hatojama! Jen respondo
mia pripensita!

Pretigis mi jam por danĝeroj,
Mi timas nek areston, nek ellason, nek skurĝa-
don, nek karceron!

La ĉifrolibron mi ne donos, pretas mi min
lasi frakasita!

Mi iru! (Ŝi prenas la signal-lanternon kaj volas iri.)

Hujlian envenas el la interna ĉambro.

Hujlian: Tiemej!

Tiemej: Fratino Hujlian! (Ŝi metas la lanternon kaj riglas la pordon.)

Hujlian: Mia bopatrino venas vidi vin!

Envenas onklino Tian el la interna ĉambro.

Onklino Tian: Tiemej!

Tiemej: Onklino... (Ŝi sin ĵetas en la sinon de onklino Tian.)

Onklino Tian: Infano, ni jam informiĝis pri la okazaĵo al via patro kaj avino! Ni vidos ĝis kiam la hommanĝantaj bestoj ankoraŭ povos tirani! Nun spiono subobservas vin ekstere, Tiemej, vi ne povas eliri tra la pordo, do vi iru tra nia domo! Tuj demetu vian veston kaj interŝanĝu ĝin kun tiu de Hujlian.

Tiemej: Ne, onklino, mi ne devas alporti danĝeron al vi!

Onklino Tian: Infano! (Helpante ilin interŝanĝi la vestojn, ŝi kantas laŭ *hipi sanban*.)

*La povrajn helpas ĉiam nur la homoj en mizero,
Maldolĉaj du kukurboj kreskas sur la sama
tigo,*

*Ni devas savi vin el faŭko de la tigro,
Por ke rapidu vi al via celo.*

Tiemej: Sed kion fari, onklino, se malfeliĉo okazos al vi?

Onklino Tian: Infano, de multaj jaroj niaj du laboristaj familioj havas komunajn malamikojn kaj suferojn. Kiom ajn granda estu la risko, mi nepre helpos vin foriri sekure!

Tiemej (dankeme): Onklino...

Onklino Tian: Rapidu, infano!

Hujlian: Tuj foriru, Tiemej!

Tiemej: Mi neniam forgesos vin, fratino kaj onklino.

Onklino Tian: Iru tuj!

Tiemej iras en la internan ĉambron kun la signal-lanterno kaj eliras.

Onklino Tian: Hujlian, estu multe singardema!

Onklino Tian iras en la internan ĉambron kaj eliras.

Hujlian surmetas la koltukon de Tiemej, kovrante duonon de sia vizaĝo; ŝi iras el la domo brakportante la korbon kaj sin returnas por fermi la pordon. Ŝi eliras.

Spionoj B kaj C paŝas depost la elektrofadena fosto kaj sekvas ŝin.

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

S C E N O X

EMBUSKE EKSTERMI LA MALAMIKOJN

Tuj post la antaŭa sceno.

Vojo kondukanta al la Cipres-monto.

Kiam la kurteno leviĝas, la tranĉil-akrigisto envenas kun du gerilanoj en kamparanaj vestoj. Tiemej envenas kaj renkontiĝas kun ili.

Tiemej: Onklo tranĉil-akrigisto! (Ŝi prenas la signal-lanternon el sia korbo kaj levas ĝin.)

Tranĉil-akrigisto: Tiemej! (Al la du gerilanoj) Gvatu!

Tiemej: Fine mi trovis vin, onklo! Miaj patro kaj avino...

Tranĉil-akrigisto: Ni jam informiĝis pri ĉio. Ne malĝoju, Tiemej, turnu vian malĝojon en forton kaj nepre venĝu la sangan krimon! Kie estas la ĉifrolibro?

Tiemej: Mi alportis ĝin!

Tranĉil-akrigisto: Bone.

Tiemej: Onklo, nur dank' al nia najbaro fratino Hujlian, kiu sin alivestis en min kaj forlogis la spionojn, mi povis sekure preni la ĉifrolibron kaj ĝin alporti!

Tranĉil-akrigisto: La familio de Tian Hujlian certe altiros la atenton de la malamiko. (Al gerilano A) Maljuna Feng, klopoĉu tuj translokigi la familion de Tian Hujlian!

Gerilano A: Jes!

Gerilano A eliras. Aŭdiĝas hurlo de polica aŭto.

Gerilano B: Venas malamikoj, maljuna Ĝaŭ!

Tranĉil-akrigisto: Vi protektu Tiemej iri al la Cipres-monto. Ni traktu ilin!

Gerilano B forkondukas Tiemej.

Vang Lian-gju krias post la kulisoj: "Halt!" Envenas Hatojama kaj Vang Lian-gju kun japanaj ĝendarmoj sub sia gvido. La tranĉil-akrigisto baras al ili la vojon. Hatojama krias: "Forportu lin!" La tranĉil-akrigisto kaptas kaj deprenas la pistolon de Vang Lian-gju kaj pafmortigas unu japanan ĝendarmon. Li levas sian stablon kaj ĵetas ĝin al Vang Lian-gju.

Gerilanoj saltas el la arbaro kaj faras *liang-hiang-on*.

Gerilano staranta sur roko pafmortigas unu japanan ĝendarmon.

Hatojama kaj Vang Lian-gju forfuĝas. La tranĉil-akrigisto kaj la gerilanoj ilin postkuras.

Gerilanoj flugrapide descendas la rokon kaj postkuras la japanajn agresantojn.

Gerilano batalas energie kontraŭ du japanaj ĝendarmoj per ruĝkvasta lanco. La japanaj ĝendarmoj forkuras unu post la alia. La gerilano postkuras ilin.



Tiemej sukcese plenumis sian taskon alportinte la ĉifrolibron al la Cipres-monto. (El la dekunua sceno)

La tranĉil-akrigisto envenas postkurante Vang Lian-gju. Ili luktas unu kontraŭ la alia.

Hatojama kaj japanaj ĝendarmoj envenas. Luktado en intertuŝo. La gerilanoj ekstermas ĉiujn japanajn agresantojn, pune mortigas la perfidulon kaj morthakas Hatojaman per glavo.

Triumfo de la embuskado. La gerilanoj impone faras *lianghiang-on*.

Malheliĝas la scenejo.

— La kurteno falas.

malsupren iras de sur la montodeklivo. La tranĉil-akrigisto envenas kondukante Tiemej. Envenas ĉiuj gerilanoj. Tiemej solene donas la ĉifrolibron al la estro de la geriltaĉmento. La ĉeestantoj ĝoje festas la venkon svingante siajn armilojn. Tiemej alte tenas la ruĝan lanternon, kiu forte disradias.

La kurteno falas malrapide.

— Fino de la opero —

SCENO XI ANTAŬENMARŜO EN VENKO

Tuj post la antaŭa sceno.

La Cipres-monto.

Kiam la kurteno leviĝas, flirtas ruĝaj flagoj sub la serena ĉielo. La estro de la geriltaĉmento

*Vidu la notojn sur p.44, n-ro 2 de EPC, 1970.

***"Se dio altas unu futon, dek futojn kreskas diablo" estas malnova diro. Tie ĉi "dio" simbolas la reakcian regantan klason kaj "diablo" simbolas la revolucionan ribelan spiriton de la proletaro kaj la revolucia popolo. Por rebati Hatojaman, Li Juhe uzas tiun ĉi malnovan diron por montri, ke la japanaj agresantoj povas aroganti portempe, sed estas la revolucia popolo, kiu estas vere forta. La japanaj agresantoj certe malvenkos, kaj la ĉina popolo certe venkos.

Iri la Vojon de Sinkombino kun Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj

Vigloplenaĵ intelektaj gejunuloj fiksloĝigintaj en kamparo firme decidis revolucii tie dum la tuta vivo.





Studentoj sin hardantaj en ĈPLA-trupo kaj armeanoj iras al kampo, alte tenante ruĝajn standardojn.

Kadroj sinhardantaj per fizika laboro en "Maj-sepa" Kadra Lernejo ĉe antaŭurbo de Pekino vivas kiel batalantoj en solidareco, streĉiteco, seriozeco kaj vigeleco. Jen ili prezentas artajn programerojn verkitajn de ili mem.





Intelekta junulino (la dua de dekstre en la antaŭa vico) ricevanta reedukon en iu ĈPLA-trupo rakontas ĉe kamprando sian komprenajon en studo de Maŭzedongpenso.

Intelektaj junuloj venintaj en kamparon iras al laboro.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kore zorgas pri kreskado de alvenintaj intelektaj junuloj. Jen ili estas en korverŝa babilado.



La Heroa Roto sur Nankin-strato

Batalantoj de la Bona Oka Roto estas en studo.



LA “Bona Oka Roto sur Nankin-strato”, kiu tie garnizonas, estas fame konata tra la tuta lando kiel heroa trupo. La roto restis tie jam 21 jarojn. De la 21 jaroj, la roto alte tenas la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj estas neniom influita de la vigla luksa strato, kie ili garnizonas. Unuiĝante kaj batalante kune kun la laborista klaso de Ŝanhajo, la roto frakasis multfoje subfosajn agadojn de la kaŝitaj spionoj de la usona imperiismo kaj kuomintanga reaktularo, venkis fojon post fojo la atakojn de “sukertegitaj obusoj” de la burĝaro kaj brile plenumis la gloran taskon de defendo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. La komandantoj kaj batalantoj de la roto ĉiam konservas la revolucionan tradicion de modesta vivado kaj penema luktado de ĈPLA kaj tiel fariĝis brila ekzemplo por la tuta armeo kaj tuta popolo en daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro. En majo de la jaro 1963, la Nacidefenda Ministerio honoris ĝin per la titolo de “Bona Oka Roto sur Nankin-strato”.

En majo de 1949, kun la venko de la revolucio, la Oka Roto venis de militkampoj plena de pulvaj fumo al la luksa, homplena Nankin-strato. Ĉie ĉe la strato estis sloganoj “Subtenon al la Kompartio!” “Bonvenigon al la Liberiga Armeo!” La urbanoj kantadis kaj dancadis, kaj la sonorado de gongoj kaj tamburoj atingis ĝis la ĉielo. Vidinte tion, la kadroj kaj soldatoj tre emociiĝis. Jes, nun Ŝanhajo apartenas al la popolo kaj kia gloro estas defendo de la granda Ŝanhajo de la popolo! ... La revolucio venkis, tamen la batalo ne finiĝis. Ĝuste kiel nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris en sia raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio en la antaŭtago de la venko tra la tuta lando: “Gajni la tutlandan venkon estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dek mil lioj, ... la kamaradoj daŭre restu

modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ... daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema lukto." Tial, veninte en Ŝanhajon, la Oka Roto tuj prenis la urbon kiel novan militkampon por batali kontraŭ malamikoj sen armiloj.

Tiam, la reakciularo de la usona imperiismo kaj Ĉiang Kajŝek freneze kriaĉis: "Ŝanhajo estas granda tinkturo; la Kompartio eniris ruĝa kaj eliros certe nigra." Tamen, la sonĝo de la malamikoj baldaŭ bankrotis. Same kiel multaj aliaj frataj rotoj, la Oka Roto povas venki ankaŭ sur la nova militkampoj diversaspekcajn klasajn malamikojn sen armiloj.

Malpuraĵo postlasita de la malnova socio sur Nankin-straton ne povis korodi la ŝtalan volon de la revoluciaj batalantoj de la proletaro. Ili indas la nomon de solida bazo de la proletara diktaturo kaj ne makulis la gloron de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo.

Laŭ la direkto montrita de Prezidanto Maŭ, la "Bona Oka Roto sur Nankin-strato" tramarŝis venke sian brilan vojon en la pasinteco; nun, same laŭ tiu direkto, tiu ĉi roto akiris novajn venkojn en la Granda Proletara Kultura Revolucio sek-vante instruojn de Prezidanto Maŭ.

En septembro de 1968, firme respondante la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ "**La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**" kaj portante la grandan historian mision "**La proletaro nepre devas praktiki kompletan diktaturon super la burĝaro en superstrukturo, inkluzive de ĉiuj kampoj de kulturo**", la kamaradoj de la Bona Oka Roto komencis novan militiron kun verkoj de Prezidanto Maŭ en la manoj kaj pajlaj sandaloj sur la piedoj. Ili kun vigla spirito marŝis en 85 mezajn kaj elementajn lernejojn de la urbo por gvidi tie la movadon de batalo, kritiko kaj reformo en kampo de superstrukturo kunlaborante kun laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso.

La eniro en lernejojn fare de la Bona Oka Roto por kunlabori kun laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso estas tre bonvena al la vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj.

Tiam, la kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso klare vidis, ke plenmano da klasaj malamikoj absolute ne voluntas akcepti sian fiaskon kaj certe aperos zigzagoj en batalo, post kiam la laborista klaso komencis gvidi la movadon de batalo,

kritiko kaj reformo en superstrukturo kaj reprenis en sian manon la regpotencon en edukado, longe monopoligitan de la burĝaro. Por ke klasaj malamikoj ne povu teni sian pozicion, estas necese fari iniciate atakon kontraŭ ili kaj komplete malkovri ilin. Tial, en kunagado kun laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso, la kamaradoj de la Bona Oka Roto gvidis la vastajn amasojn de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj firme teni klasbatalon kaj ĝisfunde malkaŝi la intrigojn de klasaj malamikoj en strikta ligo kun la reala stato de klasbatalo en lernejoj. Kiam kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso venis al iu lernejo, plenmano da klasaj malamikoj kalumniis, ke la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso venis por "depreni la potencon de la lerneja revolucia komitato". Sub la agitado de klasaj malamikoj, la respondeculo de la revolucia komitato de la lernejo volis forlasi la postenon ne travidinte la maĥinacion de malamikoj. Lerninte la instruon de Prezidanto Maŭ "**La fundamenta problemo de revolucio estas tiu de regpotenco**", kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj la laborista propaganda taĉmento klare konsciis, ke klasaj malamikoj atakas nin, utiligante malfortaĵojn de iuj kamaradoj en la revoluciaj vicoj, kaj ni nepre devas malkovri la malamikojn kaj eduki la vastajn amasojn de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. Kamaradoj de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kaj la Bona Oka Roto plene mobilizis la amasojn, energie tenis klasbatalon kaj fine eltenis klasajn malamikojn. Dank' al tio la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la lernejo klare vidis la reakcian vizaĝon de plenmano da klasaj malamikoj. Sub la gvido de la laborista klaso ĉiuj de la lernejo unuiĝis kompakte kaj rapide ŝanĝis la fizionomion de la lernejo.

Kun la ŝanĝiĝo de la situacio, la plenmano da klasaj malamikoj senĉese ŝanĝis sian taktikon por ŝanceli kaj malhelpi, per ankoraŭ pli kaŝa rimedo, la laboristan klason okupi kaj reformi la pozicion de eduko. Ili jen korodis la amasojn, per la malnovaj pensoj, malnova kulturo, malnovaj moroj kaj malnovaj kutimoj postlasitaj de la feŭda socio dum miloj da jaroj kaj per la venena influo de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki dum dekelkaj jaroj por obstrukci al la laborista klaso la vojon por okupi kaj reformi la edukan kampon, jen pafis kontraŭ la laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso sukertegitajn obusojn, provante per diversaj metodoj de flatado kaj materia allogo

*Batalanto de la roto
korverŝe interparolas
kun ruĝaj gvardianoj.*



fari breĉon en ĉiutaga vivo, por ke la laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso ne povu firme stari en superstruktura kampo. Tamen, ĉe la laborista klaso kaj kamaradoj de la Bona Oka Roto armitaj de la penso de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio, la intrigoj de malamikoj estis frakasitaj unu post alia.

La venko de la laborista klaso multe kuraĝigis la vastajn amasojn de revoluciaj instruistoj kaj lernantoj. Sed, restas ankoraŭ seriozaj bataloj al la laborista klaso, por komplete okupi kaj reformi la edukatan pozicion per Maŭzedongpenso. Iufoje, kiam kamaradoj de la Bona Oka Roto venis en iun mezlernejon kune kun laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso, ili vidis, ke tie inundas anarkiismaj pensoj, ili tre indignis, konsciante ke tio rezultis el la reviziisma eduka linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki.

Kiel reformi la edukatan kampon post kiam la laborista klaso okupis ĝin?

Nokte, la politika direktanto de la roto Vang Ĉuanjoŭ gvidis siajn kamaradojn lerni la instruon de Prezidanto Maŭ “**Sen detruo ne estas konstruo. Detruo signifas kritikon, signifas revolucion.**” “**Detruo venas la unua kaj en ĝi troviĝas konstruo.**” La instruo de Prezidanto Maŭ donis al la kamaradoj de la Bona Oka Roto profundan konon: la

esenco de Marksismo-Leninismo kaj Maŭzedongpenso estas kritiko, batalo kaj revolucio. En la okupado kaj reformado de la eduka kampo la unua tasko por la laborista klaso estas disvolvi revolucion amasan kritikon kontraŭ la venena influo de la reviziisma eduka linio. Nur se oni ĉiam firme tenas la revolucion amasan kritikon, oni povas eterne teni tiun ĉi pozicion sub la komando de Maŭzedongpenso.

La kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso helpis la membrojn de la lerneja revolucia komitato studi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon, prenante klasan edukadon kiel la unuan paŝon. En komenco, la respondeculo de la revolucia komitato ne povis kompreni la kritikon de la amasoj direktitan kontraŭ li, ke “ne konduki revolucion amasan kritikon signifas ignori klasbatalon”. La kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso interparolis kun li fojon post fojo por levi lian konscion pri klasbatalo. Post nelonge, tiu ĉi kamarado malsaniĝis. Kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj maljunaj laboristoj de la propaganda taĉmento iris al lia hejmo dekelkajn liojn fora kaj rememoris kun li la amaron en la malnova socio komparante ĝin kun la hodiaŭa feliĉo kaj forte kritikis per Maŭzedong-

penso la teorion de Liu Ŝaŭki pri “estingiĝo de klasbatalo”. Profunde tuŝite, tiu ĉi kamarado emociis diri: “Mi ekkomprenis, ke la konsidero pri personaj interesoj min venenis, la laborista klaso min helpis kaj la revolucia linio de Prezidanto Maŭ min savis. De nun mi faros revolucion la tutan vivon sekvante Prezidanton Maŭ.” Kaj li venis al la lernejo en malsano por gvidi la kamaradojn de la revolucia komitato disvolvi revolucion amasan kritikon. Sub lia influo, multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la lernejo.

Por reformi malnovajn intelektulojn per Maŭzedongpenso kaj formi vicojn de novaj proletaraj intelektuloj, la kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj laboristaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso kritikis kune kun la instruistoj la teorion

de la granda renegato Liu Ŝaŭki pri “estingiĝo de klasbatalo”, helpante ilin altigi la konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj; ili kritikis kune kun instruistoj la reviziisman edukon linion, helpante ilin starigi la penson tutkore kaj plenanime servi al la popolo.

Tiamaniere, la kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj propagandaj taĉmentoj armis la instruistojn per Maŭzedongpenso unun post alia.

Ju pli arde flamas la revolucia amasa kritiko, des pli profunde enradikiĝas Maŭzedongpenso. Estis mezlernejo, starigita de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de la antaŭa partia komitato de Ŝanhajo kiel “tipo”, en kiu ili energie antaŭenpuŝis la reviziisman edukon linion de Liu Ŝaŭki. En la pasinteco, multaj instruistoj de la

Batalantoj de la roto studas projekton de eduka reformo kune kun membroj de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso, revoluciaj instruistoj kaj lernantoj.





Revoluciaj instruistoj kaj lernantoj faras amasan revolucionan kritikon. Jen ili rigardas dazibaŭojn.

lernejo malestimis fiziklaboron, serioze sin apartigis de la amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj energie ĉasis famigon kaj profiton. Sub la helpo de kamaradoj de la Bona Oka Roto kaj laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso, la instruistoj forte kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman teoriaĉon de “profesia laboro sur la unua loko” kaj iom post iom movis sian starpunkton al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj ilia sentimento ŝanĝiĝis. La instruistoj, kiuj antaŭe legis nur profesiajn librojn, nun aktive partoprenas la movadon de batalo, kritiko kaj reformo, faris enketon kaj petis konsilojn inter la amasoj de laboristoj kaj kamparanoj, kun la decido konduki ĝisfine la edukon revolucion. La instruistoj, kiuj antaŭe preparis lecionojn en kabineto, nun restas inter la lernantoj de la mateno ĝis la vespero, klopodante por la eduka revolucio kun alta revolucionaria fervoro. Ili starigis por si pli altan normon de ideologia revoluciigo kaj vive studas kaj vive

aplikas la “tri popularajn artikolojn” por reformisian mondkoncepton.

.....

Antaŭ la nova venko, relegante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “... la kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ... daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penma luktado”, la kamaradoj de la Bona Oka Roto trovas ĝin senkompare intima. La instruo de Prezidanto Maŭ donis profundan konon al la kamaradoj de la Bona Oka Roto: la laborista klaso akiris grandan venkon en gvido de batalo, kritiko kaj reformo en superstrukturo, tio estas “nur la unua paŝo en longa marŝo de dek mil lioj”. Ĉe venko, oni devas liberiĝi de aroganteco kaj senpacienco, revolucii daŭre kaj ĝisfunde, neniam halti sur duonvojo kaj konduki la revolucion en superstrukturo ĝis la fino.

Armeo kaj Popolo en Rilato

de Fiŝoj kaj Akvo

LA granda ĈPLA estas konsistigata de filoj de la laboranta popolo kaj estas firma kolono de la diktaturo de la proletaro, kaj en defendo de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj en subtenado de industrio, agrikulturo kaj vastaj amasoj de maldekstruloj kaj en milita kontrolo kaj militpolitika trejnado, ili faris grandajn kontribuojn. En nia lando, de urboj ĝis kamparo kaj de marbordo ĝis limregionoj, ĉie cirkulas kortuŝaj rakontoj pri la amo de armeo al la popolo kaj la subteno de la popolo al la armeo, ke ili unuiĝis kiel unu homo. Sube estas kelkaj rakontoj pri la novaj rilatoj inter la armeo kaj la popolo.

MALJUNA MALRIĈKAMPARANO SAVIS ĈPLA-ANON

En profunda nokto, iu el la soldatoj de ĈPLA, kiuj gardostaris en postenejo sur alta monto, estis malfeliĉe mordita de venena serpento. La vundo estis tre serioza. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Zuovu-brigado loĝantaj proksime estis tre maltrankviligitaj, ĉar malproksima estis hospitalo kaj la maljuna malriĉkamparano Hong Juanbo, kiu iom konis herbojn kontraŭ serpenta veneno, estis malsana. Kion fari?

Kiam la maljuna malriĉkamparano Hong Juanbo informiĝis pri la okazintaĵo, li tuj leviĝis el sia lito malgraŭ ke lia malsano bezonis ripozon. Li diris al siaj familianoj kun emocio: "Mordon faris venena serpento sur la korpo de ĈPLA-ano; doloron ĝi kaŭzis al la koro de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tuj sur la montojn por kolekti kuracherbojn!" Kaj li ekprenis elektran torĉon kaj fosilon kaj ekiris kune kun milicanoj.

Nelonge grimpante sur monto, la 69-jara maljunulo ekspiregis, trenante siajn du kruojn, kiuj fariĝis ĉiam pli pezaj, kaj kelkfoje preskaŭ falis. La kunirantoj volis lin porti sur sia dorso, sed tion li rifuzis. Kune kun la milicanoj li transgrimpis montdorsojn kaj travadis plurajn riveretojn por serĉi kuracherbojn inter herbaro kaj arbustaro. Fine li trovis sur iu montsupro la bezonatan kuracherbon. Hong Juanbo transdonis ĝin al iu milicano kaj klarigis al li, kiel ĝin uzi, por ke la lasta kuru rekte al la postenejo.

Post preno de la kuracherbo, la vundito rapide eldangiĝis. Sed la avo ankoraŭ ne povis trankviliĝi kaj petis milicanojn porti la vunditon al lia hejmo, kaj li zorgeme flegis la vunditon maldormante dum la tuta nokto. Post tri tagoj la soldato tute resaniĝis. Kiam li diris "adiaŭ" al la maljunulo kuŝanta malsana sur la lito, li estis ĝislarme kortuŝita kaj esprimis ke li nepre klopodos en sia praktika agado de sinpreparo kontraŭ milito por respondi al la profunda zorgo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj montrita al ĈPLA-anoj.

LECIONO DE KLASBATALO

Iun dimanĉan posttagmezon en aŭgusto lastjare, kamarado Vang Ĝongju, arma reprezentanto laboranta en la Santiaŭŝi-a Klaseduka Ekspozicio en Tiangin, aŭdis de la deĵoranto de la akcepta grupo, ke venis dekoj da mezlernejoj de Pekino por pririgardi la ekspozicion, kiuj baldaŭ iros al limregiono por tie fiksloĝi, kaj ke ili reiris al Pekino trovinte la ekspozicion fermita. Aŭdinte pri tio, kamarado Vang estis tre ĉagrenita. Li pensis ke tiuj junuloj pli varme amos la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj pli firme enradikiĝos en la

limregiono, se ili ricevos lecionon de klasbatalo el la ekspozicio. Li do tuj organizis propagandan taĉmenton de Maŭzedongpenso kune kun kelkaj ĈPLA-anoj senditaj al la ekspozicio por subteni la maldekstrulojn kaj laboristoj de la ekspozicio por viziti la mezlernejanon kunportante la reproduktaĵojn de la ekspoziciaĵoj de klasa eduko kaj kvanton da presita klaseduka materialo pri Santiaŭsi.


Ĉar la mezlernejanon ne postlasis sian adreson kaj la deĵoranto memoris nur ne tre certe ke la mezlernejo nomiĝas "Nanhan" kaj situas ekster la pordo Deŝengmen. Forlasinte la trajnon, kamarado Vang kaj aliaj rapidis al la loko por trovi la mezlernejon, sed tie estis nur la 46-a Mezlernejo, kies lernantoj nenion sciis pri la afero. Trafoliu-
minte la telefonan libron, ankaŭ tie ili ne trovis la nomon de la lernejo. Tamen, ili ne deprimiĝis sed daŭre klopodis, kaj fine ili certigis ke la lernantoj estis de la Nanŝatan-a Mezlernejo, kiu situas pli ol 30 liojn fore de Deŝengmen. Tiam estis jam nokto. Tamen, ili forgesis sian malsaton kaj lacon kaj rapidis al la lernejo kunportante la reproduktaĵojn.

La tuta lernejo ekbolis de ĝojo, precipe la junuloj, kiuj estis baldaŭ forlasontaj Pekinon. Kamarado Vang kaj aliaj membroj de la propaganda taĉmento disdonis al la lernejanon la presitan materialon, kaj maljuna laboristo tuj komencis rakontadon, donante al la junuloj vivan klasedukan lecionon. La lernantoj firme esprimis ke ili nepre ne forgesos la klasan amaron kaj por ĉiam revolucios, proksime sekvante Prezidanton Maŭ.

PAJLAJ MATOJ

En malfrua aŭtuno de la pasinta jaro, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la produkta grupo Jonghong ĉe la piedo de Giufeng-

monto en la norda Guangdong-provinco ĉiuj ĝojis plenkore, rigardante la rikoltitajn grenajn montojn kuŝantajn sur la draŝejo, kaj estis kore danke-
maj al la ĈPLA-anoj, kiuj helpis ilin akiri la novan riĉan rikolton. Tiam ili ekpensis pri la ĈPLA-anoj, kiuj garnizonis sur la monto. Tie la temperaturo en nokto jam falis sub nulo kaj la malvarmo ilin atakis morde. Oni proponis al la grupestro sendi al la batalantoj pajlon por uzi kiel matracon, tiel ke ili povos dormi en varmo kaj pli bone defendi la patrolandon.



Pri tio ankaŭ maljuna grupestro Luo Dongbaŭ pensis kaj la propono de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre ĝojigis lin. Tamen li pensis ke pajlo sen antaŭprilaboro influos la purecon kaj ordon de la kazerno. Estos bone, se oni antaŭe faros el ĝi pajlajn matojn, oportune kaj bonorde uzeblajn. Tiel li organizis la komunumanojn, kiuj plej bone scipovis plekti pajlajn matojn, kaj en du tagoj ili plektis por ĉiu soldato po unu maton. La soldatoj estis tre korusitaj pro la zorgemo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al ili, kaj diris ĝoje: Kuŝante sur la mato, ni eksentas varmon sur la korpo. La amo kaj zorgemo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por ĉiam restos en nia koro.

“REVENIS KURACISTOJ DE LA ANTAŬA RUĜA ARMEO”

Tongjoŭ-brigado en la montregiono de la norda parto de Guanghi estas loko, kie iam trapasis la Ruĝa Armeo dum sia Longa Marŝo. Antaŭ nelonge, kamaradoj de la hospitalo Ajmin de ĈPLA venis al la loko transgrimpinte montojn, same kiel la Ruĝa Armeo, tutkore kaj plenanime servis al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj resanigis la maljunan onklinon Jan Minghiu, kies ambaŭ okuloj perdis vidkapablon. Ĉiuj komunumanoj estis treege ĝojigitaj.

En la malnova socio, onklino Jan vivis sklavan vivon nekompareblan eĉ kun tiu de brutoj, sub la ekspluato kaj subpremo de la feŭdaj estroj kaj ĉefuloj. Post la Liberiĝo onklino Jan ekhavis feliĉan vivon same kiel la aliaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Sed malfeliĉe ŝi estis atakita de okulmalsano kaj perdis sian vidkapablon antaŭ kelkaj jaroj. Kiel ŝi deziris kuracigi sian malsanon kaj reakiri la vidkapablon!

Post detala ekzamenado la kamaradoj de la nomita hospitalo decidis fari por ŝi operacion. Sed mankis ĉeloke necesaj operaciiloj. Kion fari? Iuj proponis sendi la onklinon al la hospitalo por tie ŝin operacii. Sed plejparto de la kamaradoj opiniis, ke fari vojaĝon de pli ol 20 lioj ne estas oportune por la blindulino. Ili do sendis du kamaradojn en la sama nokto al la hospitalo por alporti la bezonaĵojn. La sekvintan matenon, la du senditoj revenis al la brigado. Kaj la operacio estis sukcese farita.

La malsanstato de la onklino rapide pliboniĝis. En la tago de forprenado de la ĥirurgia kudrofadeno, la onklino reekvidis post dolora blindeco! Venis

amase malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en kaj ekster la vilaĝo por ŝin gratuli. Ili ĉiuj laŭdis la spiriton de la popola armeo tutkore kaj plenanime servi al la popolo. Iu blankhara maljunulo rakontis emocie al la aliaj, kiel kuracisto de la Ruĝa Armeo kiu siatempe trapasis la lokon, nokte iris sur montojn por kolekti kurac-herbojn por savi iun kamparanon-dungiton. La maljunulo konkludis en la fino: “Per cito de milo kaj dekmilo da aferoj montriĝas ke nur dank’ al la bona gvido de Prezidanto Maŭ, troviĝas tiaj bonaj kuracistoj!”

Ekde tiam, ĉiam kiam venis la kamaradoj de la hospitalo Ajmin, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris unu al alia kaj varme salutis ke “revenas kuracistoj de la antaŭa Ruĝa Armeo!”

HELPI POPOLAJN ARMEANOJ EN PLUVEGO

Iun tagon en la lasta tagdeko de septembro de la pasinta jaro, falis grandega pluvo en la regiono de Tajhua-monto ĉe la limoj de la provincoj Giangsu, Ĝegiang kaj Anhuĵ. La pluvakvo torente ruliĝadis impete malsupren de la montsuproj. La komandantoj kaj batalantoj de la tria plotono de la kvara roto de iu ĈPLA-trupo kun vigla singardemo plenumis sian patrolan taskon laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ĉiam resti preta sen distriĝo. Por gardi la montregionon, ili iris tra bambuaroj, travadis akvofluejojn, transgrimpis montpintojn kaj pasis tra krutaj ravinoj.

Vespere, kiam la batalantoj transgrimpis iun montpinton kaj venis al la transa deklivo, subite ruliĝadis fulmotondroj skuante la montojn. Sub fulmoj, oni povis vidi ke la akvego furioze torentas antaŭen rekte al la fluejo sub la krutaĵo kunportante grandajn ŝtonojn, kiuj kuregas kvazaŭ sovaĝaj bestoj.

Ĝuste kiam la patrolantoj volis daŭrigi sian iradon travadante la fluejon, sur la transa bordo oni alsendis signalon per eklumo de elektra torĉo. Tio estis signalo sendita de la milica taĉmento de Dagian-brigado, kaj ili rapide faris respon- don.

La nomita milica taĉmento konsistis el malriĉkamparanaj filoj kiuj kreskis en la loko kaj tre amas la ĈPLA-anojn kaj bone scias la veron, ke regpotenco venas el pafilo. Ĉiufoje, kiam la kvara roto elsendis patrolon, ili ĉiam strikte kunagis kaj donis fervoran helpon. Precipe kiam la vetero

estas malbona, ili ĉiam postenigas gardantojn ĉe la danĝeraj lokoj.

En tiu nokto la milicanoĵoj venis tien por inspekti la digon kaj helpi la patrolantojn pro la pluvego kaj montotorento. Kiam ili sukcesis starigi kontakton kun la patrolo, ili estis tre ĝojaj, tamen ili ne povis komuniki kun ĝi pro la ventego kaj pluvego kaj timis maltrankvile ke okazus akcidentoj, se la patrolo travadus la akvofluejon. En tiu tempo, komunista kaj veterana milicano Ĝang Giuĵu diris decideme: "En la pasinteco, ni milicanoĵoj en la montregiono helpis la Novan Kvaran Armeon venki la reakciulojn de Kuomintango malgraŭ pluvo de kugloj; nun por defendi la montregionon ni nepre helpos renkonte al la fratuloj, kiel ajn granda estas la montakvego!" La milicanoĵoj dividis sin en du grupojn, unu senĉese signalis al la patrolo por ĉesigi ĝian antaŭeniron, kaj la alia iris renkonte al ĝi ĉirkaŭire.

La dua grupo venkis multajn malfacilojn, transgrimpis du montojn kaj fine renkontiĝis kun la patrolo kaj sekure kondukis ĝin al la brigado.

La patrolo volis rekomenci plenumadon de sia tasko post iom da ripozo, malgraŭ la pluvego kaj ventego. "Do iru!" diris emocie iu veterana milicano, kiu multe suferis en la malnova socio kaj profunde malamis ĝin, "mi plej bone konas la montvojon ĉi tie kaj akompanos vin!" Tion dirinte li tuj ekiris ĉe la kapo de la patrolo.

Fulmis kaj tondris daŭre. La armeo kaj la popolo havis la saman volon kaj helpis unu la alian, formante neskueblan feran muron, batalante en la furioza vento kaj torentanta pluvo, marŝante al la alta supro de Tajhua-monto.

SES KORBOJ DA JUJUBOJ

Ĉirkaŭ la kazerno de la 9-a roto de iu ĈPLA-trupo estas densa zizifa arbaro. La grandaj maturaj jujuboj falis sur la teron ĉe ekblovo. Laŭ la Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj Ok Punktoj de Atentigo instruitaj de Prezidanto Maŭ, la batalantoj kolektis la falintajn jujubojn kaj sekigis ilin sur matoj. Neniu el ili manĝis eĉ unu el la grandaj jujuboj. Ĉiam pli multiĝis jujuboj sur la matoj. Kiam ili estis pretaj, oni metis ilin en ses korbegojn.

La vicestro de la 9-a roto kamarado Liu Giujong portis la jujubojn kune kun batalantoj por sendi ilin al Giangĉong-brigado. Kiam la komunumanoj eksciis pri la deveno de la jujuboj, ili estis tre kortuŝitaj kaj diris, ke ĉiuj jujuboj estis levitaj de la tero per la manoj de la fratoj-batalantoj kaj enkorpigitaĵoj de ilia profunda amo al la popolo. Laŭte kriante "Vivu Prezidanto Maŭ", ili decidis pli bone lerni de la ĈPLA-anoj por levi novan altan tajdon de tenado de revolucio kaj stimulo de produkto.



KAMIONO "KINGHAJ-LAGO"

Por efektivi la grandan strategian orientilon de Prezidanto Maŭ "sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo", la diversnaciaj laboristoj de nia Kinghaj-provinco sukcese fabrikis la kamionon "Kinghaj-lago" disvolvante la revolucionan spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema luktado en malfaciloj, konforme al la bezono de disvolvado de la industrio, agrokulturo kaj brutobredado en la provinco. Kontrolado kaj praktika uzado montris, ke la

kapablo de tiu kamiono tute atingis la normojn difinitajn en la projekto. La unua nombro da kamionoj "Kinghaj-lago" jam kuras sur Kinghaj-altebenejo por kontribui al la socialisma konstruado de la patrolando.

La kamiono "Kinghaj-lago" povas porti kvar-tunan pezon. 80 procentoj de la fundamentaj partoj de ĝi, kiaj motoro, rapidumŝanĝilo, antaŭa aksaĵo, posta aksaĵo, framo, korpo kaj stira aparato, estas fabrikitaj de la provinco mem. La strukturo kaj kapablo de tiu kamiono konformas al la postuloj sur Kinghaj-altebenejo, kie altas montoj, krutas deklivoj, longas transporta vojolinio, furiozas sablovento, relative maldensas la aero kaj relative malalta estas la temperaturo; ĝi havas relative profundan kargujon konvenan por enteni diversajn produktaĵojn de bredataĵoj brutoj grandkvante liverataj de Kinghaj-provinco.

Heroaj Figuroj de la Granda Epoko

La du pentraĵoj ĉi tie prezentataj estas elstaraj verkoj pri la heroaj figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj sub la stimulo de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “Unuigi por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”.

Per artaj figuroj de klareco kaj viveco, la olepentraĵo “Altigu la Singardemon kaj Defendu la Patrolandon” enkorpiĝis la brilan penson de Prezidanto Maŭ: “Se la armeo kaj la popolo unuigas kiel unu persono, kiu en la mondo povas ilin venki?” Kun la matena suno en la koro, la batalanto de ĈPLA kaj la gemilicanoj en la

Altigu la Singardemon kaj Defendu la Patrolandon (olepentraĵo)

Verkita de Guang Kiming



bildo, firme tenantaj ŝtalajn pafilojn, alte starantaj kiel firmaj rokegoj kaj viglamente sinpreparantaj por ekstermi malamikojn, montras, ke la sepecentmilona ĉina popolo armita per Maŭzedongpenso kaj hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio havas nevenkeblan gigantan forton. Iliaj ĉasistaj okuloj streĉe gvatas la luposimilajn malamikojn. Iliaj aplombaj, firmaj kaj decidemaj mienoj kaj la forta mangesto de la batalanto montras la firman kredon: Ĉe la ĉina popolo “delonge pretis jam defend-aranĝoj ĉiaj, la unueca vol’ — remparo plej fortika”, kaj ĉiuj malamikoj, kiuj aŭdacos invadi, certe ne povos eskapi el pereoj!

La strukturo de la pentraĵo karakteriziĝas per lakoneco. La figuroj aspektas firmaj kiel rokegoj. La lazura ĉielo kun kelkaj blankaj nuboj en la fono ne nur forte montras la grandan animon kaj altan batalvolon de la figuroj, sed ankaŭ elstarigas la belan teron de la socialisma patrolando en akra kontrasto kun la malluma stato de imperiismo, reviziismo kaj la reakciuloj en senelirejo.

La guaŝo “Senĉese Sturmi ĝis la Lasta Spiro” figurigis heroan batalanton peze vunditan je la kapo en batalo kontraŭ agresantoj, kiu, por defendi Prezidanton Maŭ kaj la patrolandon, liberigis sin de la savanta sanitaristo, ekprenis sian mitraleton kaj daŭre sturmas al la malamiko. Lia rigardo brilanta de arda sanitaristo, ekprenis sian mitraleton kaj daŭre sturmas al la malamiko plene manifestas la heroecon de ĈPLA nepre faligi ĉiujn malamikojn, kaj ĝian ĝisfundan revolucionan spiriton “timi nek malfacilojn nek morton”.

La du belartaj verkoj enkorpiĝis la direkton de literaturo kaj arto — servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la proletara politiko. Tio ĉi estas nova frukto akirita de la Granda Proletara Kultura Revolucio sur la literatura kaj arta fronto kaj nova venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ.

Senĉese Sturmi ĝis la Lasta Spiro (guaŝo)

Kolektive verkita de la Belarta Grupo de la Milita Muzeo de la Ĉina Popola Revolucio



Se la Armeo kaj la Popolo Unuiĝas Kiel Unu Persono, Kiu en la Mondo Povas Ilin Venki?

La armeo amas la popolon kaj la popolo subtenas la armeon.



Armeanoj kaj popolanoj kune sin ekzer-
cas diligente por altigi sian batalpovon.






ĈPLA-anoj por subteno al la agrokulturo venis al kamparo kaj ricevis varman bonvenigon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaĵmezkamparanoj.

La Tuta Vivo

de Batalo



Kamarado Ĝang Kongkjuan

ĜANG Kongkjuan, vicestro de iu aerarmea trupo de ĈPLA, estas bona komunisto, kiu dum tuta vivo batalis por komunismo. Li diligente kaj senĉese batalis por la revolucio kaj popolo strikte sekvante Prezidanton Maŭ.

Jen estis ordinara tago travivita de tiu komunisma batalanto.

En la 20-a de decembro 1969 la suno brilis sur la serena ĉielo.

Matene, Ĝang Kongkjuan kiel kutime surportis sian tornistran kaj komencis batalon de tiu tago. Ruĝe brilis la vortoj sur la tornistro "Ĉiam Fidela al Prezidanto Maŭ", kiujn li propramane brodis.

Ĝang Kongkjuan havis multajn malsanojn. Antaŭ kelkaj tagoj lia kormalsano refoje serioziĝis. Sub ripetada urĝigo de la partia komitato de la trupo kaj kuracisto li venis al hospitalo por ricevi diagnozon. Konstatinte la gravecon de lia malsano, la kuracisto ordonis al li tujan enhospitaliĝon.

Antaŭ la serioza malsano Ĝang Kongkjuan estis tre trankvila. Li petis, ke la kuracisto lasu lin reveni al la trupo.

Post reveno de la hospitalo li kuŝis en sia hejmo du tagojn. Li komprenis la profundan zorgon de la partia komitato de la trupo kaj la

gvidantoj al li, sed la forta respondeco pri laboro lin malkvietigis. Kuŝante sur la lito, li pensis pri la trupo. Li jen telefonis por pridemandi staton de la trupo, jen venigis kamaradojn por raporti pri laboroj. . .

En la tago de la 20-a, Ĝang Kongkjuan neniel povis kuŝi plu. Rimarkinte ke li tuj foriros, lia edzino diris: "Ĉu la partia komitato ne decidis sendi vin hodiaŭ al sanatorio? Baldaŭ venos la kuracisto. Nu, vi prenu matenmanĝon hejme!"

Ĝang Kongkjuan sin revigligante diris: "Vidu, mi estas sufiĉe sana. Pro kio al sanatorio! Mi prenos matenmanĝon en la komuna manĝejo kaj tiel povos kapti tempon por preparoli laboron kun kamaradoj!"

En la manĝejo la kuracisto vidis Ĝang Kongkjuan kaj, per fingro tuŝetinte lian edeman vangon, maltrankvile diris: "Vicestro Ĝang, aŭto jam estas preta, ni iru post manĝo."

Post la manĝo, kun enhospitaliga atestilo la kuracisto venis al lia hejmo. Sed kie la paciento? Li ne estis hejme.



Parto de verkoj de Prezidanto Maŭ studitaj de kamarado Ĝang Kongkjuan

La kuracisto rapidis al la komandejo, stabano diris: “Vicestro Ĝang foriris post interkonsiliĝo pri laboroj!”

Tiu urĝeme kuris al lia oficejo, kamarado diris: “Vicestro Ĝang ĵus foriris post aranĝo de laboroj!”

La kuracisto urĝe sekvis liajn paŝosignojn dum la tuta antaŭtagmezo, sed ne trovis lin!

Fine en tagmezo, la kuracisto trovis Ĝang Kongkjuan en lia hejmo. Tiam la lasta diris ridetante: “Ĉu mi ne resaniĝis?” La kuracisto ne povis konvinki lin, do devis peti de la trupa estro instrukcion. La estro ripetade ordonis ke li plue observu la fazojn de la malsano de Ĝang Kongkjuan kaj tuj raportu kaj faru kuracon, se la malsano serioziĝos.

Apenaŭ la kuracisto foriris, Ĝang Kongkjuan tuj forlasis sian hejmon.

Li venis al konstruejo, kaj vidis ke soldatoj transportas teron kaj sablon kaj ĉie prezentiĝis arda laborfervoro, li sentis varmecon en la koro. Multaj soldatoj alirante diris: “Vicestro Ĝang, laŭdire vi enhospitaliĝis?” “Nur du tagojn ni ne vidis vin, sed ili ŝajnas al ni kvazaŭ duonmonato.” Ĝang Kongkjuan salutis al la soldatoj kaj intime interparolis kun ili.

Alveninte al la roto de kureja servo, Ĝang Kongkjuan vidis ke soldatoj purigas veturilojn.

Li refaldis la manikojn kaj partoprenis la laboron kaj samtempe studis kun aliaj la instruon de Prezidanto Maŭ “**timi nek malfacilojn nek morton**”, tiel ke ĉiuj estas plenaj de energio kaj batala vigleco. Li diris al politika direktanto Jue Fuking: “Vicprezidanto Lin instrukciis al ni: ‘Pli gravas ekzemplo ol admono’. Por ke la soldatoj ne timu malfacilojn, unue la kadroj mem devas ne timi malfacilojn. Antaŭ ĉiu afero, bona ekzemplo de kadroj estas bona rimedo por komandi soldatojn!” Vidante la malsanan estron persistantan en laboro, Jue Fuking emociite diris: “Ni nepre bone kondutos kaj bone gvidos la trupon.”

Forlasinte la roton, Ĝang Kongkjuan trairis ĉiujn aliajn proksimajn rotojn kaj aparte iris al la gastejo por familianoj kaj diris ke la kamaradoj de la gasteja manĝejo entuziasme akceptu familianojn de soldatoj, venintajn al la trupo por vizito.

Tridek minutojn post la sepa vespere, Ĝang Kongkjuan kun granda intereso aŭskultis la raporton pri laboro faritan de estro de rekruta roto Deng Guoking eltenante multfojan brustan doloron. Post du horoj, li iris al la kuracejo por konsoli malsanulojn.

Jam batis la deka horo, Ĝang Kongkjuan ankoraŭ raportis al la trupestro pri laboro. Rimarkinte lin malsane pala, la trupestro urĝigis lin reveni hejmen kaj konsilis al li frue enhospitaliĝi por kuraco. Tamen li ne metis sian malsanon en la koron, sed raportis ĉiujn aferojn atente por ne preterlasi ion.

Estis profunda nokto. Ĝang Kongkjuan revenis al sia hejmo. Ŝaltinte la lumon, li kutime malfermis la tagan ĵurnalon. Tiam, la kora doloro forte atakis lin, li premis la doloran lokon per la mano kun granda forto. La orebrilaj vortoj sur la frontpaĝa supra **“Mi aprobas tiun sloganon, nome ‘timi nek malfacilojn nek morton’”** donis al li grandan inspiron.

En la 20-a, Ĝang Kongkjuan laboris 18 horojn. Li trairis multajn unuojn kaj faris interparolojn

kun multaj kadroj, soldatoj, oficistoj kaj laboristoj. La laboro estis streĉa, sed la tago por li estis ordinara.

Je la kvara de la 21-a matene, Ĝang Kongkjuan vekigis. Lia edzino admonis lin dormi iom plu, sed li diris: **“Baldaŭ tagiĝos, mi iros al la monto por kontroli laboron!”** La edzino tuj ellitiĝis por prepari manĝon. Sed, tute neatendite, ĝuste en tiu palpebruma momento por ĉiam ĉesis la spirado de tiu komunisto sinforgese batalanta por komunismo en la tuta vivo.

Kontrolo de kuracistoj konstatis ke la koro de kamarado Ĝang Kongkjuan krevis je du fingroj. Kamaradoj diris: **“Victrupestro Ĝang tutkore servis al la popolo kaj al la revolucio, li ja mortis de laciĝo!”**

Prenante kamaradon Ĝang Kongkjuan kiel sian ekzemplon, aviadistoj de la aerarmea trupo, al kiu apartenis kamarado Ĝang Kongkjuan, firme decidis strikte sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ batali dum la tuta vivo por la komunisma afero.



La lasta tago de Ĝang Kongkjuan estis miniaturo de lia sinforgesata batalo dum la tuta vivo.

Ĝang Kongkjuan partoprenis la revolucion en 1943 kaj aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio en 1946. Sub nutrado de Maŭzedongpenso, li, filo de malriĉkampano, konis kio estas klaso, kio estas ekspluato, kaj tiel li efektive konis kio estas revolucio. Por la revolucio li strikte sekvis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ en militiro suden kaj norden riskante vivoferon.

En la pasintaj militaj jaroj, Ĝang Kongkjuan dekomence okupiĝis pri malfronta servo. Por akiri kerosenon por bruligi malamikajn redutojn, riskante vivoferon li trapasis multajn blokadojn de la malamikoj kaj sukcese plenumis la taskon; por ŝirmi sian kunbatalanton li estis vundita.

En la nova historia stadio de daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, li neniam forgesis la batalon inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj kaj neniam forgesis la proletaran diktaturon. Disvolvante la proletaran spiriton konduki la revolucion ĝis la fino, li brave batalis kaj marŝis ĉiam antaŭen.

La Granda Proletara Kultura Revolucio plie elvolvis la vigloplenan batalan spiriton de tiu revolucia batalanto. En la batalo Ĝang Kongkjuan vive studis kaj vive aplikis la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, tial li fariĝis pli saĝa, pli akrevida kaj pli firma en la revolucio.

Ĝang Kongkjuan profunde komprenis, ke, kiel komunisto kaj revolucia kadro, li devas labori senrezerve por interesoj de la popolo. Li ofte diris al kamaradoj: "Prezidanto Maŭ plej fidas al la amasoj, plej amas ilin. Ju pli revolucia batalanto amas Prezidanton Maŭ, des pli li estas intima kun la amasoj!" Li zorgis pri ĉiu soldato.

En iu neĝega profunda nokto li vekigis de frosto. "Kiel fartas la batalantoj en tiel frosta nokto?" Li neniel povis endormiĝi kaj tuj ellitiĝis. Li vekis kamaradojn de la kazerna sekcio kaj kune kun ili iris en neĝado al la rotoj por kontroli. Kiam li rimarkis ke iuj pordoj kaj fenestroj de la gardista roto difektiĝis, li ordonis ĉarpentistojn tuj ripari ilin.

Iun antaŭtagmezon de vento kaj pluvo Ĝang Kongkjuan piediris al la kurejo. Survoje li renkontis soldaton irantan al kuraca grupo pro malsano, li transmetis sian pluvmantelon sur la sol-

daton. Tiu danke rifuzis ĝin kaj emocie diris: "Estro, ankaŭ vi estas ne sana!" Ĝang Kongkjuan diris: "Vi estas malsana, se vi malsekiĝos de pluvo, via malsano graviĝos." Tion dirinte li grandpaŝe iris plu en pluvego.

Ĝang Kongkjuan pensis pri soldatoj, amis soldatojn kaj zorgis ankoraŭ pri kreskado de soldatoj.

Li Ĉenggiu, diplomito de teknika mezlernejo aspiris esti teknika soldato sed ne volis resti en la gardista roto, kiam li ĵus aliĝis al la armeo. Iun tagon, post tagmanĝo Ĝang Kongkjuan interparolis kun Li Ĉenggiu sur herbejo. Ĝang Kongkjuan edifis lin: "Kiu gardstaris kaj defendis por vi la patrolandon, kiam vi lernas en lernejo?" "Ĉu estas permesite ke oni ne gardstaras kaj defendas la patrolandon, kiam ekzistas klasaj malamikoj en kaj ekster nia lando?" Serio da demandoj igis Li Ĉenggiu honte klini la kapon. Sekve Ĝang Kongkjuan rakontis okazintaĵojn en la militaj jaroj. Li Ĉenggiu gaje kapjesis: "Defendi Prezidanton Maŭ estas plej glorie, plej glorie!" Ekstariĝinte li forigis polvon sur sia kostumo kaj ĝoje paŝis al la posteno.

En januaro 1969, falis eksterordinare densa neĝo en la loko garnizonata de la trupo kaj la ĉirkaŭaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj renkontis malfacilojn je brula materialo. Ĝang Kongkjuan tuj proponis al la partia komitato de la trupo, ke la trupo kaj la familianoj donu parton de sia karbo al la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Krome, Ĝang Kongkjuan gvidis la komandantojn kaj batalantojn de la trupo haki multe da branĉoj. En neĝo profunda ĝis genuo ili dorsportis al la domoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj pli ol dek mil ĝinojn da karbo kaj pli ol cent mil ĝinojn da brulligno. Iu maljuna malriĉkampano emociite rememoris amaran pasintaĵon: "Iun jaron antaŭ la Liberiĝo falis neĝo tiel densa kiel la nuna, dume la banditoj-soldatoj de Kuomintango perforte malkonstruis domojn de ni malriĉuloj kaj forprenis la lignon kiel hejtaĵon! Sed en la neĝaj tagoj de la kuranta jaro niaj propraj soldatoj sendis al ni hejtaĵon, tion ni ja dankas al la bona gvido de Prezidanto Maŭ!"

Forpasis kamarado Ĝang Kongkjuan, kiu estis senlime fidela al Prezidanto Maŭ kaj senlime fidela al la popolo, sed lia nobla figuro ĉiam gravurigis en la koro de la amasoj, kaj lia revolucia spirito de senhalta batalo ĉiam inspiras la popolanojn brave marŝi antaŭen!

Dialektiko en Sekura Irigado de Kamionoj

EN 1968 mi aliĝis al ĈPLA kaj post mallonga trejnado mi komencis unuope stiri kamionon por plenumi transportajn taskojn. Dum plenumado de la taskoj, mi vive studis kun problemoj kaj vive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ, direktis la stirradon per Maŭzedongpenso kaj senĉese resumis sperton per la metodo dividi unun en du, sekure veturigis la kamionon je pli ol 35,200 km. sen ia ajn akcidento kaj estis elektita kiel soldato kun kvin bonoj en du sinsekvaj jaroj.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas

al ni: “Ideologio kaj politiko estas ankaŭ komando kaj animo. Se niaj ideologia kaj politika laboroj estos nur iom malstreĉitaj, ekonomia kaj teknika laboroj certe suriros eraran vojon.” El la praktiko de pli ol unu jaro, mi profunde komprenis, ke ankaŭ en stirado de kamiono ekzistas batalo inter du pensoj. Oni povos solvi diversajn komplikaĵojn, venki diversajn malfacilojn kaj sukcese plenumi sian taskon, nur se oni elstarigos la proletaran politikon, bone kondukos ideologian revoluciigon kaj komandos teknikon per politiko.

Ili komandas sian veturigon per Maŭzedongpenso.



EN PRETECO KAJ SEN PRETECO

Nia roto loĝas en iu granda urbo, kie estas multaj stratoj kaj vojirantoj. Kiam mi komencis unuope plenumi mian taskon, mi ofte renkontis neatenditajn okazaĵojn. Iuj diris: "La kamionoj mem entenas ian riskon, neeviteble ja okazos akcidento." Mi opiniis tiun diron iel prava kaj timis ke iam okazos al mi akcidento.

Studinte verkojn de Prezidanto Maŭ, mi sentis, ke tia penso ne konformas al liaj instruoj. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "... en farado de iu ajn afero, se oni ne konas ĝiajn cirkonstancojn, ĝian naturon kaj ĝiajn rilatojn kun aliaj aferoj, oni ja ne konas la leĝojn ĝin regantajn, ne scias kiel agi, kaj ne sukcesos ĝin bone fari." La ŝlosila punkto kuŝas en tio ke oni devas koni kaj mastri la leĝojn regantajn la laboron. Veturante en urbo, oni renkontas vojirantojn preskaŭ je ĉiu paŝo. Mi do ofte observas konscie stratojn kaj vojirantojn en malsamaj cirkonstancoj, por vidi ĉu la vojiranto venis ĵus de kamparo aŭ estas urbano, ĉu li iras al iu loko aŭ iras pripensante ion, kaj decidi, kie oni devas irigi malrapide la kamionon, kaj en kia cirkonstanco oni povas veturi en kia rapidumo, agante konforme al malsamaj cirkonstancoj. Renkontante vojiranton en medito, mi demalproksime sonigas averte. Sonigo ĉe proksimeco nur surprizus lin aŭ eĉ kondukus al akcidento. Kiam infanoj transiras stratojn, la ĵunuopaj ĝenerale estas akompanataj de plenkreskuloj. Se ili iras arope, kiam unu el ili estas transirinta la straton, la aliaj certe sekvas lin kure. Ĉe tia okazo, oni devas aparte atenti la antaŭirantan infanon. Iufoje, antaŭ ol mia kamiono preterpasis iun elirejon de strateto, subite el ĝi elruliĝis unu dratringo. Mi tuj konsciis, ke post ĝi eble kuras knabo kaj tuj bremsis la aŭton. Ĝuste kiam mia kamiono haltis, knabo spirege elkuris el la strateto. Akcidento estis evitita. Kiam oni ekkonis pli multajn okazaĵojn kaj iliajn leĝojn, al ili malpliĝis neatenditaj okazoj kaj kreskis la iniciativo en veturigado.



La verkinto studas verkon de Prezidanto Maŭ kaptante libertempon.

Tamen, kiel oni ne povas koni ĉiujn aferojn, oni ankaŭ povas renkonti neatenditajn okazaĵojn en veturado. Mi do tenas min ĉiam preta al eblaj surprizoj por preventi neatenditaĵojn. Unu afero estas akriigi la gardemon en la penso: veturigi la kamionon sur larĝa strato kiel sur mallarĝa, sur bona strato kiel sur malbona, sur strato kun malmultaj homoj kiel sur homplena, sur strato senhoma kiel sur tiu kun vojirantoj, kaj veturigi senŝarĝan kamionon kiel ŝarĝitan, kaj en veturado ĉiam teni certan distancon inter la kamiono kaj vojirantoj aŭ aliaj veturiloj por havi sufiĉan spacon disponeblan por eviti akcidenton. Alia afero estas materia preparo: bone protekti kaj diligente kontroli la kamionon por ke ĝi estu ĉiam en bona stato facile veturigebla kaj haltigebla sen ia ajn perturbo. Preteco multe diferencas de senpreteco. Kun preteco oni povas ĝuste regi diversajn komplikajn situaciojn kaj ĉiam troviĝi en iniciativa pozicio.

KONDIĈOJ FAVORAJ KAJ MALFAVORAJ

Ŝoforoj ĝenerale ŝatas stiri aŭton sur larĝa kaj ebena strato kaj timas veturi sur zigzaga strateto kaj kava montŝoseo; ili ŝatas stiri novan aŭton kaj timas veturigi malnovan. Iuj opinias ke kun

favoraj kondiĉoj oni povas glate plenumi taskon, kaj sub malfavoraj kondiĉoj okazas facile akcidentoj aŭ perturboj. Studinte la verkon de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro*, mi ekkomprenis: Kvankam la objektivaj kondiĉoj de la vojo kaj kamiono influas la sekurecon de veturado, tamen la decida faktoro estas la homo. Kiam oni havas la penson tutkore kaj tutanime servi al la popolo kaj ĉiam memoras la instruon de Prezidanto Maŭ **“Nia devo estas respondeci al la popolo. Ĉiu vorto, ĉiu ago, ĉiu politiko devas konformi al la intereso de la popolo”**, kaj ĉiam kiam oni estas ekstreme respondecemaj en ĉiu ago kiel treto de akcelilo, turno de stirrado aŭ manipulado de bremsa, oni povas venki la malfavorajn kondiĉojn de malbona vojo kaj malnova kamiono kaj garantii la sekurecon en veturado. Sen tia respondecema sinteno, eĉ sur bona vojo kaj per nova aŭto ne povas esti garantiata senigo je akcidento. Tial, ĉiufoje veturante sur strato larĝa kaj kun malmultaj homoj, mi same akriĝas mian singardemon kaj tenas la rapidecon en certa limo.

Sur malbona vojo aŭ dum malbona vetero, do mi, laŭ instruo de Prezidanto Maŭ **“Ĝi (materiisma dialektiko) konsideras eksterajn kaŭzojn kiel kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj”**, klopodas venki renkontitajn malfacilojn sur mia vojo. Iun fojon, mi kaj alia kamarado veturigis kamionon por transporti lignon de iu gubernio al alia. Estis nokto, furiozis vento, kaj la vojo estis malebena. Ni veturis intermite, pasigis sinsekvajn danĝerajn vojkurbiĝojn kaj travadis multajn riveretojn. Poste ni venis al ĵus konstruita digo, kie la vojo estis kruta kaj glita, ni dufoje ne sukcesis surgrimpigi ĝin. Ni do iris el la kamiono por esplori la vojon, kaj fine ni surgrimpis la digon kaj venke atingis la celokon. Alifoje, mi estis plenumanta taskon en neĝa tago. La vojo estis mallarĝa kaj glita kaj sur ĝi iris multaj homoj. Tio malfaciligis mian

veturadon. Kiam mi estis trapasanta iun straton, mi trovis, ke pli ol 20 metrojn antaŭ mia kamiono biciklas laboristo, kiu klopodas cedi la vojon al aŭto post si. Mi pensis, ke li eble glitfalos, kaj mi koncentris mian atenton por singardi kontraŭ komplikaĵo. Efektive, la laboristo falis meze de la vojo 6 metrojn antaŭ mia kamiono. Ĉar mi estis jam preta al eventualaĵo kaj mi sukcesis eviti la akcidenton.

La praktiko dum la du jaroj donis al mi konon, ke ŝoforoj povos garantii sekurecon de veturado kaj glate plenumi sian taskon sub objektivaj kondiĉoj malfavoraj, se ili plene disvolvos sian subjektivan aktivecon.

SPERTORIĈECO KAJ SPERTOMANKO

Kiam mi komencis sole stiri kamionon, mi ne estis kuraĝa en laboro, konsiderante ke mi ne multon lernis dum mallonga tempo kaj ne havas sufiĉan sperton. Kion fari? Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“Librolegado estas lerno, ankaŭ aplikado estas lerno kaj eĉ pli grava speco de lerno.**

Hjue Hiangdong (la dua de maldekstre) kaj liaj kumbatalantoj tre zorgas por teni aŭtojn ĉiam en bona stato.



Nia ĉefa metodo estas lerni militi en milito.” Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, mi aktive petis taskojn kaj, en plenumo de taskoj, mi atentis senĉese resumi sperton kaj modeste lerni de aliaj kamaradoj. Mi observis, kiel aliaj agas, kaj kiel mi, kaj tiel resumis sperton. Ĉiam, kiam akcidento okazis ĉe aliaj, mi serioze analizis ĝin por trovi la kaŭzon kaj kontroli, ĉu burĝonas ĉe mi ankaŭ simila simptomo kondukanta al simila akcidento, por ke mi eltiru el ĝi lecionon. Se oni ne lernos alies progresintan sperton, oni sendube ne povos progresi, se oni ne eltiros lecionon el alies akcidento, oni ne povos eviti similan akcidenton en sia laboro.

Studinte la brilan filozofian penson de Prezidanto Maŭ, mi profunde ekkonis ke riĉo kaj manko de sperto estas relativaj. Sub certaj kondiĉoj senspertulo povas turniĝi en spertulon, malmulta sperto povas turniĝi en multon da sperto. La ŝlosila punkto kuŝas en tio, ke la afero devas esti direktata per ĝusta penso. Post praktika laboro dum certa tempo, kiam mi povis lerte orientiĝi en diversaj komplikaj situacioj dank’ al altiĝo de mia tekniko kaj akumuliĝo de sperto, mi fariĝis fiera kaj memkontenta, opiniante, ke stirado de kamiono ne estas io malfacila, kaj ek-

volis veturigi la kamionon rapide por elmontri mian kapablon. Ĉe la apero de tia penso, mi tuj studis la instruon de Prezidanto Maŭ **“Multaj aferoj povas fariĝi nia balasto aŭ ŝarĝo, se ni nur falis en blindecon pri ili kaj perdis memkonscion”**. Kaj mi ekklopodis kulturi al mi stilon de modesteco kaj singardemo, direktas miajn agojn per la penso de daŭra revoluciado, petas de miaj kamaradoj kritikojn kaj faris konkretajn aranĝojn por korekti miajn erarojn. Mi prenas ŝoforan veturigejon kiel lokon por vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson kaj studas ĉie, kien mi veturas. Mi hardas mian fidelecon al Prezidanto Maŭ en praktika laboro, prenante la stiradon de kamiono kiel procedon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, de batalo kontraŭ egoismo kaj kritiko al reviziismo kaj de remuldo de la mondkoncepto.

Linion strekas kamiono; mil cirkonstancoj kaŝinsidas. Sur unu sama stirado, du mondkonceptoj konkurvidas. Nur kiam oni vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, bone kondukas sian ideologian revoluciigon kaj komandas teknikon per politiko, oni povas venke marŝi antaŭen en ĉia ajn cirkonstanco laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.



GRANDTIPA DUKORPA ŜIPO POR PASAĜEROJ KAJ FRAJTAĴOJ

La Kingŝan-a Ŝipkonstruejo de la Jangzi-rivera Transporta Kompanio finkonstruis lastatempe la unuan grandtipan dukorpan ŝipon por pasaĝeroj kaj frajtaĵoj sur Jangzi-rivero kaj faris kontribuon por la disvolvo de la surakva transportado de nia lando.

La grandtipa dukorpa ŝipo por pasaĝeroj kaj frajtaĵoj estas kune projektita de la Jangzi-rivera Transporta Kompanio, la Projekta Instituto de Janzi-rivera Transporto kaj la Ŝanhaja Instituto de Ŝipkonstrua Scienco. La

ŝtalaĵoj kaj ekipaĵoj uzitaj por ĝi ĉiuj estas fabrikitaj de nia lando kaj teknologioj aplikitaj por ĝi estas progresintaj. Ĝia prova navigado montris, ke tia ŝipo veturas stabile, pli rapide kun ne tiom grandaj ondoj ĉe la poŭpo kaj ĝi estas facile stirebla kaj tute konforma al la postuloj en navigado en Jangzi-rivero.

LIGNOFIBRA TABULO

La revoluciaj laboristoj de la Sesa Lignaĵa Fabriko de Ŝenjang finkonstruis modernan laborejon por produkto de lignofibraĵoj kaj jam produktis la unuan kvanton da lignofibraĵoj per aŭtomataj ekipaĵoj projektitaj, fabrikitaj kaj instalitaj de nia lando.


La produktado de lignofibraĵoj estas efika aranĝo por sinteza uzo de ligno kaj utiligo de ĝia latentaj eblaĵoj; tio ĉi havas gravan signifon por la disvolvo de la socialisma ekonomio de nia lando. Post sia oficiala ekfunkcio, tiu laborejo povas ŝpari dek mil kubmetrojn da ligno por la ŝtato en ĉiu jaro.

La Filmo “Batalo per Minoj”

“Batalo per Minoj” estas eduka filmo por propagandi la penson de Prezidanto Maŭ pri la popola milito. Ĝi vivece konigas armitajn batalojn en nia Giaŭdong-bazloko dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Sekvante instruojn de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la vastaj popolamasoj de la bazloko unuflanke persistis en produktado kaj aliflanke kondukis armitajn batalojn kontraŭ la malamiko. Ĉiu homo kaj ĉiu vilaĝo memstare batalis. Per indiĝenaj minoj ili enterigis malamikojn ĉie, ĉu ĉe vilaĝofinoj, vojkrucoj, piedoj de montoj, aŭ sur ŝoseo. Tiamaniere ili kunagis kun niaj ĉefaj trupoj kaj lokaj trupoj, fine ekstermis komplete la japanajn agresantojn kaj akiris grandajn venkojn.

La ĉefaj trupoj kaj la milicanoj kune ekstermas ĉiujn japanajn agresantojn el Huangcun-vilaĝo.







La milica taĉmentestro Gaü Hu estas eminenta heroo. Jen li pretas tiri fajroŝnuron de mino por forte bati malamikojn.



La milicanino sagace kroĉas fajroŝnuron a. mino por bati la entrudiĝantajn malamikojn.



La milicanoj faras falsan minon por trompi la malamikajn minforigistojn.





La milicanoj atente gvas movdirekton de la malamikoj por ĝuste kapti batalan ŝancon kaj forte bati ilin.

Batalo per minoj teruras la malamikojn kaj kaŭzas al ili gravajn perdojn.





Rekognoska Heroo Jang Jucaj

EN la komenco de la kvindekaj jaroj, kiam la usona imperiismo lanĉis armitan agreson kontraŭ la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kaj per tio serioze minacis sekurecon de nia lando, nia popolo organizis la Ĉinajn Popolajn Volontulojn, kiuj kune kun la heroaj armeo kaj popolo de Koreio venkis la usonajn agresantojn. Tiam el la Ĉinaj Popolaj Volontuloj emergis sennombraj herooj, inter kiuj estis Jang Jucaj.

En 1953, la rekognoska vicplotonestro Jang Jucaj ricevis ordonon, ke li gvidu malgrandan grupon profundigi en la postfronton de la malamiko kaj surprizataku la t. n. "elitan trupon" — "Blanktigran Regimenton" por kunagi kun niaj ĉefaj trupoj en sudenpuŝado.

Profundan nokton de la 13-a de julio, Jang Jucaj gvidis 12 rekog-

noskistoj ekiri de la fronta pozicio. Laŭ la planita linio ili paŝis en la unuan defendlinion de la malamiko. La antaŭiranta Ĝaŭ Ŝunhe subite mallaŭte raportis: "Mino! Vicplotonestro, mi piedtuŝas minon!"

"Piedpremu, ne moviĝu!" diris Jang Jucaj kaj alkuris. Jang Jucaj aplombe kaj lerte skrapis teron ĉirkaŭ la mino kaj trovis ke ĝi estas kontraŭtanka mino usona. Li sciis, ke tia mino ne povas eksplodi sen premforto de pli ol 90 kg., sed por sekureco li ordonis ĉiujn kuŝiĝi, kaj poste lasis Ĝaŭ Ŝunhe formovi la piedon, kiu premis la minon. Tiel ili sekure preterpasis la minon.

Por eviti la minan zonon kaj plirapidigi marŝadon, ili ekkuris antaŭen laŭ rivereto. Post ne longe ili surpaŝis ŝoseon kaj sin ĵetis al la direkto, kie estis sidejo de la regimenta stabo de la malamiko.

Profitante la ŝancon de brilado de lumiga bombo de la malamiko, Jang Jucaj nombris sian grupon kaj subite trovis plian homon ĉe la fino de la grupo. Li tuj ordonis al la interliganto Han Tannian alvenigi tiun kaj rimarkis ke tiu estas malamika soldato sin kaŝanta en herbaro timigite de nia potenco bombardado. Kiam niaj rekognoskistoj preterkuris tie, li misprenis tion kiel retiriĝon de sia propra trupo kaj iris el la herbaro.

"Respondu, kio estas la pasvorto?" Han Tannian tuj pridemandis la kaptiton laŭ aludo de Jang Jucaj.

"La pasvorto estas...gulunmuoŭba!..." respondis la kaptito tutkorpe tremante, kiam li eksciis, ke antaŭ li estas la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.



Jang Jucaj (la tria de maldekstre en la antaŭa vico) kaj liaj kumbatalantoj

Post pridemando al la kaptito pri la stabo de la "Blanktigra Regimento", Jang Jucaj tuj sendis sian kamaradon eskorti lin al sia posta trupo kaj lia grupo daŭre marŝis antaŭen.

Ili trapasis multajn postenojn de la malamiko, kaj subite trovis multajn kamionojn plenajn de malamikoj kaj municio norden veturantajn. Kiam ili lasis pli ol 30 aŭtojn forveturi, aŭdiĝis en la nordo reciprokaj kanonado kaj pafado inter niaj trupoj kaj la malamikoj. La aŭta kolono subite haltis kaj ŝtopis la ŝoseon, la malamikoj en la aŭtoj tumultis. Han Tannian alrampis antaŭ Jang Jucaj kaj diris: "Malbonŝance, la malamikoj volas ĉi

tie descendi por kolektiĝo."

"Ni ne devas plu atendi," Jang Jucaj tuj ordonis, "po du homoj ataku unu aŭton, rapide transsturnu la ŝoseon en haoso de la malamikoj! La loko por rekuniĝo estas poplo transe de la ŝoseo." Je levo de lia pistolo malamika ŝoforo falis teren. En palpebrumo, mangrenadoj unu post alia eksplodis en aŭtoj, kaj kugloj kiel pluveroj traflugis amasojn de la malamikoj, kiuj panike falis en haoson. En tiu momento Jang Jucaj gvidis siajn kamaradojn transsturni la ŝoseon.

Konsiderante, ke la malamika stabo de la regimento eble forkuros surprizite de tiu batalo, Jang Jucaj

ordonis, ke Li Pejlu kaj aliaj du kamaradoj unue ekstermu la gardan plotonon de la malamika stabo. Kiam tiuj proksimiĝis al la regimenta stabo, ili trovis ke la malamikoj efektive intencas forkuri. Jang Jucaj tuj dividis siajn rekognoskistojn en tri grupetojn por ekstermi malamikojn samtempe en kelkaj gravaj lokoj.

En palpebrumo batalo komencis en kelkaj lokoj. Tondraj pafado kaj eksplodado skuis la stabon de "Blanktigra Regimento". Post intensa batalo, la malamikoj kapitulacis unuj post aliaj levante siajn manojn, kaj la flago de la "Blanktigra Regimento" estis deprenita de ni.

Ne Troviĝas Fina Stacio por Revolucia Trajno

— Pri brilaj faroj de la grupo de la lokomotivo "Maŭ Zedong"

SUR longa fervoja linio de nia lando tagnokte galopas lokomotivo, nomita laŭ la nomo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, tirante vagonaron plenŝarĝitan per materialoj por konstruado. Plena je revolucia patoso por gajni gloron por Prezidanto Maŭ, la laboristoj de tiu lokomotivo luktis kun la sama penemo dum 24 jaroj kvazaŭ en unu tago, ĉiujare kaj ĉiumonate superplenumis sian transportan taskon kaj tiel faris grandegan kontribuon por la revolucio.

SUBTENO AL LA LIBERIGA MILITO

La glora nomo de la lokomotivo estis honore gajnita en la periodo de la Liberiga Milito. En 1946, subtenate de la usona imperiismo, la kuomintang-a reakciularo provokis landskalan internan militon. Aktive respondante la alvokon de la Partio, la ĵus liberigitaj laboristoj de la Harbina Lokomotiva

Sekcio decidis per praktikaj agoj subteni la Liberigan Militon. Ili pene laboris 27 tagnoktojn kaj finriparis malnovan lokomotivon. Por esprimi sian decidemon strikte sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ en revoluciado, la laboristoj petis nomi la lokomotivon per la nomo de Prezidanto Maŭ. Laŭ la peto de la laboristoj, la supera gvida institucio oficiale nomis la riparitan lokomotivon per "Maŭ Zedong" je la 30-a de oktobro, 1946.

Tiu brila nomo donis gigantan kuraĝigon al la laboristoj de la lokomotivo. Ili firme decidis veturi tien kien montras Prezidanto Maŭ. Spite al la danĝero de tuŝo de minoj sur la fervojo ĵus detruita de la malamiko, ili kun sentima heroo spirito aktive plenumis la transportan taskon de subteno al la fronto, puŝante antaŭen la vagonojn per la lokomotivo. Tiam tre malfacilaj estis la materiaj kondiĉoj. Mankis al ili viŝaĵo por la lokomotivo, ili do anstataŭe uzis ĵutsakajn pecojn, ĉifonajn vestojn kaj pajlon; por ricevi grason, ili repreparis la uzitan. Por la venko sur la fronto,

la laboristoj tagnokte luktadis kun alta batalvolo, manĝis kaj tranoktis en la vagono speciale alkroĉita post la lokomotivo, por ke la lokomotivo ĉiumomente estu preta, atendante ordonon, sed ne lasante ordonon atendi la lokomotivon.

Iuvespere en decembro, 1948, la lokomotivo "Maŭ Zedong" revenis al sia lokomotiva sekcio por atendi ordonon. En tiu tempo estis iu urĝa milita vagonaro, kiu devis veni al Ang-anĝi antaŭ la mateniĝo de la sekvinta tago. Ordinare, lokomotivoj de la Harbina Lokomotiva Sekcio veturis nur inter Harbin kaj Anda kaj la veturigon de Anda ĝis Ang-anĝi respondecis alia lokomotiva sekcio. Tamen, pro urĝeco de tiu trajno estis ne permesite ŝanĝi lokomotivon en Anda. La grupo de la lokomotivo "Maŭ Zedong" meminciate prenis sur sin la taskon, kvankam por ĝi estis multaj malfaciloj, ke parto de tiu vojo estis ne konata. Post detala studo ili faris aranĝon por pliigi la rapidecon sur la bazo de sekureco kaj fine atingis Ang-anĝi antaŭ la tempolimo. La gvidantoj de la trupo veturintaj en tiu trajno speciale iris al la lokomotivo por saluti kaj kuraĝigi ilin. Premante la manojn de la laboristoj ili diris: "Vi tre bone plenumis la taskon, dankon al vi!" La grupo de la lokomotivo "Maŭ Zedong" ĝuste tiel elstare plenumis foje-refoje militajn transportajn taskojn, forte subtenante la Liberigan Militon.

Sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la komando de Vicprezidanto Lin Biaŭ, la heroo Ĉina Popola Liberiga Armeo liberigis la tutan teritorion de Nordoriento kaj tuj poste marŝis suden post la venko. Ju pli granda estis la venko en la fronto, des pli peza estis la tasko de milita transporto ĉe la postfronto. Plenaj de batala patoso, la kamaradoj de la lokomotivo iris renkonte al la liberiĝo de la tuta lando. Ilielmetis sonorante sloganon: "Kien atingis la Popola Liberiga Armeo, tien etendiĝos la fervojo kaj veturoj lokomotivo 'Maŭ Zedong'!" En marto de 1949, sekvante la Liberigan Armeon, ili trapasis la pasejon Ŝanhajguan kaj plenumis pezajn transportajn taskojn en Ĝengĝou, Hjuĝou, Ginan k. a. kontribuante por la Liberiga Milito.

GAJNI GLORON POR PREZIDANTO MAŬ

Ekde sia naskiĝo la lokomotivo "Maŭ Zedong" ricevis koran zorgon de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio. Post la liberiĝo de la tuta lando Prezidanto Maŭ plurfoje akcep-


tis la reprezentantojn de tiu grupo de la lokomotivo. En oktobro de 1966, okaze de la 20-a datreveno por nomi la lokomotivon per "Maŭ Zedong", la intima kunbatalanto de Prezidanto Maŭ Vicprezidanto Lin Biaŭ faris surskribon por la lokomotivo: "La popola revolucio direktata de Maŭzedongpenso estas la lokomotivo de antaŭenmarŝo de la historio."

La kora zorgo de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin estas giganta forto, kiu kuraĝigas la laboristojn senĉese marŝi antaŭen. Kun la decido gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la socialisma patrolando ili senĉese kreis elstarajn rezultojn.

En la granda batalo kontraŭ la usona imperiismo por helpi Koreion, kun ĝisosta malamo kontraŭ la malamiko, la laboristoj de la lokomotivo iniciatis veturigi superŝarĝitan vagonaron, por multe kaj rapide transporti en plenforta subteno al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj batalantaj kun la korea popolo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo. Sub la propono de la grupo de la lokomotivo "Maŭ Zedong" kaj subteno de la superaj gvidantoj, la fervoja buroo, al kiu apartenis la lokomotivo, levis ardan konkursan movadon de superŝarĝa transporto. En tiu movado la grupo de la lokomotivo "Maŭ Zedong" plenumis sekuran veturadon de 200,000 kilometroj kaj tiel kreis rekordon de sekura veturado de lokomotivo en la tuta buroo, kaj pro tio ĝi estis elektita kiel la unuaklasa modela kolektivo de la buroo.

Konforme al la bezonoj de la situacio de impeta disvolviĝo de nia nacia ekonomio, la lokomotivo plurfoje ŝanĝis sian tirnormon kaj per la malnovtipa lokomotivo kreis senĉese novan rekordon de ŝarĝo kaj rapideco. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la grupo firme efektivigas la grandan principon de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito"** kaj veturas tien kie oni bezonas. En la plenumado de taskoj, disvolvante la ĝisfundan revolucionan spiriton de timo nek al malfaciloj nek al morto, la grupo kreis brilajn heroaĵojn unu post alia kaj tiel faris novan kontribuon al la popolo.

En la somero de 1968, la lokomotivo "Maŭ Zedong" plenumis transportajn taskojn sur la linio norde de Vuhan. Tie troviĝas Vuŝengguan kun kruta deklivo, kiu estas nomata "malfacile trairebla pasejo" sur tiu linio. Ordinare estis malfacile eĉ por du grandaj lokomotivoj por tiri



Antaŭ veturigo la laboristoj zorgeme kontrolas la lokomotivon.

vagonaron tra tiu parto de la linio, des pli malfacile estis por la lokomotivo “Maŭ Zedong”, kiu estis malgranda kaj krome unuafoje veturis sur tiu linio. Kun tiu demando la laboristoj restudis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“strategie ni devas malestimi ĉiujn malamikojn, sed taktike ni devas trakti ilin ĉiujn serioze”** kaj levis sian kuraĝon por venki malfacilojn. La laboristoj diris: Granda estas la kruteco de la deklivo, sed ĝi estas malpli granda ol la decidemo de la laboristoj armitaj per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso; alta estas la deklivo, sed ĝi estas malpli alta ol la konscio de la laboristoj pri batalo inter la du linioj. Ili serioze faris esploron kaj enketon, modeste lernis de lokaj veteranaj laboristoj kaj ellaboris konkretajn aranĝojn.

En la tago, kiam ili devis trapasi la “pasejon”, la lokomotivo “Maŭ Zedong” ekiris de Vuhan tirante vagonaron superlongan kun ŝarĝo de proksimume 3,000 tunoj. Sidante en la stirejo, la veterana veturigisto Guo Jingfu direktis siajn okulojn antaŭen, por rigardi linion kaj signalon.

Kiam li ekpensis ke la lokomotivo, kiun li veturigas, portas la nomon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, lia koro forte ekondis kaj li neniel povis ĝin kvietigi. Li faris firman decidon nepre trapasi tutforte Vuŝengguan por gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la granda socialisma patrolando. Dank’ al unuanima unuiĝo kaj klopodado de la tuta grupo kaj intima kunlaboro de la helpa lokomotivo, ili fine venkis la malfacilojn kaŭzitajn de la alta kaj longa deklivo, triumfe trapasis Vuŝengguan kaj ĝustatempe atingis la cellokon.

La amasoj laŭdis ilin: La grupo de la lokomotivo “Maŭ Zedong” ja meritas la nomon de heroa kolektivo armita per Maŭzedongpenso.

LUKTI PENEME POR ĈIAM MARŜI ANTAŬEN

Strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, la laboristoj de la lokomotivo brave marŝas antaŭen sur la vojo de daŭrigo de la socialisma revolucio. Ili diris: “Ne troviĝas fina stacio

por revolucia trajno.” Dum la pasintaj 24 jaroj, tiu grupo ne nur transportis milionojn da tunoj da bezonataj materialoj al diversaj lokoj de la patrolando, sed ankaŭ kulturis kaj hardis nombron da novaj socialismaj homoj. De kiam la lokomotivo ricevis sian nomon, en ĝi laboris sinsekve kvin lokomotivaj estroj kaj 90 laboristoj. Ŝanĝiĝis la gvidantoj kaj laborantoj de la lokomotivo kaj ŝanĝiĝis la cirkonstancoj kaj kondiĉoj de laboro, sed, malgraŭ ĉiu ŝanĝiĝo, neniam ŝanĝiĝas ilia ruĝa koro por strikte sekvi Prezidanton Maŭ en revoluciado, nek ŝanĝiĝas ilia revolucia spirito de penema lukto en malfaciloj kaj ilia laborstilo de modesteco kaj singardemo.

Ĉiufoje kiam novaj laboristoj venis al la lokomotivo, ĝia partia grupeto kondukis ilin antaŭ la lokomotivon kaj donacis al ili la plej valoran donacaĵon *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj rakontis al ili la gloran historion de la lokomotivo, tiel ke la novaj laboristoj sciis domaĝi la gloran nomon de la lokomotivo tuj post sia veno al ĝi. Ili decidis heredi kaj disvolvi la revolucian tradicion de la lokomotivo, armi sin per Maŭzedongpenso kaj starigi firman volon veturigi ĝin por la revolucio. Antaŭ nelonge, iu juna laboristo post sia

veno al la lokomotivo sentis sin tre glora kaj feliĉa, sed post iom da tempo li opiniis, ke ĉi tie oni postulas pli severe ol alie kaj la laboro estas peniga. Rimarkinte tiun penson, la partia grupeto tuj organizis ĉiujn studi la “tri popularajn artikolojn”. Per rakonto de sia mizera vivo persone spertita en la malnova socio, maljunaj laboristoj edukis la junan laboriston, tiel ke la lasta ekhavis novan komprenon pri feliĉo kaj penado. Li diris: “Sukceso venas post venko de malfaciloj, kaj plej feliĉa estas penado por la revolucio.” Post altigo de sia konscio, li meminciate faris malfacilajn kaj lacigajn laborojn, konscie hardis sian revolucian volon kaj rapide progresis.

Firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ “**ŝpari ĉiun moneron por la milito kaj revolucia afero kaj por nia ekonomia konstruado**”, la laboristoj de la lokomotivo praktikas rigoran ŝparadon kaj peneme luktas en malfaciloj. En la lokomotivo oni instalas “trezoran keston” por konservi eluzitajn kaj malnovajn objektojn kaj sitelon por teni ŝparitan oleon. Kaj estis oleujo, kiun oni uzis jam 20 jarojn. Ili ĉiuj estas “trezoroj” hereditaj de generacio al generacio sur la lokomotivo por daŭrigi la tradicion de lukto sub



Guo Jingfu (la dua de maldekstre) interŝanĝas spertojn kun aliaj lokomotivistoj.

En Servo al Disvolvo de Agrikultura Produkto

LA Fabriko de Akcesoraĵoj por Internebrulaj Motoroj en Handan estas malnova fabriko kun glora revolucia historio.

Dum militaj jaroj ĝi estis grupo, kiu militiris kun trupoj, riparante kaj farante armilojn. Tiam ĝi konsistis el nur 13 personoj, kiuj sekvis Prezidanton Maŭ, marŝante jen suden jen norden kun blovilo kaj fandforno sur la ŝultroj. Ili faris el eluzita fero primitivajn minojn kaj mangrenadojn kaj riparis kaj fabrikis pafilojn, kaj tiel kontribuis al batalo por gajni venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Liberiga Milito.

Post la Liberiĝo ĝi transformiĝis en fabrikon sub gvido de la loka aŭtoritato. Kun la vigla disvolviĝo de socialisma konstruado, la fabriko senĉese grandiĝis. Nun en ĝi laboras 1,065 oficistoj kaj laboristoj por plenumi la taskon de fabriko de 32 specoj de produktaĵoj uzataj en agrikulturo.

malfacilaj kondiĉoj. Foje, iu juna laboristo nove alveninta proponis ŝanĝi ŝovelilon, konsiderante, ke ĝi jam difektiĝis. Montrante la "trezorojn", maljuna laboristo rakontis al li la gloran tradicion de penema lukto sub malfacilaj kondiĉoj, tiel ke la lasta ekkonsciis sian mankon de spirito de penema lukto kaj diris: "Difektiĝis ne la ŝovelilo, sed mia cerbo." Li riparis la ŝovelilon kaj ĝin uzas ankoraŭ nun.

Dum irado de la lokomotivo, la hejtisto ĉiam pesis kaj prikalkulis ĉe dono de ĉiu ŝovelilo da karbo por kiel eble plej ŝpari ĝin. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj ili ŝparis por la ŝtato pli ol 7,000 tunojn da karbo kaj 18,000 *yuan* da diversaj elspezoj.

Estante en la lokomotivo, la laboristoj ĉirkaŭprenas en sia koro la patrolandon. Ili ligas sian laboron kun la tuta revolucia afero kaj mem-

Dum 20 jaroj, la fabriko ĉiam sekvis la instruojn de Prezidanto Maŭ, entreprenis sian laboron peneme en malfaciloj, apogante sin sur la propraj fortoj kaj plenkore kaj tutanime servis al la agrikultura produkto, kaj tiel fariĝis ruĝa flago en servado al agrikultura produkto.

Por persisti pri la direkto de servo al agrikultura produkto, la nomita fabriko trapasis zigzagojn kaj batalojn.

Pro sia bona tradicio, la fabriko tuj post sia fondiĝo turnis sian vizaĝon al la kamparo produktante kaldronojn kaj malgrandajn agrikulturajn instrumentojn bezonatajn de kamparanoj. En la jaroj de la granda antaŭensalto, la laboristoj de la fabriko liberigis sian penson, kuraĝe pensis, kuraĝe agis, kaj fabrikis nombron da dizeloj 12-ĉevalpovaj, kiuj trovis varman akcepton ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ta-

konscie servas kiel ŝraŭboj de la revolucio.

En la lokomotivo estas ĉirkaŭ cent maŝinpecoj kaj mil ŝraŭboj. Ĉiufoje, antaŭ ekveturo, la laboristoj zorge frapadas ilin per marteletoj por fari detalan kontrolon. Kia ajn malfacila estas la kondiĉo, ili ĉiam montras sin kun granda zorgemo. En iu neĝtago, pro okupateco de transporto multaj lokomotivoj devis esti kontrolataj kaj okupis ĉiujn porkontrolajn fosaĵojn. Por garantii ĝustatempan ekveturigon ili direktis la lokomotivon super forlasitan fosaĵon plenan de neĝo. Starante en neĝo ili zorgeme kontrolis ĉiun maŝinpecon por ke la lokomotivo veturu en plej bona stato. Dum 24 jaroj la lokomotivo "Maŭ Zedong" sekure veturis pli ol 2,000,000 kilometrojn sen respondeca akcidento kaj fariĝis la lokomotiva grupo de vartransporto, kies sekura veturado estas la plej longa en fervoja transporto de nia lando.



Revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de tiu fabriko rakontas sian komprenaĵon en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

men, poste, iuj gvidantoj de la fabriko, venenitaj de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato Liu Ŝaŭki, praktikis en la produktado “komandon de profito” dum iu periodo. Por ĉasi profiton, ili ne zorgis pri la kvalito de produktaĵoj, kaj tiel kaŭzis grandan malŝparon al la ŝtato. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj indigne deklaris: “Ne pensu pri ŝanĝo de nia direkto de servo al la agrikultura produkto!” Kuraĝe irante renkonte al malfaciloj, ili daŭre persistis ĉe la direkto de servo al la agrikulturo. Ili nove produktis terpremilon tireblan per traktoro kaj aliajn akcesoraĵojn de agrikulturaj maŝinoj, daŭre marŝante antaŭen sur la elektita vojo.

La Granda Proletara Kultura Revolucio portis al la fabriko ankoraŭ pli grandan prosperacon. La vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj forte kritikis la kontraŭrevoluciajn reviziismajn nigrajn varojn de la granda renegato Liu Ŝaŭki, kiaj “komando de profito”, “stimulo per materio” k. a. La revolucia komitato de la fabriko organizis la amasojn plie lerni la instruojn de Prezidanto Maŭ pri la subteno de industrio al

agrikulturo, tiel ke la oficistoj kaj laboristoj de la tuta fabriko pli klare kaj pli firme starigis en si la ideon de servo al la agrikultura produkto. Membroj de la revolucia komitato gvidis pli ol cent laboristojn profunde iri al popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj por fari enketojn kaj pristudojn, vaste kolektante opiniojn de komunumanoj. En 1969, laŭ bezono por disvolvi agrikulturon, ili produktis 1,500 dizelojn de la tipo “195—4” kaj sukcese provproduktis 10 malgrandajn traktorojn de la tipo “Dongfeng 12”, kiuj estas utiligeblaj en plugado kaj transporto kaj ankaŭ kiel movforto por generatoroj, pumpiloj, mueliloj kaj il-maŝinoj. Tiuj produktaĵoj estis facile kaj oportune manipuleblaj, fortikaj, malkaraj kaj altefikaj; komunumoj kaj brigadoj varme akceptis ilin pro ilia utilo en preparo kontraŭ milito kaj disvolvo de produkto. En la kuranta jaro la produktkvanto de dizeloj duobliĝis kaj

ankaŭ la produkto de malgrandaj traktoroj estas enmetita en la planon.

En produkto de tiuj maŝinoj por subteni la agrikulturon, la revolucia komitato kaj la vastaj amasoj de la nomita fabriko sekvis la instruojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**” kaj “**peneme lukti en malfaciloj**”.

Kiam la fabriko prenis sur sin la taskon de produkto de dizeloj de la tipo “195—4”, mankis al ĝi necesaj ekipaĵoj, teknikaj fortoj kaj laborejo. En tia situacio, interbatalis du pensoj en la problemo, ĉu venki la malfacilojn kaj plenumi la taskon, sinapogante sur la propraj fortoj aŭ peti de la supera instanco la bezonaĵojn.

La revolucia komitato de la fabriko organizis kurson de Maŭzedongpenso kun la problemo “sur kio sinapogi por disvolvi produkton” kiel diskuttemo. En ĝi ili gvidis la amasojn ripetade lerni la grandajn principojn de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj**” kaj “**peneme lukti en malfaciloj**”, forte kritiki la kontraŭrevoluciajn reviziismajn nigrajn

varojn de la granda renegato Liu Šaŭki, kiaj “tekniko la unua”, “la amaso estas malprogresema” k. a., rememori la historion pri malfacila starigo de la fabriko kaj kontroli la firmecon de la ideo pri sinapogo sur propraj fortoj. Dank’ al lernado kaj kritikado, kreskis ĉe ĉiuj kuraĝeco kaj memfido. La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj venis al la firma respondo: “Per du manoj plus la ruĝa koro, ĉion havos ni, nin apogante sur niaj propraj fortoj!” Ne sufiĉis laborejo; oni evakuis loĝĉambrojn. Mankis teknikaj fortoj; oni lernis dum laborado. Dank’ al riparado kaj utiligo de la malnovaj kaj eluzitaj kaj amasa movado de teknikaj renovigoj, oni sukcesis mem fari 42 ilmaŝinojn por produkti specialajn maŝinpecojn kaj pli ol 80 seriojn da diversaj instrumentoj kaj formis kvin produktajn liniojn, tiel ke ili fine produktis la unuan grupon da dizeloj antaŭ la planita dato. Teknike, la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj kuraĝas surgrimpiti altajn pintojn. La elektronaj tuboj de la importita 30-kilovata altfrekvenca elektra forno, kiun la fabriko uzas, estas karaj

en prezo, malŝparaj en elektra konsumado, mallongaj en vivo, malaltaj en efikeco kaj malbonaj en kvalito, kaj serioze influis la produkton de dizeloj. La laboristoj decidis anstataŭigi ilin per elektronaj tuboj produktitaj en nia lando. Post pli ol 100 provoj, oni fine sukcesis en la reformado. La kvalito de produktaĵoj estis garantiita kaj la efikeco en prilaboro de maŝinpecoj de dizeloj estis plialtigita je pli ol duoblo kompare kun antaŭe. La prezo de la elektronaj tuboj, kiuj estas altkvalitaj kaj fortikaj kaj povas funkcii normale sub alta aŭ malalta tensio, reduktiĝis per 90%. Dank’ al tio la produkta periodo estis mallongigita kaj la bezonoj de la komunumoj kaj brigadoj estis ĝustatempe kontentigitaj.

El la praktikado de produkto de dizeloj, la vastaj amasoj de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la fabriko profunde ekkomprenis, ke estas multaj vojoj por disvolvi produktadon, tamen la plej fundamenta vojo estas tiu de sinapogo sur propraj fortoj. Veteranaj laboristoj diris kun

profunda konvinkigo: “Ke ni povis produkti armilojn por bati la malamikon en la pasinteco, kiam ni gerilis kun simplaj instrumentoj sur la ŝultroj dum la militaj jaroj, tion ni dankis al nenio alia ol sinapogo sur la propraj fortoj. Nun ni havas pli bonajn kondiĉojn, ni des pli devas apogi nin sur la propraj fortoj por disvolvi produkton kaj kontribui en subteno al la agrikultura produkto kaj socialisma revolucio de la lando.”



Dizeloj de la tipo “195—4” produktitaj de tiu fabriko per la propraj fortoj

Fekundaj Kampoj el Sterila Tero

BAER-BRIGADO de Ginvej-komunumo en la gubernio Ginŝan, Ŝanhajo, situas ĉe la golfo Hangĝou kaj distancas ĝis la Orienta Maro nur per unu digo.

De kiam la granda gvidanto Prezidanto Maŭ alvokis por fondi popolajn komunumojn en 1958, ĝi akiris kontinue pliiĝajn kaj altajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj sur la vojo de komunumigo. En 1969, la pomua produkto de ĝiaj pli ol mil muoj da grenkampoj superis 1,800 ĝinojn, je 3.27 obloj pli multe ol tiu de la jaro 1957 antaŭ la fondo de la komunumo. Inter ili tiu de la pli ol 500 muoj de tririkoltaj grenkampoj atingis meznombro 2,330 ĝinojn. Ankaŭ la produkto de kotono kaj kolzo multe disvolviĝis.

I

Pro proksimeco al la maro 80% de la tero de Baer-brigado estis sabloza kaj saloza grundo. La produkto antaŭe estis tre malalta.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“La havaĵoj de la socio estas kreitaj de la laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj mem. Se ili ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive solvas ilin, ĉiu ajn malfacilo en la mondo estas solvebla”**, en la agrikultura kooperiga movado, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tieaj organizis interhelpajn grupojn kaj poste produktan kooperativon, faris bataladon kontraŭ la malriĉeco kaj ŝanĝis la naturon, sinapogante sur la kolektivaj fortoj.

La ŝlosila metodo por ŝanĝi la malriĉecon kaj postrestintecon de Baer-brigado estis reformi la grundon, entrepreni akvoutiligajn konstruojn kaj pliiĝi sterkon. Kiam ĝia partia filio elmetis la malfacilan taskon elfosi la surfundaĵon de la 82 riveretoj por reformi la grundon de pli ol 1,600 muoj da agroj de la brigado, iuj pense konservativaj homoj esprimis dubon. Ankaŭ la nebone reformitaj bienuloj kaj kulakoj mokis kaj rikanis de flanko. Sed tio ne povis ŝanceli la firman volon de la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkampara-

noj kaj kadroj de la brigado por reformi la sterilan teron. La respondeculoj de la partia filio gvidis la kooperativanojn batali sur la fronto ĉe surfundaĵosado de frua mateno ĝis mallumiĝo.

En 1958 la popola komunumo fondiĝis en la alta tajdo de la granda antaŭensalto, la kolektiva forto fariĝis pli granda kaj la komunumanoj laboregis ankoraŭ pli fervore.

Laboregante tri sinsekvajn jarojn, ili efektivigis sian ĵuron, elfosis la surfundaĵon de la 82 riveretoj, surkovris ĉiun muon per 15-20 tunoj da nigra ŝlimo el la riveretoj kaj en la areo dragis ĉiujn riveretojn, kiuj alkondukas dolĉan akvon el la rivero Huangpu por irigacio. De tiam la rikolto de la brigado ĉiujare kreskis. En 1960 la pomua grenprodukto superis 1,000 ĝinojn. En la granda antaŭensalto ili atingis memprovizi al si per greno kaj komencis vendi superfluan grenon al la ŝtato.

II

Baer-brigado firme iris la socialisman vojon kaj multe kontribuis al la revolucio. Oni elektis ĝin kiel progresintan kolektivon en agrikulturo de orienta Ĉinio, la Partio kaj registaro donis al ĝiaj malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj kadroj grandan honoron.

Ĉe tia sukceso kaj honoro, iuj diris ke la brigado tute ŝanĝis sian fizionomion en ses jaroj, nun ĝi kvazaŭ simio grimpinta sur la arbopinton ne povas plu leviĝi kaj devas kontentiĝi je la sukcesa teno de la nuna nivelo. Sed, la partia filio kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj decidis fari pli grandajn kontribuojn por subteni la socialisman konstruadon. Ili forte kritikis la erarajn konservativajn kaj malfacilon-timantajn pensojn kaj daŭre antaŭenmarŝis en venko.

En 1964, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tuta lando **“Lernu de Daĝaj en agrikulturo”**. Kiel brila lumturo tio montris al Baer-brigado la direkton en ĝia antaŭenmarŝo.

La sekretario de la partia filio kamarado Lu Aki kaj la aliaj kadroj de la brigado respektive profundigis inter la ok produktajn grupojn por lerni la brilan instrukcion de Prezidanto Maŭ kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili decidis plie levi la produktan nivelon. En la tempo de zorgema kaj atentema kulturado por levi pomuan produkton de grenoj, ili plivas-tigis areon de pluraj rikoltoj, ŝanĝante la durikol-tajn kampojn en tririkoltajn.

De multaj jaroj oni rikoltis dufoje en unu jaro, rizon kaj tritikon aŭ tritikon kaj kotonon. Por akiri tri rikoltojn en unu jaro ne sufiĉis ambaŭ la-borforto kaj sterko. Sed la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj kadroj diris: Por lerni de Daĝaj oni devas unue starigi la stilon de Daĝaj disvolvi la spiriton de lukto en malfaciloj kaj sinapogo sur la propraj fortoj. Prenante Daĝaj-anojn kiel modelon, ili venkis malfacilojn unu post alia kaj sukcesis ŝanĝi la sistemon de du

rikoltoj en tiun de tri rikoltoj, tiel ke la produk-tado daŭre leviĝis ĉiujare kaj post alta produkto venis ankoraŭ pli alta produkto. En 1966 la pomua grenprodukto atingis 1,513 ĝinojn, je prok-simume 50% pli alta ol tiu de la jaro 1963. La pomua produkto de pli ol 300 muoj da tririkoltaj grenkampoj alte leviĝis ĝis 2,140 ĝinoj. En pli ol tri jaroj de la Granda Proletara Kultura Revolu-cio, la pomua grenprodukto de la brigado leviĝis ĝis la nivelo de pli ol 1,800 ĝinoj. Tririkoltaj grenkampoj nun ampleksas pli ol 50% de la totala agraro de la brigado, kun pomua produkto de pli ol 2,300 ĝinoj.

La sperto de Baer-brigado estis disvastigita en la gubernio kaj la gubernioj ĉirkaŭ Ŝanhajo kaj akiris grandajn sukcesojn. En la Granda Prole-tara Kultura Revolucio, la gubernio Ginŝan pli-igis 140,000 muojn da tririkoltaj grenkampoj kaj pli ol 200 ĝinojn en pomua grenprodukto de la tuta gubernio.



KURANTAJ AFEROJ

ĈINSTILA GRANDTIPA SOLKRISTALA FORNO

Kun la heroa aspiro gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la granda socialisma patrolando, la laborista klaso kaj vastaj amasoj de Pekino sukcese projektis kaj fabrikis ĉinstilan grandtipan sol-kristalan fornon kun avangarda teknika nive-lo, laŭ la spirito de la ĝenerala linio por socia-lisma konstruado kaj jam produktis per tiu forno grandpecan silician materialon necesan por fabriki grandtipan silician parton kontro-leblan kontribuante por pluapaŝa disvolviĝo de nia elektra industrio.

Tiu ĉi grandtipa solkristala forno estas suk-cese provfarita de pluraj unuoj en kunlaborado kun la Ĝenerala Vitrofabriko de Pekino, la Pekina Maŝinriparejo de Malpeza Industrio, la Pekina Fabriko de Kudromaŝinoj, la Pe-kina Fabriko de Fotiloj kaj la Maŝinriparejo de la Ĝenerala Alkoholaĵ-fabriko de Pekino. Post kiam la solkristala forno komencis fun-kcii, per ĝi oni rapide produktis altkvalitan kaj granddiametran silician solkristalon.

NOVA TEKNOLOGIO DE UNUPROCEDA TINKTURADO

Disvolvante la revolucionan spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la vastaj amasoj de la-boristoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj tek-nikistoj de tinkturo en Ŝanhajo energie faris teknikan renovigon kaj sukcesis krei novan teknologion de unuproceda tinkturo kaj tia-maniere malfermis novan vojon por disvolvi la prestinkturan industrion de nia lando multe, rapide, bone kaj ekonomie.

La malnova prestinktura teknologio de Ŝan-hajo estis transprenita el okcidentaj kapitalis-maj landoj. Ĝi konsistis el dek procedoj, kies plenumo bezonis 36 horojn. Post tiel multaj procedoj, la ŝtofo maldikiĝas kaj multe malfortikiĝas. La unuproceda tinkturo povas esti plenumita en unu kontinua maŝino, kaj por tinkturi unu rulaĵon da blanka ŝtofo oni bezonas nur 20 minutojn. La fortikeco de ŝtofo kolorigita per la nova teknologio estas 20 procentojn pli alta. Kaj dank' al apliko de la nova teknologio, oni povas redukti la kon-suman kvanton de karbo kaj elektro je 50 procentoj, tiun de akvo je 70 procentoj, elŝpari grandan kvanton da kaŭstika sodo kaj aliaj materialoj, malaltiĝi la produktokoston je 10 procentoj kaj elŝpari grandan kvanton da laborforto kaj multajn ekipaĵojn kaj ejojn por produkto.

Kolporti dum Tuta Vivo por la Popolo

— Pri komizo kamarado Fang Ĝongju

EN Gujdong-gubernio de Hunan-provinco, oni konstante povas vidi iun maljunulon plenan de energio, kiu portas trans montojn produktajn rimedojn kaj vivbezonaĵojn, al produktaj brigadoj kaj amasoj en montvilaĝoj. Kaj returne li reportas al la komerca kooperativo lokajn produktaĵojn kaj eluzitajn kaj difektitajn objektojn, kiujn la brigadoj kaj komunumanoj vendas. Tiu maljunulo estas kamarado Fang Ĝongju, komunisto, membro de la gubernia revolucia komitato de

Gujdong kaj komizo de la Ŝatian-a Komerca Kooperativo.

Dum 18 jaroj, post kiam li estis postenigita sur la komerca fronto en 1952, li klopodis vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson kaj persiste plenumis la proletaran revolucion linion de Prezidanto Maŭ, kaj fariĝis avangarda batalanto firme gardanta la pozicion de socialisma komerco en la kamparo.



Komunumanoj elektas por si varojn.

LERNO ESTAS SENFINA PRISERVO AL LA POPOLO

En la malnova socio, Fang Ĝongju laboris kiel jardungito ĉe bienuloj 27 jarojn. Dum la periodo de la agrara revolucio, li aliĝis al la Kamparana Asocio en 1928. Li propraorele aŭskultis propagandon de Prezidanto Maŭ pri revolucia vero.

En 1949 la tuta lando liberiĝis. Sub la gvido de la Partio, Fang Ĝongju aktive partoprenis la movadon de agrara reformo. En tiu tempo li lernis ĉe ĈPLA-anoj la ore brilantajn vortojn **“servu al la popolo”**. De tiam tiu granda instruo profunde gravuriĝis en lia koro. Por emancipiĝo de siaj klasaj fratoj, kune kun malriĉaj kamparanoj li batalis kontraŭ la bienuloj kaj dividis ties teron, laboregante tage kaj nokte.

En 1952 Fang Ĝongju estis transpostenigita al la komerca fronto kaj nelonge poste li fariĝis glora membro de la Komunista Partio de Ĉinio. De tiam li ankoraŭ konscie prenis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“servu al la popolo”** kiel sian plej altan normon por direkti sian agadon. Li ripetade lernas kaj aplikas la instruon. Ju pli li lernas kaj aplikas, des pli li sentas ke ne estas fino por aferoj farendaj serve al la popolo.

En 1953, li estis sendita al la Ŝatian-a Komerca Kooperativo kiel komizo. Ĉiam kiam li vidis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn ricevi ŝatatan varon de la kooperativo, li sentis nepriskribeblan ĝojon en la koro. Li pensis en si: kiel ni malriĉuloj povis eniri iun butikon en la malnova socio, ne havante sufiĉan manĝon kaj veston por pleniĝi nian stomakon kaj kovri nian korpon! Nur dank' al Prezidanto Maŭ, kiu gvidis la popolon fari revolucion, la laboranta popolo havas la nunan feliĉon. Li diligente kaj sincere laboras en servo al la popolo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **“servu al la popolo”**. Kelkfoje komunumanoj aĉetis multajn objektojn ĉe la kooperativo aŭ iliaj korboj estis difektitaj, tiel ili trovis malfacilon por porti la aĉetitaĵon. Rimarkinte tion, li komencis kolekti kaj rezervi ĉiujn pecojn de papero kaj ŝnuro el pakmaterialo de varoj, ne plu bezonatajn de la kooperativo por doni al aĉetantoj ĉe okazo de bezono. Se aĉetantoj ne povas mem porti la tuton de aĉetitaĵoj unufoje, li tuj iniciate helpis ilin porti ĝis iliaj hejmoj. Foje, estis jam post la kvina horo posttagmeze, kaj venis kvin komunumanoj de Ĉangtan-brigado por aĉeti kaldronojn, kiuj loĝis 30 liojn fore. Ĉiu el ili vektportis du korbojn da braĝo al la Fabriko

de Agrikulturaj Maŝinoj kelkajn liojn fora de la kooperativo. Fang Ĝongju pensis, ke la komunumanoj devos reveni malfacile al sia hejmo en mallumo tra malglata montvojeteto, se ili komencos la reiron post porto de braĝo al la fabriko. Li do diris al ili: **“Tuj revenu al via hejmo kun kaldronoj. La braĝon mi portos anstataŭ vi.”**

Kiam al la kooperativo venis kolzosemoj, Fang Ĝongju ĉiam faras provadon de ĝermigo por ekoni la bonecon de la semoj. Dum vendado li montras al la aĉetantoj la vazojn kun ĝermintaj semoj kaj klarigas al ili la ĝermoprocentojn kaj kulturmetodon de diversaj semoj. Lia agmaniero trovas laŭdon de la komunumanoj.

*Kamarado Fang Ĝongju kaj aliaj komizoj
vektportas varojn al montaj vilaĝoj.*





Fang Ĝongju propagandas Maŭzedongpenson al amaso.

Por doni oportunon al la popolamasoj, malgraŭ sia granda aĝo, Fang Ĝongju portas varojn rekte al komunumoj, brigadoj kaj komunumanoj transirinte montojn kaj valojn, por ke ili povu aĉeti varojn tuj ĉe siaj hejmoj.

En 1963, Fang Ĝongju akiris *Elektitajn Verkojn de Maŭ Zedong*, kaj li estis tiel ĝoja, ke li legis ĝin ĉiuvespere. Kiam estingiĝis elektraj lampoj, li daŭre legis sub kerosena lampo kun hipermetropaj okulvitroj sur la nazo la “tri popularajn artikolojn” vorton post vorto. En la malnova socio, li ne povis viziti lernejon kaj konis nur malmultajn vortojn, tiel ke estis tre malfacile por li legi librojn. Tamen, malgraŭ la granda malfacileco, lia decido pri lerno de Maŭzedongpenso estis neŝancelebla. Dum legado li notis ĉiujn nekona-tajn vortojn kaj malfacilajn frazojn por poste peti klarigojn ĉe aliaj kamaradoj. Vidinte lian tiel grandan fervoron en lerno de verkoj de Prezidanto Maŭ, la amaso lin laŭdis: “Maljuna Fang vere havas varman amon al Prezidanto Maŭ!” Li respondis: “Tre malsufiĉe mi lernis. Mia tuta vivo ne sufiĉas por ellerni sole la vortojn ‘servu al la popolo’.”

Li skribis en sia taglibro kun senlime profunda amo:

*Ĉiuj lernas la “tri popularajn artikolojn”;
Egoismaj konsideroj iras for el koroj.
Daŭra lerno de l’ “tri popularaj artikoloj”
Plifirmigas forte la revolucionan volon.*

ĈIO POR PUBLIKO KAJ NENIO POR SI

Dek ok jarojn Fang Ĝongju sin okupis pri komercaj laboroj. Ĉiutage li laboras je mono kaj varoj, sed neniu polvo makulis lian animon, kaj li rigore plenumis la principon: ĉio por la publiko kaj nenio por si. Iun vesperon en 1962, Fang Ĝongju revenis de la gubernia urbo post kunveno kaj trovis ke kelkaj komizoj interkonsiliĝis por aĉeti por si iom el la bona ŝtofo, kiun la kooperativo ĵus ricevis. Vidinte Fang Ĝongju, ili konsilis tion ankaŭ al li: “Maljuna Fang, jen nia kooperativo ricevis kvanton da bona ŝtofo, estas ankaŭ por vi konsilinde iom aĉeti.” Li respondis serioze: “Ni ne devas tion fari. Al kiu ni servus, se ni mem aĉetus bonan ŝtofon, antaŭ ol ĝi estos prezentita al la amaso!?” “Kial ne?” iu kontraŭargumentis, “ni ja same pagas.” Por levi la nivelon de kono de tiuj kamaradoj, Fang Ĝongju lernis kun ili la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**konsideri ĉion pro la interesoj de la popolo kaj ne pro tiuj de individuo aŭ malgranda grupo**” kaj pacience klarigis al ili



Kamarado Fang Ĝongju helpas komunumanojn kulture ekonomiajn plantojn, kio ebligas al la komunumanoj pliiĝi sian enspezon kaj al la ŝtato aĉeti pli da produktaĵoj.

la komercajn politikojn de la Partio, montrante al ili, ke tio estas kapitalisma laborstilo, ke la komizoj mem aĉetas bonajn varojn unue, ke tia agmaniero kondukos al kapitalisma misvojo. Sub la pacienca helpado de Fang Ĝongju, tiuj komizoj ekkonis la erarecon de sia penso kaj ĝustatempe korektis ĝin.

Cetere, Fang Ĝongju ĉiam konservas viglan gardemon por firme batali kontraŭ klasaj malamikoj, kiuj subfosas socialisman ekonomion. Iun tagon, kiam Fang Ĝongju portis varojn al mont-regiono, iu raportis al li, ke estas spekulaciisto, kiu aktivas en Jangtian-grupo de Kingŝan-komunumo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj subfosas la socialisman ekonomion, aĉetante malkare kaj vendante altpreze. Aŭdinte tion, Fang Ĝongju tuj iris tien, tramarŝinte 70 liojn da malglata montvoĵeto kunportante siajn varojn. Kolportante la varojn, li samtempe propagandis al la amasoj la instruon de Prezidanto Maŭ “**Nepre ne forgesu la klasbatalon**” kaj mobilizis la amasojn ĝisfunde malkovri la krimojn de la spekulaciisto.

Foje, li vektportis varojn kun sia kolego al la loĝpunkto de jaŭ-nacianoj — Cajdong-brigado de Kingŝan-komunumo. Ili trapasis multajn nub-

vualitajn montojn kaj senhomajn valojn. En du tagoj ili marŝis 140-150 liojn da montvoĵeto. Jaŭ-naciaj klasfratoj bonvenigis ilin kiel siajn parencojn. Iu jaŭ-nacia avino tenante portreton de Prezidanto Maŭ en siaj manoj diris emocie: “En la damninda malnova socio, la reakciuloj de Kuo-mintango, bienuloj kaj riĉuloj perforte rekrutigis niajn junulojn, kolektis de ni depagojn, pelis nin en la montojn kaj tiel turmentis nin, ke iuj perdis sian vivon kaj aliaj sian familion. Sub la gvido de nia amata Prezidanto Maŭ, la Liberiga Armeo savis nin el la abismo de mizero, kaj ni suriris la vojon de socialismo, tiel ke prosperas nia produktado kaj multiĝas niaj idoj. Nun la komercaj laborantoj portas varojn eĉ rekte antaŭ niajn domojn. Ni devas danki nian savanton Prezidanto Maŭ!” Fang Ĝongju restis sep tagojn en tiu brigado kaj vizitis ĉiujn vilaĝetojn en ĝi. Tage li vendis alportitajn varojn kaj aĉetis lokajn produktaĵojn, kaj vespere li kunvenis kun komunumanoj kaj propagandis Maŭzedongpenson. Oni ankoraŭ ne volis disiri eĉ en malfruaj horoj kaj sentis ke la alportitaj estas ne nur ĉiutagaj bezonaĵoj, sed ankaŭ la senlima varma zorgemo de Prezidanto Maŭ al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. De tiam

lia fervoro por porti varojn al la vilaĝoj fariĝis pli alta. En Ŝatian estas kvin komunumoj kun pli ol 40 brigadoj, en kiuj ĉie troviĝas liaj piedsignoj kaj sonis lia voĉo por propagandi Maŭzedongpenson.

IRI LA VOJON DE REVOLUCIO

Pro tio ke li senĉese faris kontribuojn en servado al la popolo kaj revolucio, Fang Ĝongju estis multfoje nomita kiel aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, avangarda laboranto kaj labormodelo de la gubernio, subprovinco kaj provinco. Sed li neniam havis ioman fierecon antaŭ la honoro al li donita de la Partio kaj la popolo kaj prenas ĝin kiel stimulon kaj spronon.

En 1968, Fang Ĝongju estis elektita en la gubernian revolucion komitaton de Gujdong. Ŝanĝiĝis lia pozicio, sed ne lia naturo de laborulo. En la tago de fondiĝo de la gubernia revolucion komitato, kiam li revenis al Ŝatian post la kunveno, li tuj komencis labori ĉe vendtablo de la kooperativo, demetinte la valizon. Kaj en la tria tago li denove iris al montvilaĝoj kun varoj. La gubernia revolucion komitato konsideris ke Fang Ĝongju estas jam grandaĝa kaj por li estas malfacile transgrimpadi montojn, kaj intencis ŝanĝi lian laborpostenon. Kiam li informiĝis pri tio, li tuj rifuzis, klarigante sian motivon ĝentile: "Kiam komunisto maljuniĝas, lia revolucion spirito ne devas kadukiĝi. Por plue firmigi la socialisman komercan fronton, mi volonte portos pezan ŝarĝon dum la tuta vivo." Fakte li tiel agas, kiel li diris. De post lia elekto en la gubernian revolucion komitaton, ĉiufoje kiam li portas varojn al montvilaĝoj, li ne nur

fervore propagandas Maŭzedongpenson, sed ankaŭ modeste kolektas opiniojn de la amasoj kaj reportas la bonajn opiniojn. En la tempo por printempa plugado lastjare, li venis al Ŝujĝuang-brigado de Ŝatian-komunumo. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj esprimis, ke "dum la printempa plugado, tempo laborplena, estus bone, se la membroj de la komunuma revolucion komitato venus profunde al la plejfronto de produkto". Fang Ĝongju raportis tion al la revolucion komitato de Ŝatian-komunumo kaj lernis kun ili la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "La plej grava punkto en la reformo de ŝtataj organoj estas intima ligo kun la amaso", tiel ke la plejparto de la kadroj de la komunumo rapide iris al la produktaj grupoj kaj plifortigis la gvidon de la printempa plugado.

En la pasinta jaro, okaze de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, kun plena emocio, Fang Ĝongju studis fojon post fojo la ekstreme gravajn paroladojn de Prezidanto Maŭ kaj la dokumentojn de la kongreso, kaj foje-foje portis la novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj la dokumentojn de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio al ĉiuj anguloj de la montregiono de Ŝatian, transgrim-pante montojn.

Kamarado Fang Ĝongju, maturiĝinta sub la nutrado de Maŭzedongpenso, ĉiam konservas sian revolucion junecon kvazaŭ la ĉiamverda pino sur Vulin-monto. Nun, kiam la vastaj revolucion kadraro kaj amasoj lernas de li, li faris novan ĵuron: "Mi duobligos mian klopodon por vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson kaj lukti la tutan vivon por plue solidigi la diktaturon de la proletaro kaj realigi komunismon — la noblan idealon de la homaro!"



Letero de Nederlanda Leganto R. B.

Unue mi volas gratuli vin kaj la tutan ĉinan popolon pro la lanĉo de la unua ĉina artefarita satelito! Oni diris, ke "ĝi pezas 173 kg., kio estas rimarkinda sukceso de la ĉina scienco kaj tekniko".

Efektive tiel estas. Ĝi almenaŭ unualoke montras, ke eĉ popolo,

kiu antaŭ iom pli ol 20 jaroj vivis ankoraŭ en plena servuteco, elsuĉata de sangavidega kolonia rabis-taro, kaj kiu nun tenas la sorton en propra mano, tre rapide povas atingi tre altan nivelon en scienco kaj tekniko kaj ĉiaj terenoj de la homa vivo. Mi deziras al vi ĉiujn sukcesojn en la paca disvolviĝo de via landego.

Letero de Sveda Leganto G. H.

La senprecedenca historia etapo, en kiun eniris la popola Ĉinio post la proletara kultura revolucio, kiu per muziko de satelito en la spaco donis la ĝojegan mesaĝon *Ruĝas la Oriento*, konkretigas la gravan signi-

fon de EPC por ĉiu, kiu volas lerni kaj sekvi la ĉinan ekzemplon. Sekve ĉiuj tekstoj kaj bildoj plaĉas al ni, kaj distingiĝas artikoloj pri venkoj de Maŭzedongpenso.

Letero de Franca Leganto F. V.

Mi esperas de nun ricevi EPC regule, ĉar per EPC mi povas koni vivon en Ĉinio kaj mi admiras la ĉinan popolon, kiu sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj kun laboremo supreniras sentime ĝis la plej bela feliĉo kaj paco.

Mi gratulas la ĉinan popolon pro la sukceso de ĝia satelito, kio pravas ke ekde nun Ĉinio estas granda lando.

印度支那 人民 必 胜

Yìndùzhīnà Rénmín Bì Shèng

(hindoĉinia popolo certe venki)

La Hinduĉiniaj Popoloj Certe Venkos

越南、老挝 和 柬埔寨 是 中南半島¹ 的 三个 国家。
 Yuènnán, Lǎowō hé Jiǎnpǔzhài shì Zhōngnán-bàndǎo de sānge guójiā.
 (Vjetnamio Laoso kaj Kamboĝo esti Ĝongnan-duon-insulo de tri lando
 Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo estas tri landoj sur Hinduĉinia Duon-insulo.

它們 是 中国的 亲密 邻 邦。中国 人民 和 这 三个
 Tāmen shì Zhōngguó de qīnmì lín bāng. Zhōngguó rénmin hé zhè sānge
 ili esti Ĉinio de intima najbaro lando Ĉinio popolo kaj tiu tri
 Ili estas intimaj najbaraj landoj de Ĉinio. La ĉina popolo kaj tiuj de la tri landoj

国家的 人民, 在 长期的 反帝² 斗争 中 結成了
 guójiā de rénmin, zài chángqīde fǎn-dì dòuzhēng zhōng, jiéchéngle
 lando de popolo en longperioda kontraŭ imperiismo batali mezo formi
 formis profundan batalan amikecon dum longa kontraŭimperiisma batalo.

深厚的 战斗 友誼。中国 政府 和 人民 坚决 支持
 shēnhòude zhàndòu yǒuyì. Zhōngguó zhèngfǔ hé rénmin jiānjué zhīcī
 profunda batali amikeco Ĉinio registaro kaj popolo firme subteni
 La ĉinaj registaro kaj popolo firme subtenas ilin

它們 把³ 抗美 救国 斗争 进行 到底。
 tāmen bǎ kàng-měi jiùguó dòuzhēng jìnxíng dào dǐ.
 ili ... kontraŭ Usono naciŝati batali entrepreni ĝis fundo
 konduki la kontraŭusonon naciŝatan batalon ĝis la fino.

印度支那 人民 必 胜!
 Yìndùzhīnà rénmin bì shèng!
 Hinduĉinio popolo certe venki)
 La hinduĉiniaj popoloj certe venkos!

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografioj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. Tiel nomiĝas la duoninsulo de Hinduĉinio

en la ĉina lingvo.

2. “反帝” estas mallongigo de “反对 帝国主义” fǎnduì dìguózhǔyì (kontraŭ imperiismo).

3. “把” same kiel la vorto “将” jiāng (vidu p. 50 de la numero 4 ĉijare) montras ke la substantivo sekvanta ĝin estas rekta objekto de la verbo staranta pli poste, “抗美救国 斗争” kaj “进行” respektive ĉi tie.

Certe Venkos la Popoloj de la Tri Hinduĉiniaj Landoj


LA kontraŭusona naciŝava milito de la popoloj de la tri hinduĉiniaj landoj disvolviĝis impete kvazaŭ fulmotondro kaj eniris novan etapon, dum la usona imperiismo jam falis en multvican sieĝadon de la popoloj de la tri hinduĉiniaj landoj.

LA KAMBOĜA POPOLO MALFERMIS NOVAN BATAKAMPON POR BATI LA USONAN IMPERIISMON

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: “La usona imperiismo fabrikas streĉan situacion ĉie en la mondo por atingi sian celon agresi kaj sklavigi la popolojn de diversaj landoj. ... sed fakte tiu streĉa situacio fabrikita de Usono iras al la malo de la usonana deziro kaj ludas la rolon mobilizi la popolojn

de la tuta mondo leviĝi kontraŭ la usonaj agresantoj.”

La usona imperiismo instigis la dekstrulan klikon de Kamboĝo lanĉi reakcian ŝtatrenverson kaj senskrupule ekspedis grandskale sian armeon por invadi Kamboĝon, kio ludas rolon mobilizi la kamboĝan popolon leviĝi al batalo kontraŭ la usonaj agresantaj piratoj. La indigno akumulita en la koro de la kamboĝa popolo eksplodis kiel vulkano. Responde al la alvoko de la ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk, miloj kaj miloj da kamboĝaj patriotaj gejunuloj ekprenis la armilojn kaj iris en arbarojn, por konkure ĵeti sin al la batalkampo por ekstermi la malamikon. La kamboĝaj patriotaj armitaj fortoj konsistantaj el la Naciliberiga Armeo, milicaj geriltaĉmentoj kaj lokaj trupoj rapide kreskas en la batalo kaj donis pezajn batojn al la malamiko. Ĝis la unua tag-



La Vjetnama Popola Armeo forte pafas kontraŭ usonaj pirataj aviadiloj.



La liberiga armeo de provinco Quang Tri de suda Vjetnamio atakas kaj okupas aŭtoparkon de la malamika armeo en Huong Hoa.

deko de majo, la armitaj fortoj ekstermis kaj deorganizis pli ol, 24,000 malamikojn, kaj lastatempe ekstermis komplete tri batalionojn de la malamiko en la provincoj Kandal kaj Kompong Cham. La Naciliberiga Armeo liberigis la vastajn areojn de pli ol dek provincoj kun pli ol miliono da loĝantoj en la nordorienta, sudorienta, nordokcidenta kaj sudokcidenta partoj de Kamboĝo kaj starigis popolajn regpotencojn en tiuj liberigitaj regionoj. Phnom Penh okupata de la dekstrula kliko estas minacata de ĉiuj flankoj, kaj la strategiaj ŝoseoj kondukantaj al ĝi estas distranĉitaj. La kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak falis en plenan haoson kaj la dekstrula armeo troviĝas en disfalo. La okcidenta gazetaro devigite konfesis, ke la kontraŭusona patriota armita batalo de la kamboĝa popolo disvolviĝas “pli rapide ol kiel antaŭkalkulite” kaj ke la stato de la ŝtatrenversa kliko “rapide malboniĝas” kaj ĝia estonteco estas “nebona”.

Depost sia entrudiĝo en la teritorion de Kamboĝo, la usona agresa armeo kaj la sudvjetnama pupa armeo en nombro de kelkdek mil personoj estas draŝitaj de la kamboĝaj patriotaj armitaj fortoj, povante “nek antaŭeniri nek retiriĝi”. Sole en la provincoj Kompong Cham kaj Svay Rieng, en dek tagoj de la 29-a de aprilo ĝis la 8-a de majo, estis ekstermitaj 1,700 malamikoj, inkluzive de

pli ol 1,300 usonaj agresantoj. La sinjoraj soldatoj de Usono, kiuj estis draŝitaj ĝis ekstrema embaraso en la batalkampo de suda Vjetnamio, elmontris sian tutan konsterniĝon ankaŭ sur la batalkampo de Kamboĝo. La Asociita Novaĝ-agentejo de la usona burĝaro raportis, ke apenaŭ usonaj armeanoj surteriĝis el aviadiloj, “kugloj” de la kamboĝaj patriotaj armitaj fortoj “alflugis de ĉiuj flankoj al la libera spaco en arbaro”, tiel ke “centoj da kirasitaj veturiloj, kiuj iras kiel pioniroj”, “ne povis moviĝi”, kaj ke la usonaj soldatoj “ekkaŝiĝis kvazaŭ ter-kraboj” “kaj ŝvitis tra la korpo pro la varmego kaj timemo”. Nun, la publikaj opinioj de Usono kaj Eŭropo devigite konfesis, ke la agreso de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo estas “stultaĵoj” “netolereblaj”, kaj ke “la usonaj trupoj probable estas falintaj en ŝlimejon tiel danĝeran kiel tiun en suda Vjetnamio”.

LA POPOLOJ DE LA TRI HINDOĈINIAJ LANDOJ PLI STRIKTE UNUIĜAS POR BATALI KUNE

Alfronte al la ekstreme feroça agreso de la komuna malamiko — la usona imperiismo, la tri hindoĉiniaj popoloj plie unuiĝas kaj formis sen-

precedence potencan unuecan fronton kontraŭ la usona imperiismo. En la tuta Hinduĉinio aperis nova situacio de unuiĝo por batalo.

De la 24-a ĝis la 25-a de aprilo, en iu loko ĉe la landlimoj inter Laoso, Vjetnamio kaj Ĉinio la plej altaj gvidantoj de la kvar flankoj de la tri landoj Kamboĝo, Laoso, la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj la Vjetnama Demokratia Respubliko okazigis la Plej Altan Konferencon de la Hinduĉiniaj Popoloj kun grava historia signifo. La konferenco alvokas al la popoloj de la tri hinduĉiniaj landoj plifortigi sian unuiĝon, brave batali kaj oponi kontraŭ la komuna malamiko, la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, ĝis akiro de kompleta venko. La konferenco signis plian disvolviĝon de la frata kunlaboro inter la tri popoloj de Kamboĝo, Laoso kaj Vjetnamio, enkorpigis la firman

volon kaj konvinkon de la tri hinduĉiniaj popoloj pri nepra venko en la batalo kontraŭ la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj, multe akcelis la disvolviĝon de la kontraŭusona armita batalo de la popoloj de la tuta Hinduĉinio.

Respondante la historian alvokon de la Plej Alta Konferenco de la Hinduĉiniaj Popoloj per praktikaj agoj, la kamboĝa, vjetnama kaj laosa popoloj persiste atakis furioze en diversaj batalkampoj la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn. Samtempe kun la grava venko akirita de la kamboĝa popolo, en la daŭro de kvar tagoj de la 1-a ĝis la 4-a de majo, la armeo kaj popolo de nordo de Vjetnamio paffaligis 13 entrudiĝintajn usonajn piratajn aviadilojn. Sur la diversaj batalejoj de la provinco Quang Tri ĝis la Mekong-a Delto, la armeo kaj popolo de sudo de Vjetnamio vaste

atakis energie la nestojn de diversaj unuoj de la usona kaj la pupa armeoj, kiuj partoprenas la armitan agresadon al la kamboĝa teritorio, kaj ekstermis grandajn kvantojn da vivhavaj fortoj de la malamiko. Post akiro de la brilaj venkoj en la areo Jars-ebenejo — Xieng Khouang, la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso venke antaŭenmarŝis por plie malfermi unu post alia la batalejojn en Sam Thong — Long Cheng kaj en Boum Long, konkeris militajn bazojn kiaj Attopeu, kaj ekstermis grandajn nombrojn da malamikoj.

Gerilanoj de la laosa liberigita regiono enterigas pintigitajn bambuojn kaj minojn por forte bati malamikojn.



La kamboĝa, vjetnama kaj laosa popoloj batalas ŝultron ĉe ŝuldro, kuraĝigas kaj subtenas unu la alian, kaj la usona imperiismo plie dronis en vasta oceano de la popola milito de la hinduĉiniaj landoj. Antaŭ la unuiĝo kaj batalo de la tri popoloj de Kamboĝo, Vjetnamio kaj Laoso, la usona imperiismo plie elmontris sian mortan malfortecon de nesufiĉo de trupoj, malalta batalspirito de siaj soldatoj kaj pasiveco de metiĝo sub atakadon; ĉio ĉi tio akcelas pereon de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj!

LA POPOLOJ DE LA TUTA MONDO FIRME SUBTENAS LA KONTRAŬUSONAN BATALON DE LA HINDOĈINIAJ POPOLOJ

La usona popolo kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo aktive ekagis por forte oponi kontraŭ la krimoj de Nixon-registaro ekspedi armeon por agresi Kamboĝon kaj tiel plivastigi la militon de agreso en Hinduĉinio, kaj firme subtenas la justan kontraŭusonon nacisavan batalon de la tri hindoĉiniaj popoloj. Nun, tra la tuta terglobo leviĝas potenca ŝtormo de batalo kontraŭ la usona imperiismo kiu agresas Kamboĝon kaj plivastigas la militon en Hinduĉinio.

En Usono, kelkcent mil studentoj de pli ol 600 altlernejoj okazigis lernostrikojn kaj milionoj da popolanoj de diversaj socitavoloj partoprenis diversformajn batalojn de protesto. La vastaj amasoj de la popoloj de dekoj da landoj de Azio, Afriko, Latinameriko, Eŭropo kaj Oceanio okazigis unuj post aliaj grandiozajn mitingojn kaj manifestaciojn por kondamni la militkrimulon Nixon. Tra la oceanoj kaj kontinentoj tondras la batal slogano "Faligu la usonan imperiismon!" Por esprimi

sian indignon kontraŭ la usona imperiismo pro ĝia agresa milito, multaj manifestaciantaj amasoj detruis agresajn aparatojn de Usono, forbruligis la flagojn de steloj kaj strioj de Usono kaj figuraĵojn de Nixon. La usona imperiismo falis en senprecedencan izolitecon tra la mondo kaj fariĝis kvazaŭ muso transiranta straton, kiun ĉiu volas bati.

Je la 20-a de majo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ publikigis la solenan deklaron pri subteno al la batalo de la mondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo. Lia deklaro estas granda kuraĝigo kaj potenca subteno al la tri hindoĉiniaj popoloj kaj la aliaj revoluciaj popoloj de la mondo kiuj batalas kontraŭ la agreso kaj sklavigo farataj de la usona imperiismo. Nova alta tajdo de batalo kontraŭ la usona imperiismo certe pli vigle leviĝos tra la mondo kaj la tagoj de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj ne longe daŭros.

Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris en sia deklaro: **"Plifortigante sian unuiĝon, subtenante kaj helpante unu alian kaj persistante en longdaŭra popola milito, la popoloj de la tri landoj de Hinduĉinio certe superos ĉiujn malfacilojn kaj akiros kompletan venkon."**



La brulanta helikoptero de la usona armeo faliĝita de la kamboĝaj patriotaj armitaj fortoj

LA USONA POPOLO DAŬRE DISVOLVAS SIAN BATALON

La batalo de la usona popolo protesti la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo forte skuas la reakcian regadon de Nixon-registaro. De la 10-a de majo, studentoj de altaj kaj mezaj lernejoj en la tuta Usono daŭre persistas en strika batalo. Studentoj de la ŝtatoj de Ohio, Maryland, Michigan, Virginia, New York, South Colorado kaj aliaj rompis la subpremadon de la reakciaj trupoj kaj policanoj, senĉese okazigis protestajn mitingojn kaj manifestaciojn por firme oponi krimojn de Nixon-registaro en sendo de trupoj al Kamboĝo kaj en disvastigo de la agresiva milito kontraŭ Hindoĉinio.

2,000 studentoj de Ohio-universitato refoje okazigis manifestacion je la vespero de la 14-a de majo, por protesti la agreson de Nixon-registaro kontraŭ Kamboĝo

kaj ĝiaj faŝismaj kruelaĵoj en subpremadon de la manifestaciantaj studentoj. Tio estis la dua manifestacio okazigita de studentoj de tiu universitato en 24 horoj. La studentoj marŝis al la urba kvartalo de Athens. Kiam la reakcia aŭtoritato sendis 1,000 naciajn gardistojn barbare subpremi la studentojn, la indignaj studentoj ne timis la perforton kaj brave batalis kontraŭ ili per ŝtonoj. Studentoj de Maryland-universitato de la ŝtato Maryland sinsekve 4-foje blokadis ĉelokajn ŝoseojn por esprimi sian firman proteston kontraŭ la agresiva politiko de Nixon-registaro. Pli ol 5,000 studentoj partoprenis tiun agadon de protesto. Por estingi la flamon de batalo de la studentoj de Maryland-universitato, la reakcia aŭtoritato sendis je la 14-a de majo 1,300 naciajn gardistojn kaj faŝistajn policanojn entrudiĝi en la universitaton por subpremadon. Sed 1,500 studentoj de tiu universitato tute ne timis ilin kaj leviĝis al batalo. Kun ŝtonoj, boteloj kaj brikoj en la manoj ili sin ĵetis al la reakciaj policanoj kaj intense luktis kontraŭ ili. La indignaj studentoj bruligis la administran domon de tiu universitato kaj oficĉambrojn de la trejnejo de rezervataj oficiroj.

Fronte al la intensa kaj daŭra protesta movado de la vastaj amasoj de la popolo, Nixon-registaro faras pli frenezan subpremadon. La reakcia aŭtoritato de la

*La usonaj popolanoj kunvenas por protesti la
agreson de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo.*



ŝtato Michigan deklaris ke “la ŝtato estas en urĝeco”, post kiam studentoj de la Universitato de Orienta Michigan okazigis manifestaciojn de intensa protesto en du sinsekvaj tagoj de la 11-a kaj 12-a de majo. En la ŝtato Virginia, la reacia aŭtoritato sendis faŝistajn policanojn ataki per ĉashundoj la studentojn okupantajn la domon kaj persistantajn en batalo, kaj maljuste arestis multajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj perfortaĵoj vekis ankoraŭ pli fortan indignon de la studentoj. Informiĝinte ke iliaj samlernejanaj estis arestitaj, pli ol 1,200 studentoj de la Virginia Politeknika Instituto sieĝis la domon de la instituta direktoro kaj postulis liberigi la arestitajn studentojn.

Je la 14-a de majo, 7,000 studentoj el diversaj lokoj de la ŝtato New York kolektiĝintaj en Albany okazigis protestan mitingon. Ili unuanime postulis tuj retiri el Hindoĉinio al Usono la usonajn agresajn trupojn. 4,000 studentoj de la Universitato de South Carolina kunvenis en la parko de Columbia je la vespero de la sama tago por kondamni la krimon de Nixon-registaro en plivastigo de la agresiva milito kontraŭ Hindoĉinio.

Nun profunde disvolviĝas la batalo de la usonaj studentoj kontraŭ la agresiva kaj milita politiko de Nixon-registaro.

6,000 LABORISTOJ DE TOKIO OKAZIGIS MANIFESTACIAN KUNVENON

Vespere je la 12-a de majo, 6,000 laboristoj de Tokio okazigis kunvenon en la liberĉiela muzikejo Hibiya, en kiu ili forte kondamnis la krimon de la usona imperiismo en plivastigo de la agresiva milito kontraŭ Hindoĉinio.

Unu reprezentanto de metalurgiaj laboristoj diris en la kunveno: “Ni japanaj laboristoj esprimas senkomparan indignon pro la intrigoj kaj artifikoj de la usona imperiismo por disvastigi ĝian agresan militon en la tutan Hindoĉinion kaj ‘batali kontraŭ azianoj per azianoj’. La japanaj laboristoj intensigos sian batalon kontraŭ la usonaj kaj japanaj reakciuloj kaj firme subtenas la kontraŭusonon naciŝan batalon de la hindoĉiniaj popoloj. Reprezentanto de la telekomunikaj laboristoj, parlamentano de la Sociala Partio de Japanio Kimura Kihaĉiro kaj aliaj unu post alia faris paroladojn por kondamni la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo.

Per ŝtorma aplaŭdo la kunveno unuanime aprobis sian deklaron. Post la kunveno la manifestaciantaj kolonoj de la laboristoj pretermarŝis antaŭ la usona am-

Per ŝtonoj kaj boteloj gejunuloj de la okcidenta Berlino atakas la “usonan domon” — establejon de usona kultura agreso, por protesti kontraŭ la usona imperiismo en agreso al Kamboĝo.





Anglaj manifestaciantaj amasoj okazigas protestan kunvenon, tenante sloganon "La usona imperiismo tuj foriru el Hindoĉinio".

basadorejo. Ili indigne kaj laŭte kriis "For la usona imperiismo el Kamboĝo, Laoso kaj Vjetnamio!" kaj aliajn sloganojn por forte kondamni la krimojn de la usona imperiismo en plivastigo de la agresa milito kontraŭ Hindoĉinio.

LA POPOLOJ DE OKCIDENTA EŬROPO PROTESTIS LA AGRESON DE NIXON KONTRAŬ KAMBOĜO

Furioze tajdas indigna opono de la popoloj de okcidenta Eŭropo kaj usonaj studentoj lernantaj en okcidenta Eŭropo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo kaj ĝia plivastigo de la agreso kontraŭ Hindoĉinio. Popoloj de multaj urboj daŭre torentas sur stratojn por fari kontraŭusonan manifestacion kaj kondukas kontraŭusonan batalon en diversaj formoj.

En Parizo de Francio, studentoj de la usona instituto faris strikon kaj manifestacion por protesti la damnidajn krimojn de Nixon-registaro en ĝia agreso kontraŭ Kamboĝo kaj sanga pafmortigo de usonaj manifestaciantaj studentoj.

Je la 14-a de majo ĉ. 3,000 laboristoj kaj studentoj de la aŭstra ĉefurbo Vieno okazigis en la urba centro manifestacion por protesti la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo, tenante tabulojn kun slogano "For usonanoj el Hindoĉinio".

En Nurnburg de okcidenta Germanio, la itala ĉefurbo Romo, Ĝenevo de Svislando, la brita ĉefurbo Londono, la hispana ĉefurbo Madrido kaj aliaj urboj sinsekve okazis manifestacioj de laboristoj kaj studentoj por protesti la agreson de la usona imperiismo kontraŭ Kamboĝo.

Korespondi Deziras

Kanado

55-jara esperantisto Charles Hadelot dez. kor. kun esperantistoj de Azio, Albanio, Afriko kaj Latinameriko. La adreso: 4969 Grosvenor Ave, Montreal 247

Argentino

46-jara meblo-ĉarpentisto dez. kor. kaj interŝ. p. k. kun ĉinaj gesamideanoj. La adreso: Luis Decca, AVDEL Trabajo 5411-2-p-8 DEF. Buenos Aires (SUC-39)

Francio

Multaj junaj esperantistoj dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj junaj esperantistoj. La adreso: L. Dodinet, la Chapelle-st Sepulcre, 45-Ferrieresen-Gatinois

Laboristoj kaj Esperantistoj

de Milano Ĝoje

Ricevis Ruĝan Trezoran Libreton

LUTAGE, revoluciaj esperantistoj de Milano ricevis oficialan sciigon pri alveno de la longe atendataj 1,000 ruĝaj libretoj en itala kaj esperanta lingvoj — *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Ili ĉiuj ekkriis pro granda ĝojo:

“Finfine la trezoraj ruĝlibretoj atingos niajn manojn!”

Unu kamarado tuj forveturis al la sidejo de la dogano. Iu simpla laboristo akceptis lin kaj, preninte la slipeton el liaj manoj, akompanis la kamaradon emociitan kaj senpacienca al oficejo kie sidis dika kaj malsimpatia burokratulo, kiu ordonis laŭtvoĉe al la laboristo preni unu ekzempleron de enportita varo. La laboristo alportis unu paketon.

La burokratulo ĉeloke malfermis ĝin, kaj provoke kriaĉis: “Ho! La famaj senvaloraj libretoj ruĝaj!”

“VI MALPRAVAS!” refutis indigne kaj forte la milana revolucia esperantisto, “la valoro de tiuj libretoj estas tiel granda, ke eĉ ne estas eble taksi ĝin; ilia valoro estas pli granda ol la plej rara trezoro! Milionoj da liroj ne sufiĉus por pagi eĉ unu solan paĝon de la libreto.”

La akra diskuto senvortigis kaj embarasis la burokratulon.

Kiam tiu revolucia esperantisto iris el la oficejo, la laboristo ridete diris al li: “Venu, venu kamardo! Estas la unua fojo, ke dum multaj jaroj de laboro ĉe la milana doganejo mi trovis enportiston, kiu akre diskutas kun la ĉefoficisto pretendante ke lia varo entenas pli grandan valoron ol tiu fiksita de la doganestro! Sed ne timu! Mi jam interparolis kun la aliaj laboristoj, ni jam trovis vian aŭtomobilon ĉe la parkadejo (ni rekonis ĝin dank’ al ĵurnaloj kun falĉilo-martelo kaj titolo Rivoluzione Proletaria) kaj plenkaŝe ni jam plenigis ĝin per la tuta materialo adresita al via grupo. Nun iru, iru tute trankvile! Sed mi havus, ankaŭ en la nomo de miaj kamaradoj, grandan peton al vi: ĉu vi povus doni al ni unu ekzempleron de la ruĝa libreto de Maŭ Zedong? Ĉiam ni aŭdas pri ĝi kaj ni komprenis ke tiu estas la vera komunismo en la nuna tempo, sed neniam estis eble por ni lerni akurate la penson de Maŭ Zedong.”

La revoluciaj laboristoj kaj esperantistoj de Milano havas komunan amon kaj komunan malamon. Ili varme amas la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson, dum ili malamas la burĝaron kaj reviziismon en Italio. En la komuna batalo ili konis la grandan veron — Maŭzedongpenson kaj plifortigis la unuiĝon de revolucio kaj batalo.

ANONCETO

La revolucia informilo “Spegulo de Imperiismo kaj Reviziismo” presita en Italio kaj sendata laŭ peto. Mendu ĝin al la redakcio de SPEGULO DE IMPERIISMO KAJ REVIZIISMO, str. Calzini 6, 20517 Milano, Italio

Aŭstralio

Dez. kor. kun ĉinaj gesamideanoj pri ĉiutaga vivo k. a. J. K. Kuiler c/o mr John Prior, Mudgegonga 3737, Victoria

Cejlono

Dez. kor. kaj interŝ. b. k. kun gesamideanoj:

20-jara instruisto M. M. Ranasinghe, Helawatta, Diyatalawa

15-jara esperantistino M. M. Nalanee, Helawatta, Diyatalawa

16-jara studento de Inĝeniero M. M. S. Ranith, Helawatta, Diyatalawa

12-jara M. M. S. Dayanda, Helawatta, Diyatalawa

15-jara M. M. Kumarasinghe, Helawatta, Diyatalawa

Ĉeĥoslovakio

Internacia Koresponda Adresaro Esperantista senpage publikigos korespondan adreson kun deziroj. Skribu: R. J. Zverina, 5. Kvetna 26, LIBEREC

20-jara studento Miloš Martinovič dez. kor. kun geesperantistoj tutmondaj pri ĉiu temo. Lia adreso: Pavlovičovo Nam 8, Prešov

21-jara Jan Janu dez. kor. pri aŭto-motorismo kaj interŝ. sondiskojn kun geesperantistoj de la tuta mondo. La adreso: Liberec I str. Na Okruhu 16

Esperantisto-komencanto Franciska Vojtech dez. kor. kun geesperantistoj de Azio, Eŭropo, Afriko kaj Latinameriko. Lia adreso: Karvina 4 Raj, Sovova 687

23-jara Peter Gregus dez. kor. kun iu el ĉinaj esperantistoj. La adreso: Bratislava 14, Vychodna stanica 872

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 8 (145) 1970

Ĉefa Enhavo

Fotoj pri la Revolucia Moderna Pekina Opero "Ruĝa Signal-lanterno" (*bildserio*)

Denova Prezento de la Revoluciaj Modelaj Teatraĵoj en Pekino kaj Ŝanhajo

Ruĝa Signal-lanterno (*pekinopero*)

Iri la Vojon de Sinkombino kun Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj (*bildserio*)

La Heroa Roto sur Nankin-strato

Armeo kaj Popolo en Rilato de Fiŝoj kaj Akvo

La Tuta Vivo de Batalo

Dialektiko en Sekura Irigado de Kamionoj

La Filmo "Batalo per Minoj" (*bildserio*)

Ne Troviĝas Fina Stacio por Revolucia Trajno

En Servo al Disvolvo de Agrikultura Produkto

Fekundaj Kampoj el Sterila Tero

Kolporti dum Tuta Vivo por la Popolo

Certe Venkos la Popoloj de la Tri Hindaĉiniaj Landoj

Laboristoj kaj Esperantistoj de Milano Ĝoje Ricevis Ruĝan Trezoran Libreton

La Tigra Monto Hodiaŭ (*bildserio*)

Speciala Eldono:

Vivu la Amikeco inter la Popoloj de Ĉinio kaj Rumanio!

Sur la Kovrilo:

Batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo studas verkon de Prezidanto Maŭ.

Sur la Dorskovrilo:

Armeanoj kaj popolanoj viglatente gardantaj la landlimon en nordokcidenta Ĉinio patroladas tage kaj nokte laŭ la landlimo de nia patrio, marŝante trans montojn kaj travadante riverojn.

La Tigra Monto

Hodiaŭ



Kiu Ĝanjuan, estro de la Revolucia Komitato de Hajlin-gubernio kaj reprezentanto de ĈPLA, enprofundiĝis al la regiono de la Tigra Monto kaj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson kune kun la komunumanoj por akceli la ideologian revoluciigon.

Potenca tondr' malfermis novan mondon.

En la regiono de la Tigra Monto en Hajlin-gubernio, Hejlonggiang-provinco, ĉie brilas sunlumo kaj ĉio prenis novan aspekton post la Liberiĝo.

Prenante Maŭzedongpenson kiel sian batalilon kaj firme tenante klasbatalon, la vastaj armeanoj kaj popolanoj en la regiono de la Tigra Monto ĝisfunde frakasis la intrigojn de la klasaj malamikoj, rapide forlavis la malpuraĵojn postlasitajn de la malnova socio kaj ŝanĝis la fizionomion de malriĉeco kaj postĝinteco de la montregiono.

Dank' al la bapto de la Granda Proletara Kultura Revolucio, en la regiono de la Tigra Monto ĉie regas viveco kaj prospereco kaj nova situacio de antaŭensaltego aperis tiel en la industria produkto, kiel en la agrokultura produkto.

En la antaŭa regiono de la Tigra Monto, la montoj okupis naŭdek procentojn de la areo, la akvoj kvin procentojn kaj la agroj kvin procentojn, kaj la laborantaj popolanoj suferis de mizeroj.

En la hodiaŭa regiono de la Tigra Monto, aperis miloj da hektaroj da fekundaj kampoj kaj brutaroj kaj ĝoje vivas ĉiuj popolanoj.

Dekstre: La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la regiono de la Tigra Monto entreprenis akvo-konservan konstruadon kaj plibonigon de grundo kaj akiris riĉajn rikoltojn de grenoj en sinsekvaj jaroj. Jen ili transportas torfon al kampoj por plibonigi grundon.


Maljunaj laboristoj kaj milicanoj en la regiono de la Tigra Monto, kiuj siatempe batalis ŝultron ĉe ŝultra kun la Persekuta Taĉmento de ĈPLA forte emociiĝis retrorigardante la gigantan ŝanĝon en la regiono de la Tigra Monto.



毛主席的革命路线胜利万岁！








La novtipa universala deĝrajnigilo sukcese projektita kaj fabrikita de la revoluciaj laboristoj kaj teknikistoj de la Fabriko de Agrokulturaj Maŝinoj de Hajlin-gubernio estas tre bonvenigata de la kamparanoj.

La mizera montvalo, kie antaŭe loĝis malmultaj homoj kaj frekventis sovaĝbestoj, nun fariĝis bonega paŝtejo kun brutaroj.





Post multjara praktikado, la esplora grupo de triflanka kombiniĝo de la bredejo de sovaĝbestoj en la regiono de la Tigra Monto akumulis sperton pri bredado de luteoloj sub la specifaj kondiĉoj de nia lando.

